Eduard Weichmann
Dortmund-Kirchderne
Lotenkamp 4

# N I A   L I B E R A   O P I N I O

No 4 Kultura informilo de LIBERPENSULA ESPERANTO-AMIKARO   1955

Antaŭ ol la kongresa tempo komenciĝas, ni dankas al ĉiuj liberpensemaj geamikoj pro la sincera kunlaboro en nia Lib.-amikaro. Bonorde mi ricevis plenigitajn aliĝilojn, proponojn, konsilojn, dezirojn,gratulojn, financan helpon kaj materialon diversan. Ja, eĉ mi volas danki al kristanaj samideanoj, kiuj afable sendis al mi broŝurojn religitendencajn. Sed bonvole komprenu, ke al mi ankoraŭ ne eblas respondi ĉiujn sciigojn interesajn. Ĉirilate mi tamen petas daŭrigi la forsedon de informoj k.c. el diversaj landoj, por ke ili povu esti uzataj por la Lib.Esp.-amikaro.

Kongreso:
Gravaj kaŭzoj malebligas okazigi frakcian kunvenon de Lib.-amikaro en ĉitiu jaro. Ĉu ni organizos renkontiĝon dum la venonta jaro ni pritraktos detale en nia informilo. Bonvolu jam nun pripensi tion, se eble baldaŭ sendi al mi viajn opiniojn.
Estu menciata, ke 1956 la Mondunuiĝo de Liberpensuloj kongresos en Amsterdamo, dume la "DE DAGERAAD"- nederlanda Liberpensula-Ligo- festos sian 100-jaran ekziston.

Jubileo

La "Deutscher Freidenker-Verband ( Germana Liberpensula-Ligo ) okaz - igis grandan demonstracion de la libera penso, rememore al sia 50-jara ekzisto, kiu nur estis interrompita dum la Hitlera-tempo.

Perbelaj floroj estis ornamita la urbteatro de Dortmundo. Harmoniaj sonoj de la "Dortmunder Enzen-Quartett" ekkomencis la imponajn festhorojn je 3-a de julio 1955.

La unua prezidanto H.Freistühler salutparolis nome de la "D.F.V. kaj bonvenis la samideanojn kaj gastojn, kiuj multnombre partoprenis.

Himnoj imponaj, kantitaj de la " Dortmunder Volkschor" ankoraŭ pli solenigis la indan atmosferon.

Samideano d-ro Gremling el Luksemburgo parolis kiel dua prezidanto de la Mondunuiĝo de la Liberpensuloj.Klare li lumigis la kulturpolitikan situacion tutmondan kaj menciis inter alie la sangan kaj aĉmribelon en Belgio kaj Argentinio, organizita de la rom-katolika eklezio.

Nia amiko Liedermooj el Nederlando transdonis salutojn esperantlingve nome de "DE DAGERAAD".

Flame kaj entuziasme paroladis d-ro W.Wenzel el Dortmundo.
Multan aplaŭdon li rikoltis, post kiam li alvokis al ĉiuj spiritbatalantoj ankoraŭ pli fortigi la aktiveeon por niaj altnivelaj kulturceloj, aplikante la racion kaj sciencajn metodojn.
D-ro W.W. finis kun la espero, ke la nuna Liberpensula-Ligo atingu la fieran nombron de 650000 membroj kiel antaŭ la Hitlera-regado.

Post gajaj festhoroj kun humorplena programo bone finis la grandioza manifestacio por la  l i b e r a  p e n s a d o.

-.-.-.-.-.-.-.-.-

Tiu ne estas sola, kiu estas kun noblaj pensoj.  ( angla proverbo)

-.-.-.-.-.-

ÖNB
+Z65384205
ÖSTERR. NATIONALBIBLIOTHEK WIEN
706.617 - C. Esp - 1955-1962

**Vi ne rajtas mortigi.**

Samtempe kiel la moderna trafiko sur la strato pli k pli grandiĝas, tiel rapide kreskas ankaŭ la danĝero perdi la vivon pro akcidento.

En Germanio, dum la pasinta jaro, kaptis la senindulga morto per akcidento ĉirkaŭ 12000 viktimojn. En la mastrumajoj de Okcident-Germanio okazis 2 000 000 akcidentoj, kun la rezulto, ke 8 000 homoj mortis senpardona.

Ekspertizistoj daŭre eksperimentas por malebligi aŭ almenaŭ pli malampleksigi tiajn katastrofojn.

Sed la plej simplan solvon por superi la homan problemon trovis sendube la "dia" eklezio per la alvoko: "vi ne rajtas mortigi- ankaŭ ne en la trafiko sur la strato". Estas vere mirinda, ke la eklezio rememoras je tia dia ordono. Hodiaŭ mi nek volas pritrakti detale la dian fortaĵon laŭ kiu la ĉiopovulo povus bremsi tian aŭ aliajn malagrablaĵojn, nek mi volas tuŝi la kriman rompon de tiu rekomendinda leĝo fare de la kristaj eklezianoj mem. Mallonge mi nur klarigos unu el miaj propraj spertoj kiamaniere la eklezianoj praktikis la dian leĝon: "vi ne rajtas mortigi".

Dum la pasinta milito mi partoprenis al milit-diservoj malantaŭ la fronto. Ja, eĉ kelkfoje mi interbabilis kun militpastroj, sed neniam mi aŭdis el la buŝo de iu ajn pastro - ĉu katolika, ĉu protestanta - la admonon:"vi ne rajtas mortigi". Male, fakto estas, ke oni benis nin inkluzive niajn mortigilojn, antaŭ ni soldatoj okazigis bestian infernon kontraŭ homoj nekonataj, kontraŭ tiuj t.n. malamikoj kiuj eble ankaŭ estis benitaj antaŭe, fare de siaj pastroj.

Tiatempe, la kristanaj pastroj de la tuta mondo havis la plej sukcesplenan ŝancon por pruvi sian sincerecon kaj kuraĝe proklami la dian leĝon:........., Sed bedaŭrinde ili silentis pri tiu dia ordono, kvazaŭ ĝi ne ekzistis, kaj la sanga amasbuĉado inter la diaj infanoj rikoltis abunde inter la homaro. Dolorkriegadoj de la viktimoj estis aŭdeblaj ĝis ĉielo, detruigaj flamoj helaj kaj fumnuboj malhelaj, venintaj el la ruinaĵoj, kolorigis la ĉielon; adoraĉoj pro kadavroj malfreŝigis la aeron, sed indulgo kaj justeco de DIO - almenaŭ por infanetoj - ne brilis kaj la dia leĝo pri "ne mortigu" estis forigata el la kapoj de la kulturportistoj kristanaj. Ĉu la kristanaj ekleziuloj tiamaniere ne sufiĉe malkaŝis sian veran karakteron?
Sed tamen, pri nun-tempaĵoj ni ne bezonas pli miri ol pri aliaj pasintaj okazaĵoj; verŝajne ekzistas de dio favorata murd-leĝo. Vidu 2.reĝoj, 19:35, laŭ kiu la anĝelo de la dio "kara", dum unu nokto mortigis 185 000 soldatojn Asirajn, kiam ili minacis Jeruzalemon.

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

Zorgojn pro manko de pastroj havas la eklezio, laŭ gazet-informo oni bezonas 160 protestantajn kaj 150 katolikajn pastrojn.por la nova germana armeo.

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

Esperanto-societo C E L J E kaj Turisma sekcio de Slovenia Esperanto-Ligo eldonas novan gazeton "K O N T A K T O ". Ĝi estas 8 paĝaj kun multaj bildoj.

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

Por konstrui "ATEISMA NOVAJ-SISTEMON" deziras kontakti kun ateistoj organizataj: S-ro C.Thomas Irwin, 804 Turk St. San Francisco 2, Calif. USONO

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

Al la geamikoj, kiuj eksferios baldaŭ, mi deziras bonan kaj agrablan libertempon.

*Dankon pro materialo*

*amikece, E. Weichmann*

Eduard Weichmann
Dortmund-Kirchderne
Lotenkamp 4

# NIA LIBERA OPINIO

No 5 Kultura informilo por la LIBERPENSULA ESPERANTO-AMIKARO 1955

## Pri unu de niaj fundamentaj celoj

For nun estas la somera sezono kaj la aŭtuno jam estas ekkonebla en la naturo per tipaj signoj. Esperinde refreŝataj pro ferioj aŭ ripoztagoj ni nun turnu nin al niaj liberspiritaj kulturtaskoj por efektivigi niajn fundamentajn celojn, kies grava punkto i.a. estu hodiaŭ kiel ĉiam propagandi Esperanton en la liberpensulaj organizoj de la koncernaj regionoj.

La kunsendata gazeto "DER FREIDENKER" organo de la"GERMANA LIBERPENSULA LIGO" kun la regula Esperanto-angulo, nur estas komenco kaj ekzemplo. Jam la britaj kuncelanoj sukcesis sampenante. En"SOCIALIST LEADER" gvidanta soc. gazeto en Britio nun aperas konsiderinda Esp.-kolono. Ankaŭ la nederlandaj geamikoj esperas baldaŭan sukceson tiudirekten.

Jenan opinion pri tiu temo havas nia nederl. amiko J.Belkanto:

"Estas sendube priridinde, ke organizoj, kiuj sin nomas internaciaj kaj progresemaj, ankoraŭ uzas tiajn malmodernajn komprenilojn kiajn nac. lingvojn, tradukistojn kaj tradukojn por internacia interkompreniĝo! Tiujn ilojn oni devis uzi antaŭ 5o jaroj, sed ekde la tempo kiam Esperanto ĉie disvastiĝis tra la mondo kaj plue montris sian belegan uzeblecon, oni ne plu bezonas malmodernajn interkompreniĝ-metodojn.

Ni liberpensulaj Esperantistoj do d a ŭ r e penadu ĉe la organizaj estraroj por ke en baldaŭa tempo nenia landa gazeto ĉu ateista, liberpensula, humanista aŭ alia, aperu sen Esperantaj komunikaĵoj.
Tio estonte fariĝu; se ni liberpensuloj ktp. vere volas esti internaciaj, ni bezonas ankaŭ tutmondan interkomprenilon, do ESPERANTON!
Se naciaj gvidantoj samideaj tion ankoraŭ ne komprenas, vi penu tion klarigi al li !!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan.

Eĉ guto malgranda, konstante frapante
tralaboras la monton granitan!
L'espero. l'obstino kaj la pacienco-
Jen estas la signoj, per kies potenco,
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro!! "

-.-.-.-

## Rimarkinda citaĵo

La kristana eklezio, precipe la katolika, fariĝis ilo por la subpremo. Ĝi posedas potencon kaj monon. Ĝi volas regi anstataŭ servi, ĝi ĉiam sin asocias kun la regantaj klasoj kaj fariĝis malamiko de la popoloj. La okcidenta religio praktike sanktigas perforton kaj militon.

(Mahatma Gandhi)

-.-.-.-.-.-.-

"La papeco tute ne estas dia institucio; pli ol ĉiu alia potenco ĝi alportis malbenon kaj ruiniĝon, sangajn kruelaĵojn kaj senhonorigon en la plej internan sanktaĵon de la homaro, en la relegion."

(Hoensbroech. La papeco en sia socialkultura agado. Lejpcigo,I, pĝ.VII)

## La nuntempa danĝero

La homa timo pro danĝero de atom-kemia-bakteria-milito ombrigas la tutan terglobon kiel terurfantomo.
Dum la monato aŭgusto en Japanio oni rememoris al la okazaĵoj antaŭ lo jaroj, kiam la urboj Hiroŝima kaj Nakasaki estis cindrigataj totale per fortegoj de la atombomboj. Ne esprimebla kaj taksebla estas la rezulto de la homa katastrofo, ja eĉ ĝis hodiaŭ la sekvaĵoj ne estas bonordigitaj kontentige.

La rapide evoluantaj A-B-C-armiloj, kuŝantaj en la manoj de koncernaj potenculoj akcelas la eblecon ekstermi ĉiun homan aŭ bestan vivestaĵon.
Politikistoj, sciencistoj kaj diversaj organizoj apelaciadas per admonoj, petícioj kaj rezolucioj al la homa racio de la atomposedantoj.
La finkonsekvencoj pro eventuala moderna milito sendube signifus la lastan horon de la civilizacio kaj kulturo, sed mi ege konjektas ke eĉ la plej skrupula homo hezitus okazigi tian infernon. Do, la timema homaro povus esti senzorga pri tiu afero se....jes se....
Ĉi tiu "se" estas vere fatala fenomeno en multaj kapoj de la kristanaro. Ekde ekzisto de la biblio ĝi ĉiam reaperas kiel koncentraĵo el la konsekvencoj de la homa malpripensemo, konfidemo kaj egoismo. Per tiu "se" evidentiĝas klare la kontraŭracia plano de la DIO, laŭ kiu la kristanaro estas devigata humile fali polven pro la knuto de la dipermesata diablo.

"Vidu jenajn ekzemplojn, ekstrakte elprenitaj el la "DER WACHTTURM" Jehovana organo de majo, pri la konfuza mondsituacio.
Laŭskribe ne la atomaj armiloj estas la vera kaj totala danĝero por la homaro, sed la estonta batalbuĉado inter la diaj batalantoj de la ĉielo kaj diablo kun siaj demonoj.

La satano, kiu miskondukas ĉiujn naciojn (senescepte) dum la batalo ĉe "Harmagedo" estos elĵetata el la ĉielo, kaj malsatmizeroj, multnombraj tertremoj kiel mondmilitoj estas antaŭvidataj.
Kompare al la finbatalo ĉe Harmagedo estas la atomdanĝero nur bagatelo. Por centoj da milionoj de homoj estas destinataj la sorto de ekstermo; ĉiuj mortigetoj - per la dimano de Jehovo - estos perdataj por ĉiam kaj iliaj kadavroj estos kuŝantaj kiel sterkaĵo sur la tersupraĵo."

Ĉu iu ajn inter la racipensantaj homoj povas kompreni kial la CIONPOVULO projektas tiajn brutalajn planojn por turmentegi siajn propraj infanojn kaj por aliigi la florantan mondon en ruinaĵo?

Ankaŭ per tia biblia vizio la "SANKTA VORTO" pruvas, ke la "kara" DIO estas pli kruelema ol la plej spiritmalsana fantazio povas elpensi ion similan.

"Ne timu tiujn, kiuj nur mortigas la korpon sed krome ne plu povas fari ion alian. Timu tiun, kiu havas la potencon ĵeti infernon, post kiam li mortigas." Luk.12:4,5

-.-.-.-.-.-.-.

## Aliaj voĉoj pri la sama temo

"Du malsanoj detruas ĝisfunde nian popolon: sensciece kaj indiferenteco! La unua malsano pereigas la pensadon, la dua la voladon"
(Antono Krenn, Vieno, antaŭe 7 jarojn roma katolika pastro, nun gvidanto de liberpensula unuiĝo de Aŭstujo en "Geistesfreiheit" - spirita liberemeco- 1949, pĝ 110.)

-.-.-.-.-.-.-.-

"Amasmurdo, torturo, persekuto kaj premego, kiujn ni spertas en la mezo de la 20a jarcento, pruvas la kompleton bankroton de kristaneco kiel civiliza forto." (Emory Reves en sia eksterordinare disvastigita libro "La anatomio de la paco")

-.-.-.-.-.-.-

Reprodukti permesata.

NIA LIBERA

# OPINIO

PRI RELIGIAJ- SCIENCAJ- BIOKOSMAJ- PRINCIPOJ
No 6 POR "ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ" JAN! 1956

---

Okaze de la alveno de la nova jaro ni deziras
al ĉiuj samcelanoj feliĉon, sanon kaj prosperon.
Ni uzu la okazon por sincere danki la amikojn,
kiuj iamaniere subtenas nian luktadon.

---

## ... --- ... S O S ... --- ...

La supraj signoj de la Morsa alfabeto kaj la literoj reprezentas en angla lingvo la vortojn "SAVE OUR SOULS" (Savu niajn animojn) kaj, ĝenerale, estas uzataj kiam ŝipoj estas en danĝero sur la maro. Certe, pro kortuŝa efekto sur aŭskultantoj estis elektita la supra helpvoko.

Ne estis surprizo al mi legi la saman signon " S O S" en la katolika gazeto STADT GOTTES (Urbo de dio), uzata ne per helpo al homoj en risko perdi siajn animojn en la vasta maro, sed kontraŭ la formo de la plimultiĝo de la loĝantaro sur nia terglobo.

Ni ĵetu iom da lumo sur tio kial la katolika gazeto presigis SOS, trovante la plimultiĝon de la terloĝantaro alarma kaj danĝera.

Estas ĝenerale konate, ke la homaro kreskis ek de la jaro 1913 ĝis nun je 40 procento; tio estas, de 1,8 miliardoj da homoj ĝis 2,5 miliardoj. Dum la jaro 1870 en Germanio naskiĝis pli da infanoj ol en iu alia lando de okcidenta parto de Eŭropo, sed en la jaro 1949 la nombro estis malpli ol en la aliaj.

Kvankam la loĝantaro de Anglio, Francio, Germanio kaj aliaj landoj plimultiĝis, la koncerna artikolo asertas, ke ili estas "mortantaj popoloj". Dum la popoloj de la, tiel nomata, ORIENTA BLOKO estas proksimume 1,4 miliardoj da homoj, la OKCIDENTA BLOKO estas nur 1,1 miliardoj. Ĉiutage en la mondo naskiĝas 110 ooo infanoj; dutrionoj ekvidas la lumon en la orienta parto kaj triono en la okcidenta parto de la terglobo.

Tia estas la oficiala statistiko pri la loĝantaro, kiun la "STADT GOTTES" trovas alarma. Sed laŭ la fundamento de kristanismo, la biblio, ĉu dio ne diris al la unuaj kreitaj homoj, Adamo kaj Evo, "kresku kaj plimultiĝu" Ĉu per tio la kreinto intencis "kresku kaj plimultiĝu en diversaj kontraŭaj rasaj kaj popolaj blokoj?" Oni povas alveni al tiu konkludo , legante en STADT GOTTES jenon:

"Eŭropo, kien! Ni iras en la plej grandan Danĝeron esti superondataj, superegataj kaj dispremotaj. Nek paktoj, nek imponaj tankoj, nek militaviadiloj, nek atomarmiloj povos "savi" nin. Popoloj de koloraj rasoj de la oriento rigardas al la okcidento. Iliaj armeoj, plene armitaj, kun siaj kanontuboj staras ĉe la bordo de la rivero Elbe jam. Nur la kreo de sanaj kondiĉoj por familioj, speciale familioj kun multaj infanoj, povos savi la pozicion."

Karaj amikoj, antaŭ kelkaj centjaroj jam la eklezioj proklamis

similajn tezojn, ke "La kristana vesperlando kaj kulturo estas en danĝero." Mi ŝatus rememorigi, ke tiam la nonaĥo Bernhard de Clairvaux, antaŭ ok cent jaroj per entuziasmigaj alvokoj instigis la homojn armigi kaj marŝi rekte al la sankta lando (La dua kruc-milito 1147 - 1149). La Saracenoj havis kaŭzon esti en alarmo pro tiu ankoraŭ nekonata S O S. La kristanaj hordoj invadis ilian landon, buĉante kaj detruante ĉion.

Estas ankaŭ menciindaj la imponaj festotagoj, kiuj okazis en Augsburg, Germanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1955, memore al la sanga buĉado sur la "Lechfeld" antaŭ mil jaroj. Tie oni solene festis la Sanktan Ulrich, kiel la unuan savanton de la kristana vesperlando, ĉar li benis la batalantojn kaj donis al ili sanktan komunion kaj plenan indulgencon por buni sin en la sango de la masakratoj.

Mi ne intencas agiti kontraŭ nasko de infanoj, tio estas aparta temo, mi volas atentigi vin pri la intereso de la katolika eklezio al infanriĉaj familioj kaj pri la vivspaco, aspektanta katastrofa por multaj regionoj. Pro tio jam Hitler proklamis: "Popolo sen spaco"! kaj sentis sin devigata per la glavo akiri novajn terspacojn.
En la libro MEIN KAMPF li diras: "Ni komencas tie, kie ni finis antaŭ ses centjaroj. Ni haltigas la eternan antaŭiron de Germanoj al la sudo kaj okcidento de Eŭropo kaj ni turnas nian rigardon al la orienta lando" (paĝo 742).
Pro la konsekvencoj de la ras`kaj popol-ekspansia politiko, sufiĉe klare diras al ni la pasintaj okazaĵoj.

La katolika gazeto provas pligravigi la rasan kaj popolpolitikan problemon nuntempan, ĉar en ili kuŝas la ŝancoj de la rom-katolika kristanismo vivadi longtempe kaj regi la mondon ankaŭ en la estonto. Ni, Esperantistoj, kaj precipe Liberpensuloj rigardu ne per okuloj de blanka raso aŭ de eŭropano kio okazas, sed ni atentu la neŝanĝeblajn faktojn. Sekve mi devas konstati, ke savi la tutan homaron povas nek alarma alvoko SOS, nek mitologia dio, nek dispartigoj de rasoj, nek modernaj amasmortigiloj, kaj precipe, nek malamikaj potencblokoj. Aliigi la nunan situacion povas nur la homa racio, toleremo kaj koncio ke la universala vivo estas kunligita - solidara. La lastaj principoj estu esprimataj per la moto:

UNU MONDO UNU HOMARO UNU LINGVO

... --- ..., ... --- ...

**Dum la kunveno de"katolika organizaĵo de viroj" en la preĝejo de pilgrimoj en Birnaŭ, la federa ministro de familioj, Wuermeling, sarkasme diris, ke dum la unua duono de la jaro 1955 en Germanio pli da permesoj por aŭtoj estis liveritaj ol naskiĝoj registritaj.**

.-.-.-.-.-.-

Misiisto konfesis en kunveno, ke 75 procento de malhelhaŭtaj studentoj katolikaj en Usono perdas sian kredon pro tio, ke la blankrasa loĝantaro katolika ne estimas egalecon de homoj antaŭ dio.

.-.-.-.-.-.-

En Dortmund estis uzata nova metodo por puni krimulinon.
Unu nokton 27 jara fraŭlino, kun moknomo "Logbird-pupo", allogis 18 jaran laboriston en ruinaĵon. Tie du komplotantoj de pupo, laŭ antaŭ aranĝita plano, batis la laboriston ĝis morto kaj prirabis lin.
Pro tiu krimo la "Logbird-Pupo" estis kondamnita al malliberejo por naŭ monatoj. Sed tiu puno estis ŝanĝita, kondiĉe, ke ŝi restu en la monaĥinejo "Zum guten Hirten" dum tri jaroj.
Ho! amikoj, eĉ ni, liberpensuloj, ne povus supozi ke por kristanoj la restado en monaĥinejo estas egala al puno por krimo. Vere, nova koncepto. - Ni ne estas kontraŭ tio.

.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

Redaktejo: Ce Eduard Weichmann, Dortmund-Kirchderne, Lotenkamp 4
Germanio
Reproduktо permesata.

NIA LIBERA

# OPINIO

Numero 7 Pri RELIGIAJ SCIENCAJ BIOKOSMAJ PRINCIPOJ Marto 1956
Por "Esperanto-Amikaro de Liberpensuloj"

Sidejo: Eduard Weichmann
Lotenkamp 4, DORTMUND-KIRCHDERNE, Germanlando

## A s p e k t o j

Observante la verdiĝon de la naturo kun kontento oni konstatas, ke la printempaj sunradioj venkis la vintran froston.

Novaj revivigaj impulsoj regas la faŭnon kaj ankaŭ donas al ni la necesan energion por realigi niajn intencojn, esperojn kaj dezirojn. En tiu senco grava solvenda problemo estas la demando kie kaj kiamaniere ni, liberpensemaj Esperantistoj, trovu la favoran eblecon kongresi por kunesti en atmosfero amika, por interŝanĝi ideojn, spertojn kaj pritrakti niajn specialajn temojn.

Kiel estas jam konate, Universala Esperanto-Kongreso okazos en Kopenhago. Kvankam en la nuna jaro ne estas planite organizi oficialan fakkunsidon, tamen, ĉiuj partoprenontoj de tiu kongreso estas alvokitaj kontakti kun samideano

Bertil Englund, Strömsbro, BOFORS, Svedlando,

kiu zorgos neoficiale aranĝi renkontiĝon de liberpensuloj en Kopenhago. En la decembra numero de la revuo ESPERANTO S-ano Englund altiras nian atenton al tio. Pli da sciigoj aperos en nia sekvonta bulteno.

Pri SAT-KONGRESO EN BEOGRADO. Estas ankoraŭ nekonate al mi, kiu gvidos la fakkunsidon de LIBERPENSULA FRAKCIO DE SAT.

## AMSTERDAMO

Kiel jam menciite en NIA LIBERA OPINIO numero 4 la kongreso de la MONDUNIO DE LIBERPENSULOJ okazos en Amsterdamo de la 28 aŭgusto ĝis 2 septembro 1956, kiam la nederlanda liberpensula organizaĵo "De Dageraad" festos sian centjaran jubileon. Ni devas ne preterlasi la favoran momenton demonstri nian lingvon. Kun bedaŭro ni devas sciigi, ke la komitato de la Mondunio ne akceptis la proponon, kiun ni sendis al la prezidanto de la " Deutscher Freidenker-Verband", en kiu ni petis, ke liberpensuloj-Esperantistoj rajtu oficiale kunkongresi en la kadro de la granda manifestacio.

Malgraŭ diversaj malfacilaĵoj, finfine ni decidis iniciati apartan renkontiĝon de Liberpensuloj-Esperantistoj en Amsterdamo.

Ĉiuj partoprenontoj estas petataj tuj anonci sin ĉe

Jan Liedermooy, Stenen Camer 76, DE BILT (U), Nederlando.

Skribu tuj, faru proponojn sugestojn, dezirojn, konsilojn aŭ eĉ kritikojn, Intertempe ni fosu nian sulkon sur la liberspirita kampo kaj uzu nian energion por efektivigi jenan planon :

a) La samlandaj amikoj serĉu reciprokan kontakton kaj elektu delegiton por sia lando.

b) Tiuj delegitoj estu en daŭra kontakto kun la nuna provizora sidejo de nia amikaro.

c) La organizitaj liberpensuloj-Esperantistoj interrilatu kun la landaj liberpensulaj organizaĵoj por montri la ekziston de liberpensuloj-Esperantistoj.

ĉ) Organizitoj sendu al la estraro de la Liberpensa organizaĵo en sia lando nian proponon, petante, ke en Amsterdamo ili voĉdonu por nia propono.

NIA PROPONO

a) ke dum kongresoj de la Mondunio de Liberpensuloj la uzado de la mondlingvo ESPERANTO estu samrajta kiel aliaj akceptitaj naciaj lingvoj: angla, franca, germana k.t.p.

b) ke la organizitaj Liberpensuloj-Esperantistoj havu la rajton organizi apartan fakkunsidon en la oficiala kadro de la kongreso.

-.-.-.-.-.-

Britlando. Ĝis la starigo de brita grupo de Liberpensuloj-Esperantistoj interesatoj skribu al S-ano J.W.Leslie, 14o Holland Park Avenue, LONDON, W.11, kiu provizore estas peranto por nia amikaro.

K O M U N I K O

Al kelkaj anoj de nia "Esperanto-Amikaro de Liberpensuloj", eĉ al ne SAT-anoj, estas kunsendata bulteno de la Liberpensula Frakcio de SAT "LA LIBERPENSULO".

Certaj linioj sur la lasta paĝo de numero 2 de tiu bulteno instigas min doni mallongan deklaron pri la naskiĝo, evoluo kaj nuna pozicio de E.A.L.

1953. Vane mi serĉis liberpensulan ligon de Esperantistoj, kaj fine mi trovis, ke ekzistas la Liberpensula Frakcio de SAT.
Post kontakto kun s-ano A.Gay, mi akceptis la proponon esti peranto en Germanlando de tiu Frakcio.

1954. Post interkonsento kun s-ano H.Freistühler, prezidanto de "DEUTSCHER FREIDENKER VERBAND", estis starigita Esperanto-angulo en "DER FREIDENKER"

Konstatinte la limigitan sferon de la SAT-Frakcio, estis fondita la ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ, kiel sendependa ligo, por ke ĉiu sampensanto havu la eblecon kontribui iamaniere al nia komuna idealo ESPERANTO-LIBERPENSO. Jam pli ol 5o sampensantoj el 13 landoj iĝis membroj de la Amikaro.

Laŭ statutoj, nia E.A.L. estas vere sendependa, do, ne ido de SAT-Frakcio. Ni ne volas konkuri kun la SAT-Frakcio, sed kunlabori kun ĝi. Pro tio mi alte taksas la proponon de S-ano A.Gay kunligi la membrojn de la du organizaĵoj en unu asocio kaj aperigu unu bultenon kvarfoje en jaro.

Precizaj detaloj pri tiu nova situacio aperos en la venonta numero de "NIA LIBERA OPINIO"
Diskutoj, proponoj kaj kritikoj pri eventuala fondo de Tutmonda Liberpensularo Esperantista estu sendotaj al la sidejo de nia Amikaro.

.-.-.-.-.-.-.

HAMBURGO Marto 1956. je la 2o-a de Julio 1933 Hitler kaj Vatikano inter si faris Konkordaton. Eĉ la nuna registaro de la Germana Federacio akceptis la kreaĵon el la hitlera tempo. D-ro Dehler, la prezidanto de la Libera Demokrata Partio, akre atakis tiun Konkordaton kaj nomis ĝin krima. Li asertis, ke la Vatikano celis fari klerikalan faŝistan sistemon. Li ankaŭ altiris la atenton de siaj aŭskultantoj al la skribaĵo de la mortinta Kardinalo Faŭlhaber en kiu li glorigis Hitleron por kunlaboradi kun tiu krimulo.

.-.-.-.-.-.

---

Kiu venkos, la racia progreso aŭ la eklezia potenco ?
Rememoru pri la sorto de Peron.

---

## G I O R D A N O   B R U N O



En memoro al la 356-a datreveno de la krimo, farita de la Vatikano, D-ro Saverio Li Volsi, la prezidanto de la Itala Societo de Liberpensuloj "GIORDANO BRUNO" prelegis en la sidejo de la milana respublika partio pri la ŝtipara fajro sur la "Campo dei Foiri" (Kampo de Floroj) en Romo.

Giordano Bruno, la itala filozofo, estis naskita en la urbeto Nola, apud Napolo, en la jaro 1548. Li estis profesoro ĉe la Sorbono en Parizo. Tie li kontraŭstaris la skolastikan kaj aristotelan doktrinojn, la katolikan teologion kaj dogmon de la Triunuo.

Pro lia konvertiĝo al la Kalvinismo, la roma eklezio deklaris lin - herezulo, kaj la 16-an de februaro 1600 sur la "Campo dei Fiori" en Romo bruligis la faman filozofon.
En 1889 sur la sama loko de la krimo estis starigita monumento al Giordano Bruno.

Giovanni Bovio, liberpensulo framasono kaj filozofo, formulis simplan, sed trafan, epigramon "Qui dove il rogo arse" ( Estas ĉi tie, kie la ŝtiparo ardis).

Instigataj de la vatikana eklezio, de tempo al tempo superaj instancoj provas forigi la monumenton al Giordano Bruno. Renkontante fortan kontraŭstaron, feliĉe, ili ne sukcesis ĝis nun forigi tiun monumenton, kiu staras tie por rememorigi al novaj generacioj pri sufero por la rajto al la libereco de la penso.

---

"En ĉiu tempo nur kelkaj homoj estas saĝaj. Absurdaĵo regas"
Schiller

---

USONO, A.N.S. Informo. La pia reakcia protestanta gazeto en Usono "Western Voice" (Okcidenta Voĉo) atakas la "blasfemojn" de Nels Ferre, profesoro de teologio en la universitato "Vanderbilt". Laŭ tiu gazeto en la estonteco la preĝejaj katedroj estos plenaj de nekreduloj. La verkintoj citas la rezulton de enketo, laŭ kiu el 500 enketitaj pastroj de protestanta fido, 47% kredas la genezan historion pri la "kreado" sed el 200 studentoj de teologio nur 5% kredas al tiu biblia rakonto.

BERLINO Marto 1956. La protestanta eklezio protestis kontraŭ la nova leĝo en la Orienta Germanlando, laŭ kiu instruado pri religio en popolaj lernejoj estas permesata nur post la elementa lernoplano. Laŭ ŝtata dekreto en altlernejoj la instruado de religio estas tute nepermesata.

.-.-.-.-.

"Dogmoj estas malpli valoraj ol sterkakvo, kiun oni povas uzi almenaŭ kiel sterko. (Mao Tse Tung , en "La nova demokratio" 1942.)

.-.-.-.-.

### T r o   m a l f r u e

Ekzistas ankaŭ bonaj homoj,
sed ili agas en silent'.
Ni aŭdas pri iliaj nomoj
kaj bonaj faroj post jarcent'.
Ilian vivon en turment'
honoras poste monument' : (J.Burger)

Reprodukto
permesata

NIA LIBERA
# OPINIO
Pri RELIGIAJ SCIENCAJ KULTURAJ PRINCIPOJ N-ro 8
Por "ESPERANTO -AMIKARO DE LIBERPENSULOJ" 1956

## B U D H A I S M O

Krom sennombraj agrablaj kaj timigaj informoj en ĉiutagaj gazetoj kaj radioprogramoj, oni povis aŭdi kaj legi en Majo 1956 pri la 2.5oo jara jubilea festo de la Budhaismo.

Aŭskultintoj kaj legintoj de la okcidenta parto de nia terglobo, certe, rimarkis sian nescion pri tiu mondreligio al kiu apartenas proksimume 5oo milionoj da adeptoj en Birmo, Cejlono, Cinio, Hindoĉinio, Japanujo, Kamboĝo, Laoso kaj en aliaj landoj.

Pro multaj sektoj en Budhaismo estas nefacile prezenti unuecan strukturon de tiu religio sen dio. Tamen, esplorante la fundamenton de tiu religio estas interese al ni, liberpensuloj, meti en lumon la principajn flankojn de ĝi, ĝuste tion, kion oni konscie evitis montri al ĝenerala publiko.

Germana monata gazeto DER FREIDENKER en No. 7 de la jaro 1954 havis bonan artikolon pri Budhaismo sub la titolo: "ANKAŬ ATEISTO".
Ankaŭ la Budhaana Ligo Esperantista asertas kun fiero, ke Gaŭtama Budha, la fondinto de la Budhaismo, estis la unua homo pensanta racie kaj la unua liberpensulo.

Estas ĝenerale nekonate, ke kontraste al kristana religio, la budhaismo havas nek dogmojn, nek preĝojn, nek kredon en iu ajn dio aŭ en eterna animo. Ĝi estas en akordo kun nuntempa moderna scienco.

Antaŭ 2.5oo jaroj Budha levis sin kontraŭ kredemo al aŭtoritatoj per jenaj trafaj vortoj: "Ne kredu al io, ĉar oni diras tion ! Ne fidu tradiciojn nur pro tio, ke ili venas de pratempo kaj estas herede transdonitaj al nia tempo tra multaj generacioj! Ne kredu ion fama, ĉar oni multe parolas pri ĝi ! Ne kredu al io pro tio, ke oni montras al vi skribitan ateston de iu saĝulo el pasinteco ! Ne kredu ion, kiu estas nur de via imaĝo, aŭ ke vi ricevis revalacion de iu dio, ĉar tio estas la kutimo aŭ supozo ! Ne kredu al iu aŭtoritato aŭ pastroj ! Kion ajn vi trovos, esti en akordo kun via racio,laŭ via persona sperto kaj pruvo, ke tio servas al la bonfarto de vi kaj de ĉiuj estaĵoj, tenu tion esti la vero kaj vivu laŭ ĝi!"

Aliaj principoj de Budhaanoj estas la ĵuro de kvin promesoj:
1. Mi promesas ne mortigi aŭ suferigi iun ajn vivantaĵon sen neceso.
2. Mi promesas, ne preni ion, kio ne estas donata libervole.
3. Mi promesas eviti neindan kaj ekscesan konduton.
4. Mi promesas ne mensogi kaj ne kalumnii.
5. Mi promesas ne tuŝi ebriigajn trinkaĵojn por ke mia pensado restu ĉiam klara.

La celo de budhaano estas atingi Nirvanon, tio estas, la finon de suferado kaj de morto. Al tio oni alvenas irante laŭ vojo de ok devoj: 1. ĝusta scio. 2. ĝusta decido. 3. ĝustas parolo.
4. ĝusta konduto. 5. ĝusta vivado 6.ĝusta agado, 7. ĝusta rezonado.
8. ĝusta meditado.

E.W.

## KORAN BONVENON !

En la familion liberpensulan ni ĝoje bonvenas novan alveninton, viglan amikon kiu alportas al niaj rondoj ideojn freŝajn kiel la printempa floraro kaj samtempe pripensindajn produktaĵojn de fidinda matura menso. Guste tia estas la nova brita liberspirita ĉiumonata gazeto "SECULAR LIFE" (SEKULARA VIVO) kiu venas al ni el la angla ĉefurbo Londono, konata centro por la nuntempa progresema kontraŭ-religia vivo en Grand-Britujo.

Senduba atesto pri la laboremo kaj energio de ĝia fondinto estas la unua numero kiu aperis en la lasta marto.

En la du oficoj (ambaŭ sensalajraj), tiuj de redaktoro kaj eldonanto, funkcias brile S-ro. P.Victor Morris iama Sekretario de la brita Nacia Sekulara Societo kaj bone konata al ĉiuj britaj kolegoj por lia entuziasma kaj senlaca antaŭenigo de nia komuna afero. Sekvante la tradicion de la nobla pionira angla liberpensulo George Jacob Holyoake (1817-1906), kiu mem unue kreis por la angla lingvo la nomon "Sekularismo", Morris insiste kaj prave uzadas la terminojn "sekulara" kiel "sekularisto" kiel adjektivo kaj pronomo respektive laŭ pozitiva senco por ĉiu kiu subtenas la liberpensan ideologion kontraŭ la ĉampionoj de kaduka kaj timdeviga superstiĉa sistemo.

En la unua numero sanideano Morris pardonpetas pri tio,ke li devis verki la tutan enhavon per si mem, sole, kaj esperas ke la leganto ne tediĝos. Jen, 16-paĝa gazeto sur bonkvalita papero, bele presita, tutplena je pensinstigaj artikoloj kaj poemoj, kaj la aŭtoro petas nian indulgon- kia viro!

Plej sincere ni deziras al li ĉian sukceson en la akiro de vasta aro de lojalaj kontribuantoj kaj abonantoj, kiel li plene meritas, por certigi la daŭran sukceson de lia cerbinfano ĝis plej fora estonteco.

Kamarado leganto, kiel ne montru ke eĉ vi mem aŭdis pri la entreprenemo de Morris per sendo de simpla salutmesaĝo al li en Anglujo? Certe, tio pluc kuraĝigos lin kaj samtempe vi plej efike kaj persone helpos fortigi la ligojn interpopolajn por nia tutmonda movado.
La adreso estas:- S-ro.P.Victor Morris, "SECULAR LIFE"
244, Lauderale Mansions, L o n d o n, W.9, England.

.-.-.-.-.-.

### NEDERLANDO

Nia amiko Jan Liedermooij en DE BILT, Nederlando, faris grandan preparan laboron por garantii sukceson ĉe la renkontiĝo de Liberpensuloj- Esperantistoj dum la kongreso de la MONDUNIO DE LIBERPENSULOJ en Amsterdamo, sed ĉio estis vana. Laŭ la lasta komuniko pri tiu kongreso, ni sciiĝas, ke la manifestacio ne okazos dum la nuna jaro. Pro tio la planoj pri renkontiĝo de nia AMIKARO en Amsterdamo ankaŭ ne povas okazi. Malgraŭ tio, ni ne hezitu esprimi nian laŭdon al amiko J.Liedermooij pro liaj klopodoj plenaj de memofero.

En JUNIA INFORMILO de J.Liedermooij al anoj de la Esperanto-Amikaro de Liberpensuloj, sekcio Nederlando, estas legebla la jeno:
"Mi estas informata, ke la estraro de la Nederlanda Liberperpensula Organizo ne estas kontraŭ Esperanto pro celoj de liberpenso. En DE VRIJDENKER aperis jam mia alvoko en nia lingvo internacia kaj ..... mi eĉ ricevis antaŭ nelonge inviton ĉeesti la jarkunvenon de DE DAGERAAD en Hago kiel delegito de E.A.L. !! Komprenebla, mi iris ...... kaj mi aŭdis i.a. komunikon, ke la estraro invitos E.A.L. sendi delegiton al la Festkongreso de DE DAGERAAD, okazonta de 3-7 Oktobro 1956 en Amsterdamo...... DE DAGERAAD jam oficiale invitis min ĉeesti por helpi la estraron akcepti alilandajn amikojn...."

NOTO: La penadoj de nia amiko J.Liedermooij jam alportas frukton. Ciu amiko, kiu povas esti en Amsterdamo por partopreni la festkongreson de DE DAGERAAD anoncu vin tuj ĉe J. Liedermooij, St.Camer 76, DE BILT (U). Ciu partoprenonto estos bone prizorgata kaj havos agrablan restadon.

## LA FULMOTONDRO

Veturante hejmen per tramo, kiel kutime post la fino de ĉiutaga dejor, mi estis surprizita per fulmotondro. Malhelgrizaj nuboj pli kaj pli malheligis la someran tagon. Fajraj fulmoj, akompanataj de bruaj tondroj, serĉis sian vojon teren.

Vid-al-vide de mi sidis patrino kun sia filino, ĉirkaŭ dekjara, kiu demandis ion pri la giganta fenomeno natura. Komprenoble la patrino respondis ke la kara dio estas en ega kolero kontraŭ la pekema homaro. La infano en timo ektremis kaj serĉis ŝirmon apud sia patrino kontraŭ tia dio. Kaj eĉ en nuna epoko oni edukas per timo al dio, kaj fulmotondroj metas en teroron la cerbojn de kredantoj al dio. Oni ne scias, aŭ ignoras, ke en 1752 Benjameno Franklin eltrovis la fizikajn leĝojn pri elementoj de la fulmotondro.
Per flugdrako al kiu estis fiksita drato, Franklin faris eksperimenton dum fulmotondro kaj sekve de tio li inventis fulmodirektilon.

Ĉi tiu scienca kaj historia evento fortiris la maskon de la infana kredo dum miloj da jaroj kaj detruis la timon pri fantazia fantoma dio, kaj faligis unu el la relegiaj superstiĉoj.

Ankoraŭ antaŭ nelongo dum naturaj katastrofoj la kredemuloj kolektiĝus en preĝejojn por peti helpon kaj ŝirmon de la ĉiopovulo, de tiu, kiu, laŭ kristana religio, estas la direktanto de surteraj katastrofoj. Ĉiu klera homo bone scias, ke fulmo ne konas preĝejojn kaj ke ĝi ne povas aŭdi preĝojn, ĝi konas nur fizikajn leĝojn. La historio registras, ke fulmo cindrigis preĝojn kun iliaj, tiel nomitaj, benitaj objektoj kaj ankaŭ mortigis pastrojn, servistojn de dio.

En Aprilo 1955 ĉe Avellino, ĉirkaŭ 50 kilometrojn oriente de Napolo, fulmo trafis preĝejon, plena de adorantoj, MONTORO SUPERIORE, mortigante kvin kaj vundante kvardek adorantojn de dio. Kruela konsekvenco pro manko de fulmo-kondukilo ĉe la preĝejo turo.

Kara leganto. Ĉu tio ne estas klara pruvo, ke simpla kupra drato, metita eĉ per la manoj de nekredulo, estas pli efika kaj valora kontraŭ fulmo ol la misteraj ceremonioj aŭ longaj preĝoj de la tuta kristanaro ! Estas afero ridinda, sed tia estas la fakto.

.-.-.-.-.-. E.W.

---

Relegio estas simila al lampiro, kiu brilas nur en mallumo. G.H.

---

KREMATADO! Por kompletigi la kolekton pri krematadaj aferoj kaj cindrigo, interesatoj estas petataj sendi tian specan materialon al S-ano Bruno Siegert, Esperanto Informejo, Erlangerstr. 31,
FÜRTH/Bay. Germanlando.

PROPONO. Samideanino E. Eneker, Kopenhago, proponas kolekti stampitajn poŝtmarkojn por finance helpi nian kason. Fakulo pri poŝtmarkoj, preta realigi tiun proponon, turnu vin al E. Weichmann.

LA ATEISTA KOVAJ-SISTEMO sub la gvido de S-ano Irwin en SAN FRANCISKO Usono, finis sian laboron. Estas bedaŭrinda fakto, ke redaktoroj de Liberpensulaj gazetoj ne povis vidi la multflankan uzeblecon de raportoj por speciala celo. Ĉiuj penoj de la kunlaborantoj restis senvaloraj, ĉar neniu redaktoro subtenis tiun entreprenon. Sed de Liberpensuloj - Esperantistoj amiko Irwin akceptu merititan laŭdon pro lia sindona laborado.
Do, amiko Irwin, gardu la kuraĝon kaj persistu en via aktiveco. E.A.L. bonvenigas vin kaj vian kunlaboradon.

---

SIDEJO de E.A.L.: ĉe Eduard Weichmann, Lotenkamp 4
Dortmund-Kirchderne, Germanlando.

Reproduktado el "NIA LIBERA OPINIO" permesata.

LA CENTRA LONDONA KLUBO elektis kiel HONORAJN MEMBROJN John Leslie kaj lian edzinon. Ili konatiĝis en tiu klubo en la jaro 1916. Tutkoran gratulon al ambaŭ.

LONDONO. En Grupa Bulteno No.5 - 1956 mi legis:

"Liberpensuloj - humanistoj k.s. ... Okazos la dua kongreso de la IHEU (International Humanist & Ethical Union) en LONDONO, en Julio 1957. Se troviĝas en via grupo tiaj personoj, bonvole sendu iliajn nomojn kaj adresojn al mi en la celo organizi propagandon por Esperanto en tiu kongreso."

Humanistoj en ĉiuj landoj, kiuj decidos ĉeesti tiun Duan kongreson de IHEU, turnu vin al S-ro J. Leslie, 140 Holland Park Avenue, LONDON W. 11

JUBILEO 75 jara. S-ano Josef Burger, Saarlando, estas originalulo en Esperantujo. Li estas arda liberpensulo kaj poeto satira sub pluraj pseŭdonomoj. Al li tutkoran saluton !

50 jarojn per Esperanto por Esperanto povas prezenti veterano en Esperantujo s-ano Ernesto Edvardo Yelland (nask. 19.6.1880 en Devonport, Anglujo) En Majo pleniĝis 50 jaroj de kiam li lernis kaj ekservis Esperanton. Multkolore kaj riĉa je travivaĵoj estis, estas kaj certe estos ankoraŭ sia esperantista vivo en akompano kun sia edzino Theresa Sujadinoff (nask. 26.1.1882 en Poti, Kaŭkazo) Ilia geedziĝo okazis per Esperanto, kaj ankaŭ ilia hejma lingvo estas Esperanto. De multaj jardekoj ambaŭ aktive laboras por la libera penso.
Ni deziras al la estimata jubileulo kaj al lia tre ŝatataedzino ankoraŭ multajn jarojn da komuna vivo en sano, feliĉo, prospero, en ilia Internacia Hejmo Esperantista.

STOCKHOLMO Pro afabla invito de nia sampensulino Else Eneker, Kopenhago, kunvenigi Liberpensulojn-Esperantistojn en sia hejmo, la planita kunveno bone estos solvita. Anoj de nia AMIKARO, kiuj partoprenos la Universalan Kongreson en Kopenhago, nepre kaptu la eblecon en frata atmosfero de liberpensula rondo pritrakti la problemon de Esperanto kaj Liberpenso. Anoncu vin tuj al samideano Bertil ENGLUND, Strömsbro, BOFORS, Svedlando, aŭ al Else ENEKER, Kerstrupvej 62, Valby, KOPENHAGO, Danlando.

Liberpensula gazeto en USONO montras intereson pri Esperanto.
Nova belaspekta liberpensula gazeto aperis en Usono dum majo ĉijare kun titolo THE AMERICAN RATIONALIST. La 32-paĝa, dumonata gazeto ne estas la organo de difinita organizo, sed malfermas siajn paĝojn al ĉiuj liberpensuloj kaj al ĉiuj organizoj iliaj. Koopera grupo de sindonemaj, agemaj liberpensuloj kaj racionalistoj eldonas la gazeton sen persona mongajno. Espereble ĉi tiu gazeto signas novan eraon en la usona liberpensula movado, eraon de renovigita aktiveco, de federado de malnovaj foje apartaj societoj kaj de fondado de novaj grupoj tra la lando.
Internaciema sinteno karakterizas la membrojn de la eldongrupo. Ili simpatias al la celoj de Esperanto kaj deziras iel agnoski la lingvon en sia gazeto. Tiucele, kaj por atentigi kaj interesi la legantojn pri la lingvo, ili planas aperigi en la septembra n-o esp.-lingvan artikoleton kun paralela traduko angla. Petu tiun numeron kiel provnumeron. Oni korespondas esperante. Adreso: The American Rationalist, 2218 St. Louis Ave., St. Louis 6, Mo., Usono.

(el "Sennaciulo" Julio 1956)

# NIA LIBERA OPINIO

PRI RELIGIO SCIENCO KULTURO

N-ro 9 ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ Dec. 1956

PRI LA DEVENO DE HOMO

Pro emo al scio, reala kaj scienca, pri aktualaj temoj, sendube, ĉiu homo, kiu libere pensas, iam okupis aŭ okupos sin ankaŭ je la multe diskutata demando pri la deveno de homo.

Kiu kredas en la, tiel nomata, SANKTA SKRIBO, baldaŭ trovos respondon en la komenco de tiu verko, tio estas, en la unua libro de Moseo, laŭ kiu dio diris: "Lasu nin krei homon en nia bildo, laŭ nia aspekto....." "El argilo Dio formis viron kaj tra la naztruoj enblovis la spiron de la vivo en ĝin."

Kvankam ĉiu kristano devus kredi tiun biblian diron esti pura vero, tamen, mi ne konas iun, kiu blinde kaj senkritike konsentas al tiu infaneca fabelo pri la kreado de homo.

Do, oni devas trovi pli kontentigan kaj pli logikan klarigon de tiu interesa problemo.
Oni pripensu, ĉu la sekvanta informo estas fakto reala.

En Aŭgusto de la nuna jaro okazis en Duseldorfo, Germanlando, granda kongreso de antropologoj, en kiu partoprenis, proksimume, 300 ekspertoj el dek landoj memore al la eltrovo antaŭ cent jaroj de pecoj de skeleto de la neandertala homo. Kelkaj el tiuj ekspertoj kunportis pecojn de skeletoj de prahomoj, kiuj vivis antaŭ cent mil jaroj. Inter tiuj pecoj estis ankaŭ restaĵo de la neandertala homo, kiun la posedanto asekuris por okcent mil germanaj markoj.

En la jaro 1856 en la valo de la rivereto Duselo, proksime de Bonn, D-ro Fuhlrott trovis tiun restaĵon de homa kranio kun ostoj de bestoj el la prehistoria epoko. Ci tiu trovo estis signalo al aro da racie pensantaj homoj serĉi respondon al la nesolvita demando pri la deveno de homo. La eklezia reakcio entreprenis ĉion por silentigi aŭ negravigi tiun aferon, kaj ĝi deklaris, ke la dubo al la biblia teorio pri Adamo kaj Evo estas blasfemo.

Sed la tempo estas senhalta kaj pluraj trovoj okazis.
En la valo de la Dordogne, sudokcidenta Francujo, estas la vilaĝo LE MOUSTIER, kie profesoro D-ro Hermann Klaatsch trovis pecojn de skeleto pli antikva ol tiu de la neandertala homo. Pro tio, ankaŭ la HOMO MOUSTERIENSIS HAUSERI fariĝis fakto.

Ni ne forgesu pri la trovo de prahomo en la minejo "Broken-Hill ", Norda Rodezio, Sud-Afriko. S-ro Eliot Smith, profesoro de prahistorio en la universitato de Londono, deklaris, ke tiu pratipo estas pli antikva ol la neandertala homo, kaj ke ĝi estas malpli antikva ol la PITECANTROPOS, trovita en Java.

Pro politikaj cirkonstancoj la prahistoria tereno en Cinio estas preskaŭ forgesita.
Unu el la plej konataj kaj fruktoportaj esplorlokoj por studado de antropologio, paleantologio kaj arkeologio estas la urbeto TSCHOUKOUTIEN proksime al Pekino. Tie en la jaro 1927 famaj sciencistoj komencis elfosi sisteme la terenon. Multaj skeletoj estis elfositaj, kelkaj en bona stato

La tiea elterigita prahomo estas registrita sub la nomo SINANTHROPUS PEKINENSIS. La sciencaj esploristoj deklaris, ke ĉi tiu pekina homo apartenas al la plej fruaj homoj sur nia planedo, kiuj vivis antaŭ kvarcent mil ĝis kvincent mil jaroj.
Bedaŭrinde la pasinta milito abrupte haltigis tiun sciencan laboron, kaj valoraj trovaĵoj estis perdataj.

Dank'al la racia koncepto de la nova Ĉinio, la esplorlaboro faris grandajn progresojn kaj ni povas esperi, ke novaj eltrovoj en la antropologio estos dokumentoj, kiuj pruvos, ke la homa estaĵo evoluis el si mem dum miloj da jaroj.

Do, ni konsideru ĉiun ekzaktan sciencan esploron esti mejlŝtono sur la vojo de la homo al racia penso anstataŭ la porinfana fabelo pri la kreo de la homo laŭ DIA VORTO.

E.W.

-.-.-.-.-.-.-

"VERON KAJ SAĜON - SED KIAN?"

De tempo al tempo mi ricevas ekzemplerojn el la verkaĵaro de la Esperantista religianaro kaj, kiel rezulto, lastatempe alvenis ĉe mia domo eta belpresita 31-paĝa libro havanta la allogan titolon " LA VOJO DE LA VERO KAJ LA SAĜO". Certe, mi pensis al mi,jen valora posedaĵo!- pro tio, ke en unu malgranda libro oni povas unufoje por ĉiam klarigi al la homaro kiel trovi tiujn juvelojn, kiujn dum jarmiloj la pensemuloj estas serĉintaj kaj ankoraŭ serĉantaj. Tial mi komencis legi sed kion mi trovis?

Nur ĉi-tio, ke la kompilinto aŭ -oj zorgeme kaj laŭmetode aranĝis diversajn elĉerpaĵojn el la Kristana Sankta Biblio tiel, ke li povas pravigi siajn ideojn kaj pri la vivo de la homo nun kaj pri la kredata vivo de la homo postmorte.

Nu, kiel mi diras, mi ĝuste ne scias kiun fakon de la Kristanaro eldonis la libreton ĉar ili modeste ne reklamas la nomon. Tamen, laŭ la doktrina stilo, oni povas sufiĉe facile diveni, ke ĝi fontas el tiu sekto nomita "Kristadelfianoj". Jen aperas en la libreto la rekoneblaj doktrinoj, kiel sekvas.

La ne-erarpoveco de la Biblio kaj la laŭnatura morteco de la homo; senmorteco esti esence kondiĉa afero kaj estonteca, havebla post la releviĝo kaj juĝiĝo kiujn, ili deklaras, okazos post la dua reveno al la tero de Jesuo Kristo kiam sole respondecaj homoj leviĝos el la morto. Ili malakceptas la doktrinojn de la Triuno, de persona superhoma diablo, la turmentoj en la Infero kaj la baptismo de l'infanoj - kredante, ke la subakviĝo de plenaĝuloj estas la vera formo kaj ke tia baptismo estas absolute necesa por saviĝo laŭ Krista instruado. Plue ili kredas, ke tiam, kiam la Kristo revenos por la dua fojo li regados videble super la tuta mondo post ĝia konkeriĝo kaj stariĝos kiel ĉefurbon Jerusalemo.

Do, ĉi-supre mallonga resumo pro la libra enhavo kiu mem dividiĝas inter kvin ĉef-ĉapitroj kun pluraj aldonoj.
Pri ĉio-ĉi, kion povas komenti ordinara liberpensulo ??
Nur tio, ke mi neniam ĉesos miri pri la kredemo kaj imagopovo ekzistanta eĉ en la nuna tempo. Tute ne estas mia intenco mokridi je la sincereco de miaj kunhomoj - kvankam kelkfoje mi honeste ne povas malhelpi min iom rideti pri tio, kio ŝajnas al mi komplete fantazia. Fakte, kompatindaj estas tiuj religianoj kiuj verŝajne ne agnoskas,ke la Vero - kiel brilantan diamanton - havas multajn facetojn.

Sendube, la emocioj de la homo posedas multan forton kaj devas esti la tasko de liberpensulo provi gvidi tiujn emociojn laŭ vojo kiun li opinias plej bona. Tio estas, ke ni ĉiuj estas homaj - estuloj de la Tero senkonsidere pri fikciaj superhomaj kaj supernaturaj estaĵoj kies supozata ekzistado apartenas al la infanaĝo de nia ofte kruela sed plej ofte nobla kaj aminda homspeco.

b.t.

...specco kiun, niaopinio, indas savi - savi de la superstiĉo kaj timo kaj ajn. Fine, do, por via propra informo pri ĉi-tiuj Kristanaj ne-ortodoksaĵoj, mi sugestu al vi, kara leganto, ke vi petu senpagan specimenon rekte de la disdonanto: S-ro. A.H. Broughton, The Square, Gunnislake, Cornwall, Anglujo.

Komprenoble, via reago kaj faro post la tralegado dependas je vi mem. ni ne forgesu, tamen, ke ie, iu prilaboris ĉi-tiun libreton kaj elspezis tempon, monon kaj energion en la produktado.
Ĉu vi mem same vigle laborus iel por antaŭenigi viajn proprajn idealojn ? - mi esperas, ke jes !

VALRANDO.

## AMSTERDAMO.

Okaze de la cent jara jubileo de "DE DAGERAAD" la Nederlanda Liberpensa Movado organizis dum tri tagoj festkunvenojn en Amsterdamo. Partoprenis nia amiko J. Liedermooij kiel reprezentanto de la nederlanda sekcio de nia liberpensa amikaro. Li sendis al ni detalan raporton, kiun ni devis iome mallongigi.

Vendrede la 5an de oktobro 1956 la estraro, delegitoj kaj invititoj kunvenis en agrabla medio en la hotelo "Krasnapolski". La prezidanto, D-ro Noordenbos, skizis la historion de la nederlanda movado kaj la nunan situacion sur tereno liberpensa. La prezidanto de la "Mondunio de Liberpensuloj" S-ano Bradlaugh Bonner en Londono, kiu ne povis veni, estis elektita honora membro de la nederlanda organizaĵo, same kiel la gepioniroj S-ro Sam de Wolf kaj la nuna sekretario (ek de la jaro 1926 ) kiuj sindone multon oferis por la organizaĵo. Post tio, salutleteroj en Esperanto, senditaj al la kongreso de amiko E.Weichmann el Dortmund, B.Siegert el Fürth kaj J.W.Leslie el Londono, estis voĉlegataj kaj aplaŭditaj de la ĉeestantoj.

Ekspozicio de liberpensa materialo, malnova libretoj kaj broŝuroj pri la movado estis vizitita de la kongresanoj.

Sabate la 6an de oktobro 1956 la kongresantoj estis bonvenigitaj de la urbestro kaj kelkaj urbkonsilantoj en la impona urbdomo de Amsterdamo. La prezidanto de "De Dageraad" danke respondis kaj skizis la starigon de la organizaĵo antaŭ cent jaroj en tiu urbo. Ĉiam la ĉefurbo estis revoluciema kaj progresema. Duono de la urbanoj nuntempe estas senreligia aŭ ekster eklezia, ankaŭ socialistema dank' al la propagando de nia movado en tiu urbo.

Forlasinte la konstruaĵon la membroj kaj invititoj boatis tra amsterdamaj kanaloj kaj tra la haveno. En la "Victoria Hotelo" la estraro feste akceptis la ĉeestantojn, venintaj el Nederlando kaj el aliaj landoj. Estis 16 parolintoj, inter ili unu germano kaj unu belgo, kiuj laŭdis la cent jaran laboradon de "DE DAGERAAD". Pro la dolĉa muziko frandaĵoj, fumaĵoj, vinoj, kafo ktp. ĉiuj ĝuis la agrablan atmosferon en la salono.

Dimanĉe, je la 10-a horo en bela kaj feste ornamita salono de "Krasnapolski", okazis la fina festo. Tie paroladis S-ano Kl.Terlaan, Profesoroj Presser kaj J.Romein pri la historio de la liberpenso kaj pri la favoraj aspektoj por niaj ideoj.

Enkadrigita per prezentadoj de baletoj, per belaj kaj fleksaj dancistinoj, kun muziko venis la adiaŭo de la ĉeestantoj kaj la fino de la tritaga festkunveno, kiu estis tre impona kaj bone organizita.

Gazetoj de ĉiuj tendencoj raportis pri la "De Dageraad", kiu troviĝas en la fokuso de la intereso en la tuta Nederlando. Kun freŝa kuraĝo la organizaĵo daŭrigas sian multrilatan laboron por la racialiberpensa ideo.


BELKANTO

---

KORESPONDADO. Se vi volas kontakton letere kun sampensulo, anoncu vin. Ni publikigos vian specialan deziron.

---

# AFRIKO



En la proksimeco de Kilimanĝaro, la plej alta monto de la, tiel nomata, nigra kontinento, estas la urbo Marangu. Tie en la pasinta jaro renkontiĝis en konferenco ĉirkaŭ 150 kristanaj eminentuloj el diversaj partoj de Afriko. Unu Zulua pastro diris:
"A F R I K O   P E R D I S   K R I S T O N !"
En ĉi tiuj vortoj kuŝas la tuta situacio kristana en Afriko.

Ce kunveno de la konsilantaro de la Sudafrika Unio, negra delegito aŭdigis al blankuloj jenan plendon: "Se en Praktiko vi piedpremas la principojn de la adoptita kristana kredo, kia estos la estonteco de blankuloj en ĉi tiu lando aŭ en la tuta Afriko? De vi dependas fari nin fratoj aŭ brutoj. Vi estos respondaj pri la sekvo."

Kia estas la rezulto? Dum du cent jaroj misiistoj penadis konverti negrojn al kristanismo. Malgraŭ ĉiuj penoj, ĉiuj streĉoj estas preskaŭ vanaj.

Multaj blankuloj, kiuj nomas sin kristanoj, semis malamon en la koron de negroj kaj en la teron de tiu granda kontinento.

La tuta kontinento estas en stato de protesto. Malnovaj moroj kaj kutimoj ŝanceliĝas. Negroj sopiras al klerigo, al scio, al ekonomia libereco kaj politika sendependeco.

Kion la kristanaj misiistoj ĝis nun predikadis, la plimulto da negroj jam konsideras tion esti "malnova" kaj nun, havante alian religion, ili opinias, pli kaj pli, ke la kristana kredo estas nur LEGENDO.

Precipe en la nordo de Afriko la kristana eklezio tute ne povas akiri adeptojn. Tie nekristanoj estas nombre sep fojojn pli ol kristanoj. Pro tio oni ne miru, legante la diron de indiĝeno dum tutmonda konferenco de misiistoj: "Dum mia restado en Eŭropo, mi trovis, ke la eŭropanoj plej parte atentas sian bankan aktivon kaj kalkulas siajn monbiletojn, sed ili ne vivas laŭ la instruo de dio "vivanta".

El la Ministrejo en Londono por britaj kolonioj venis la sekvanta maltrankviliga informo. Laŭ ĝi sur britaj teritorioj de Kenjo, Rodezio, Tanganjiko kaj Njasalando evoluas nova religia sekto, kondukata de nigra pastrino Lenŝina Mulengo. Jam dum kelka tempo sinjorino Lenŝina Mulengo iradas de vilaĝo al vilaĝo batalante kontraŭ la kristanismo. Si instruas, ke ekzistas du dioj, unu blanka kaj unu nigra, sed ke nur la nigra dio estas la ĝusta.

En la misiejoj de la blankuloj oni konstatas, ke grade aro da negroj forlasas la kristanan kredon kaj adoras la dion de la pastrino Mulengo. Dum diservoj ŝi deklaras, ke la blanka dio de kristanoj ne estas dio, sed estas agento de la malbono.

Oni povas vere diri: kion kristanoj semis, tion ili rikoltas.

E.W.

+++ === +++ === +++

## PRIPENSAJO

Se kristanoj fakte estus
bonaj homoj nun en vero,
ne nur vorte sed per faroj,
estus paradiz' la tero!

Sed se foje kristaneco
vivis homo per la faro,
pro la glor' de l'blanka korvo
festas tuta kredularo!

Cu ni povas pace vivi nur sub Wittenberg' aŭ Romo?
Certe ne, ĉar sen Biblio vivas brave kelka homo!

J.BURGER

BRITUJO. Du cirkuleroj, eldonitaj de amiko Dickinson, 21 Gribble Road, LIVERPOOL, lo, detale pritraktas la planon starigi memstaran organizon de liberpensuloj, ateistoj, humanistoj kaj similaj en brita sekcio. Ni esperu, ke niaj agemaj britaj kamaradoj sukcesos.

Post ilia kunveno en Januaro 1957, eble, ni aŭdos pri la rezulto de ilia laboro. Ni sekvas la agadon de niaj britaj amikoj kaj ni esperas, ke ili estos fruktodona laboro por nia komuna strebado al libereco de la penso.

... 000 ...

ESPERANTO EN BRITA GAZETO. La konstanta apero de valoraj kaj klerigaj artikoloj en Esperanta rubriko de THE SOCIALIST LEADER, meritas nian atenton, precipe pro temoj, kiuj estas en akordo kun nia pensmaniero. Por pruvi la praktikan valoron de nia komuna lingvo ESPERANTO kaj por kuraĝigi la redakcion daŭrigi la presadon de tiaj artikoloj, estas rekomendinde sendi gratulajn leterojn aŭ poŝtkartojn al la redakcio de THE SOCIALIST LEADER, 48, Dundas Street,
GLASGOW C.1, BRITLANDO.

- ::: === ::: -

En THE AMERICAN RATIONALIST, 2218 St. Louis Avenue, St. LOUIS 6. Missouri, USA., la parte ilustrita organo, en septembra numero aperas instrua priskribo de ESPERANTO en angla lingvo. Krom tio, sur tuta paĝo, oni presis artikolon en nia lingvo internacia kun angla traduko.

:: ++--++ ::

Pri ESPERANTO en rilato al UNESCO skribis "FREE MIND" la bulteno de AMERICAN HUMANIST ASSOCIATION, Yellow Springs, Ohio, USA.

... --- ...

Ni elkore deziras ĉion bonan al nia sampenulo Emilo Gasse, LE HAVRE, kiu en la 26a de Oktobro 1957 atingis sian 75-jarecon.
En Esperantujo li estas bonkonata pioniro kun pli ol 50-jara membreco.

.-. =_= .-.

Kelkaj amikoj propravole sendis monon aŭ Internaciajn Respondkuponojn por tiamaniere fortigi nian laborpovon.
Pro nia idealeco nenia kotizo estas fiksita aŭ petata. Ni ankaŭ nenion postulas, tamen ĉiu estu konscia, ke por plenumi ĉiujn taskojn nepre estas bezonata kontribuo de ĉiu.
Dankon al ĉiuj donacintoj.

"".."".."".."".."

Atentu!
Lastamomente min atingis ekzemplero de la tria apero de la cirkulero kun la grava propono, ke la INAŬGURA KUNVENO okazu en Londono je la lasta Dimanĉo de Januaro 1957, t,e, je 27 Januaro, la dek kvinan horon.
Ĉiujn demandojn, proponojn k.s., kiuj rilatas al la inaŭgura kunveno, bonvole sendu al amiko Dickinson.

===========================================================

Estas kompatinde vidi, kiel la homoj avidas miraklojn, nur por ke ili ne ĉesigu siajn sensencaĵojn kaj naivegaĵojn kaj por ke ili kontraŭu la suverenecon de la homa intelekto kaj racio.
(GOETHE)

===========================================================

Reprodukto permesata, sed oni bonvole sendu unu ekzempleron de la gazeto ktp, en kiu iu aperas el N.L.O., al la sidejo.

-----------------------------------------------------------

Sidejo de la ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ ĉe:
Eduard Weichmann, Dortmund-Kirchderne, Lotenkamp 4, Germanlando

# NIA LIBERA OPINIO

PRI RELIGIO SCIENCO KULTURO

N-ro 10 ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ Printempo 1957

## B R I T L A N D O



La 27an de Januaro, 1957, fondiĝis la BRITA LIBERPENSULA ESPERANTISTA ASOCIO (BLEA). El 11 kiuj promesis ĉeesti la INAŬGURAN KUNVENON, 9 fakte ĉeestis.

Post mallonga klariga parolado de du partoprenintoj pri la evoluo de la ideo fondi la asocion, jam de Majo, 1954, la kunveno elektis S-ron Frank Thurgood prezidanto de la kunsido.

Unue oni akceptis la proponon pri la fondiĝo. El 35 al kiuj oni skribis antaŭ la kunveno 32 perletere konsentis subteni la proponon. Inter la 32 oni rimarkis, kun ĝojo kaj kontento, la nomojn de pluraj bonekonataj kaj altnivelaj Esperantistoj.

Post diskutado kaj voĉdonado inter alie oni konsentis jenon:

La nomo de la Asocio estas BRITA LIBERPENSULA ESPERANTISTA ASOCIO.

Ĝi estas Brita organizaĵo, kies sekretario estas civitano de Britujo kaj loĝas en tiu lando.

La celoj de la Asocio estas (i) disvastigi la scion pri kaj la lernon de Esperanto en la vicoj de liberpensuloj, humanistoj, racionalistoj, ateistoj kaj similaj personoj, en Britujo, kaj (ii) disvastigi la scion kaj komprenon pri la liberpensismo kaj parencaj ismoj inter la Esperantistaro laŭ la normalaj ĝentilaj metodoj de la propagando, t.e., sen ofendo al iuj.

Pri la politiko, raso, klaso, k.s., de la individuaj membroj de Asocio, la Asocio, estas neŭtrala.

La Asocio ne apartenas al, kaj ne apartenos al, kiu ajn aparta politika partio aŭ politika partia programo.

Ke la BLEA filiiĝu al ETHICAL UNIO (ETIKA UNUIGO)

Sidejo, Sekretario-Kasisto: G.L.Dickinson
21 Gribble Road,LIVERPOOL - 10

NOTO: La novfondita Brita Liberpensula Esperantista Asocio kaj la Esperanto-Amikaro de Liberpensuloj staras en bonharmonia kaj amika kontakto.

:::===:::

Kvankam nerapide, tamen vi iru, neniam haltante; ignoru la ridon, insulton, grincadon; ĉar mensoj provincaj vin ĉiam ĉirkaŭos, mokante pensulon ĉiam pli alten grimpanta.

ALBERTO TOETNEL

LA INTERNACIA HUMANISTA KAJ ETIKA UNUIĜO
kongresos en CONWAY HALL, LONDONO, Julio 26-31, 1957.

Je la unua Kongreso en Amsterdamo en 1952 la fondintaj organizaĵoj (la Amerika Etika Unuiĝo, la Amerika Humanista Asocio, la Brita Etika Unuiĝo, la Etika Societo de Vieno, la Humanista Ligo de Belgujo, la Humanista Ligo de Nederlando, kaj la Radikala Humanista Movado de Hindujo) bazis kaj deklaris bazita sian Unuiĝon sur la humanismo, en la senco de respekto por la homoj kaj de homa respondeco por etikaj, sciencaj kaj demokrataj normoj kaj valoroj.

Je sia Dua Kongreso, ĉi tiuj membro-organizaĵoj kaj aliaj poste filiiĝintaj (en Japanujo, Norvegujo, Sud-Afriko) pridiskutos problemojn religiajn kaj filozofiajn samtempe kun la demando pri sia organizado kaj celo.

La Internacia Humanista kaj Etika Unuiĝo parolas por multe pli da homoj en la moderna mondo ol kiom estas enkalkulitaj en ĝiaj membro-organizaĵoj, kiam ĝi proklamas la esencan solidarecon de la homaro kaj penas efektivigi tiun fidon. Je tiu celo, kaj tute ne kontraŭante la liberecon de ĉiuj konvinkoj, ĝi deziras unuigi ĉiujn, kiuj sentas sin solaj, pro tio, ke sekve de siaj kredoj ili troviĝas ekster la kadro de la historiaj religioj kaj tamen sopiras je signifoplena ekzistado. IHEU proponas al ili ĉi tiun celon, por ke ili trovu forton en unuiĝo kaj kuraĝon en komuna sindediĉo.

PROGRAMO kaj ARANĜOJ

Tuttagaj programoj kaj aranĝoj, prelegoj kaj diskutoj pri la temoj de la FILOZOFIO, PERSONA VIVO KAJ SOCIA VIVO garantios al ĉiuj kongres-partoprenantoj krom agrablajn travivaĵojn spiritan profiton.

INVITO

Oni invitas unuopulojn aŭ grupojn. Kiuj deziras ĉeesti la Kongreson skribi al

Stanton Coit House, 13 Prince of Wales Terrace,
L o n d o n , W 8

Oni povas ricevi detalajn sciigojn ĉe la Sekretariejo:

I H E U, Inc.
Secretariat: 152 Oudegracht
UTRECHT, Nederlando.

Propagandcele, ankaŭ Esperantistoj intencas entrepreni ion, por montri al la publikeco la praktikan valoron de nia komuna lingvo-Esperanto.
Sampensantoj eltutmonda, kiuj fakte partoprenos la okazaĵon , pri tio skribu al:

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION
140, Holland Park Avenue, LONDON, W.11

...--...

DU M I R A K L O J

Sinjoro Henry van Pee, loĝanta en Bordoo, Francio, deklaris al ĵurnalistoj, ke, antaŭ du vesperoj kiam li estis en Lourdes, la Virgulino aperis al li kaj komisiis al li fondi armeon por Kristo kaj grandan ĵurnalon. Li aldonis, ke li jam sendis telegramon al la Papo por informi lin pri tiu miraklo.

Sinjoro van Pee, desegnisto kaj eldonisto, estas alte estimata en Bordoo. Li diris, ke li iras ofte al Lourdes, sed neniam antaŭe li estis atestanto de iu aperaĵo.

El NICE-MATIN 3/1/1957

Noto de la tradukinto. Strange estas, ke lastan nokton la Virgulino klare flustris en mian dekstran orelon, ke la ĵurnalistoj ellasis la sciigon, ke ŝi parolis al S-ro van Pee en ESPERANTO, insistante, ke la granda ĵurnalo estu en la internacia lingvo Esperanto. Vere sensacia propagando.

TORĈO

KRISTANA INSTRUO BANKROTA

La kristanismo ne povus antaŭeniri tiel triumfe, se ne estus mizero en kiu la popoloj vivis. Pro sufero estis mistika bezono trovi kompenson tuj.

Sama stato estis ĉe la"NaZi" al kiu la granda profeto Hitler promesis pacon dum mil jaroj.

Kaj la profetoj eraris. Ne ekzistas paco, neniu estas savita, homoj restas ankoraŭ tre malproksimaj ami unu la alian; Anstataŭ tio ili daŭre ekspluatas unu la alian.
Tio estas pruvo, ke maksimoj estas bankrotaj. Nur faktoj estas la vero.

Kio estas pli klara ol "amu unu la alian","pardonu al viaj malamikoj", "pardonu ofendojn"....... kaj kia estas la efiko de ĉio tio? Ondo de sovaĝeco, freneza ekstermado, neestingebla malamo de homo kontraŭ homo. La multe propagandita "amo kristana" nenion pardonis, kaj la plej fanatikuloj bruligis siajn homfratojn en Jesuo Kristo, por savi ilin.

IX IGREC
la revuo "l'Unique" Francio

EL SVEDLANDO mi ricevis poŝtmarkon, sur kiu la "SACNTA BIRGITTA" estas eternigita. Probable, la sankta persono estas identa kun la bonkonata "SANKTA BRIGITO" el Svedlando, kiu diris:

"La papo estas murdisto de animoj, li ruinigas kaj disŝiras la aron de Kristo, li estas pli kruela ol Judaso, pli maljusta ol Pilato.... Li ŝanĝis ĉiujn dek bibliajn leĝojn (la dekalogon) en unu sola: monon donu! En Romo troviĝas infero, kie la diablo kiel ĉefo de ĉiuj avaruloj sidas sur la trono kaj vendas la trezorojn de Kristo, kiujn tiu ĉi akiris per siaj suferoj. La papo kaj liaj pastroj estas pli multe la antaŭuloj de la Kontraŭ-Kristo ol la servoj de Kristo.... La pastroj ne plu legas en la libro de Dio, sed en la libro de mondeco. Ili estas kovritaj per la lepro de aroganteco kaj profitemo de la kapoj ĝis la piedoj. La saĝeco de Dio al ili estas malsaĝeco, la zorgo pri la animoj fabelo.

(Episkopo Hefele de Rottenburgo.
Historio de la ekleziaj konsiliĝoj. VI,pĝ. 615)

ooo-OOO-ooo

SVEDIO LAŬDINDA

Mi jenon vidis en Svedio: La pstroj de la sveda Dio
semajne devas en kontoro okupi sin pri ŝtatlaboro.
Car tie la popol-publiko asertas, ke dimanĉprediko
de pastro aŭ de diakono ja ne sufiĉas por la mono
salajra, kiun en monato ĉiel-agentojn pagas ŝtato.
Kaj krome, diras sama kredo, ĉi tio estas bonrimedo
por teni for de l'politiko la pastrojn per labor-praktiko.

Ce ni en klera Germanio favoras pastrojn milda Dio!

JESOF BURGER

.-.-.

Kelkaj preĝas al Madona,
Aliaj al Paŭl kaj Petro;
Mi, sed mi nur volas preĝi
Nur al vi, vi bela suno!

Al mi kisojn, ĝuojn donu,
Estu kora kaj favora!
Plej bela suno inter knabinoj,
Plej bela knabino sub la suno


HEINRICH HEINE
tradukita de E.Preibisch

---

ĉiuj dioj estas eltrovitaj kaj jam ne forigitaj,
ĉar ili kun profit' ligitaj.

KASTELANO

EL NIA LETERKESTO



Estimata liberpensa frato!   BOMBAY, 26-XI-1o56

Post mia hieraŭa reveno el NEPALO (ŝtato en Himalujo) kie mi partoprenis kiel ĉefdelegito de la BUDHANA LIGO ESPERANTISTA kies prezidanto mi estas, la 4-an Mondkongreson de la Budhana Frataro. Delegitoj el 32 landoj partoprenis kaj almenaŭ kvin sciis Esperanton. La kongreso mem estis granda sukceso por nia movado. Notinde estas, ke en la rezolucio de la Kongres-komitato por publikigo kaj propagando Esperanto estas rekonata kiel taŭga lingvo por la disvastigo de Budhismo en landoj kiuj havas speciale lingvajn malfacilaĵojn. La kongreso daŭris dum semajno en la ĉefurbo de Nepalo. La reĝo kaj reĝino estis la patronoj. Eĉ Sovjetio kaj Ruĝĉinio estis je la unuafoje oficiale reprezentitaj per budhanaj abatoj.

La liberpensuloj en la tuta mondo devas ekkompreni, ke pura BUDHISMO estas nio alia ol liberpensul-ismo kaj la Budho mem devas servi kiel idealo al ĉiu liberpensulo! Nepre estas urĝa neceso, ke la tutmondaj liberpensuloj kunlaboru kun ĉiuj raciaj budhanoj.

.........          via liberpensa ANURUDDHA

NOTO: Tiu ĉi letero, el la plumo de budhana abato, parolas por si mem kaj prezentas favoran perspektivon en la strebado al RACIO KAJ LIBERA PENSADO.

KORESPONDI DEZIRAS:
Jan Liedermooj, St. Camer 76, DE BILT (U), Nederlando, kun samideanoj en Sud-Ameriko.
S-rino Lena Wessel, TÜBINGEN, Hechingerstrasse 33, Germanlando.
Mi ŝatus korespondi kun klera, memrespondeca sampensulo maljuna; vere min interesus la opinio de matura, sufiĉe lerninta persono.

..ooOO-OOoo..

Bruligi vivantajn homojn estas bonfaro; bruligi homajn kadavrojn estas abomenaĵo!?   (FRIEDRICH ERNST)
Liberpensuloj, tian opinion havas multaj pastroj se oni deziras diskuti la agojn -dum mezepoko- faritajn kontraŭ malamikoj de la sankta eklezio! Mi ektuŝas la problemon "KREMACIO". Skribu vian opinion aŭ demandojn pri la nomita temo al: Bruno Siegert Marienstrasse 32, FÜRTH/Bay. Germanlando.

"="="="="

EL NIA AMIKARO
Dankon al ĉiuj donacintoj, kiuj prepravole sendis monon aŭ Intern. Respondkuponojn, por tiamaniere fortigi nian laborpovon.

Dankon al ĉiuj sendintoj da artikoloj, informoj, poŝtkartoj, leteroj, gazetoj ĵurnaloj kaj alia materialo.
Pro trosarĝo, momente ne eblas respondi kaj danki al ĉiu individue.

Sidejo de la AMIKARO: Eduard Weichmann, Lotenkamp 4,
DORTMUND-KIRCHDERNE, Germanlando

Delegito en Nederlanda Sekcio: Jan Liedermooj, St.Camer 76,
DE BILT (U), Nederlando.
Delegito en Finnlanda Sekcio: Erkki Järkäs, Sotkankatu 15
TAMPERE, Finnlando
Delegitoj en aliaj landoj estas serĉataj.

---

Reprodukto estas permesata sen kondiĉo, sed, se eble, oni b.v. informu la Sidejon pri farita reprodukto.

---

# NIA LIBERA OPINIO

Numero 11

SOMERA ELDONO 1957

INFORMILO DE LA

ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ

P O R   R A C I O   P E R   L I B E R A   P E N S A D O

## LA LIBERECO DE KONSCIENCO

Depost la tempo kiam la homo konsciiĝis pri sia ekzistado, kiam la homo komprenis ke li estas racihava estaĵo, li deziris kompreni la signifon de vivo kaj morto.

Ekekzistis religioj, unue tre simplaj, poste malpli simplaj, kiuj klopodis kontentigi la sciemon de la homoj. La estroj de la religioj pli kaj pli influis la pensadon de la homoj, ili kreis dogmojn kaj postulis kredon. Samtempe ekestis diversaj religioj kaj ĉiu religio deklaris ke ĝi nur posedas la VERON kaj komdamnis la dogmojn de la aliaj religioj. La propra kredo estis sankta kaj la kredo de la aliaj estis superstiĉo, sakreligio kaj idolkulto.

Cu la religio solvis kaj solvos la problemon per ĝiaj dogmoj? Tute ne. Nur per aŭtonoma pensado, kiun Spinoza nomis nian plej altan doton kaj Kant nomis la plej altan bonon sur la tero, ni sukcesos doni al la popoloj la deziratan harmonian vivon.

La libereco de konscienco por ĉiuj kreos la kondiĉojn sub kiuj ĉiuj homoj povos feliĉe vivi.
La postulon, "libereco de konscienco" ni ŝuldas al la deistaj kaj panteistaj filozofoj de la 17a akj 18a jarcento.

Spinoza en sia "Tractatus theologico politicus"(teologia politika traktato) aperinta en 1670, postulis ne nur la religian toleremon sed ankaŭ la rajton esprimi libere opiniojn. La batalo por tiu idealo estis tre danĝera por la batalintoj, ili ofte riskis iliajn vivojn. Sen iliaj instruoj kaj oferemo la mondo ne estus progresinta.

Ĉiu progresema homo devas interesiĝi pri la vivo de la batalintoj por la liberigo de la konscienco. Unu el la herooj, kiu liberigis la racion el la sklaveco estas la italo Giordano Bruno.Li naskiĝis en 1548 en Casa di San Paolo, antaŭurbo de Nola.Liaj gepatroj estis malriĉaj do ne havis la monon por intelekta eduko. 15-jara li monaĥiĝis kaj fariĝis Dominikano. Sed la filozofia talento konfliktis kun la tiamaj ideoj. Post detala konsidero li, en la jaro 1576, fuĝis el la monaĥejo.Li serĉis lokon en diversaj nord-italaj urboj sed en niu itala urbo li estis ekster danĝera. Li iris al Genéve, la urbo de Kalvino. Oni tre bonvenigis la apostaton sed li ne povis ŝati la limigitan kaj mondmalkonfesantan Kalvinismon. Li foriris al Toulouze, al Parizo, al Londono. Cie li faris lekciojn, ĉie li estis aplaŭdita. En Londono, en la lando de Reĝino Elizabeth kaj Shakespeare li estis akceptita en delikata aristokrata sfero. Tie li skribis siajn plej bonajn verkojn.

La dualismo de la Skolastikoj, kiu disigis teron kaj ĉielon, Dion kaj homon, bonon kaj malbonon, puron kaj malpuron, ne kontentigis Bruno`n. Li fariĝis monisto. Pri la universo li skribis:

"Ĝi ne estas kreita ĉar ne ekzistas alia esto, ĝi mem posedas ĉian eston. Ĝi ne pereas ĉar ne ekzistas io alia en kiu ĝi povus perdiĝi, ĝi ne povas malpliiĝi nek pliiĝi ĉar ĝi estas infinito, ĝi ne estas mezurebla kaj ne mezuras."

Li estis infano de la sunplena sudo kaj forlasis la nebulan nordon. Li transloĝis al Parizo. Li defendis la tezon ke la suno estas la centra astro de nia planedaro. Sed vane li batalis kontraŭ multcentjara tradicio.
Li iris al Wittenberg, Al Prago, al Helmstadt, al Frankfurt. Cie mallonge daŭra admiro kaj poste mema malkvieteco aŭ malamikaj aŭtoritatuloj pelis lin antaŭen.

Juna itala nobelo invitis lin por doni instruon. Bruno akceptis tiun oficon, verŝajne la sunplena Italio logis lin. Sed post mallonga tempo la nobelo sentis sin seniluziiĝita kaj denuncis lin laŭ konsilo de sia konfesprenanto. Bruno estis arestita al Romo. Li restis en la malliberejo dum 7 jaroj. La 9-an de Februaro 1600a la inkvizicio juĝis lin. Li estis ekskomunikita kaj transdonita al la neeklezia juĝisto kun la afabla peto puni lin milde kaj sen verŝado de sango. Tio signifis la morton sur la brulŝtiparo.

La 17-an de februaro 1600a oni punbruligis lin sur la Campo di Fiore. En 1889 oni starigis, sur la sama placo kie iam staris la brulŝtiparo, mamorstatuon de Bruno, pagitan de civilizitaj homoj el la tuta mondo.

Es. Nederlando.

---

LA RELIGIO KOMENCAS TIE, KIE LA RACIO FINAS.

---

## EL LA ARĤIVO DE ROMO



Tiuj faktoj, raportitaj en la "Revue corporative de l'enseignement primaire" (Korporacia revuo de la unuagrada instruado) N-ro 14, 23a de decembro 1906, okazis antaŭ pli ol kvindek jaroj, en Bretonio, kaj konsistigas episodon de la batalado de la katolika lernejo kontraŭ la neŭtrala, nereligia ŝtata lernejo, tiel nomata laika. Jen, kion rakontas la artikolo en tiu revuo:

" Mo ustoir Ac (Mustŭar-Ak)-Morbihan, estas bretona komunumeto, kie la katolika pastraro regas super fanatikaj popolamasoj.
Tie, la laika lernejo estas "la domo de la diablo", sekve nepre detruenda. La religiema, t.n. "libera" lernejo, la "domo de Dio" invitas siajn anojn al tiu sankta tasko.
Iam la lernantoj de la religiema lernejo ok tagojn manifestaciis kontraŭ la laika instruistoj. La skandalo fariĝis tia, ke la ĝendarmoj devis interveni. La juĝopovo enketis ... formale ...
La tagon de la remalfermo de la laika lernejo, tiuj samaj lernantoj de la"libera" lernejo persekutis, insultis, eĉ batis la malfeliĉajn knabetojn de la "laika". Duafoje la alvokitaj ĝendarmoj intervenis, kaj la juĝopovo enketis ... formale ...
La nepuniteco ŝajnis tiam certigita, kaj la atakoj kontraŭ la laika lernejo povis, fariĝi pli rektaj.
Iunokte la senditaj de la homoj de Dio eniris la korton de la lernejo. Per penikoj, trempitaj en gudron, ili desegnis grandegajn surskribojn sur la fasado. Sur la unua etaĝo legiĝis, skribite per sepdek centimetrojn altaj literoj: Skol er framasoned (lernejo de la framasonoj) Vivu Dio, eĉ grandega triangulo entenanta okulon, kun la vortoj: Lagad en Diaoul (lernejo de la diablo), sur la muroj, sur la fenestroŝirmiloj, triangulaj signoj, malĉastaj vortoj kontraŭ la lernejo kaj la instruistoj.

La aĉuloj daŭrigis sian taskon interne de la lernejo, kien ili eniris, rompinte la vitrojn. La murtabeloj kun la Deklaracio pri la Homaj rajtoj, la portretoj de la respublikestroj estis makulitaj per gudro. Ĉe la muroj, fronte al la sidlokoj de la lernantoj, detruitaj estis la nigra tabulo kaj la geografiaj kartoj, kaj iu desegnis grandan krucon kun la vortoj: Vivu Jesuo Kristo. Ĉie troviĝis grandaj trianguloj, signoj △ eĉ sur la skribotablo de la instruisto.

Triafoje la ĝendarmoj konstatis la delikton. Triafoje la juĝopovo enketis.
Fine iun merkredon, la bonanima pastro respondeca pri la "libera" lernejo kondukis la lernantojn al la promenado: ĉiuj portis dikajn bastonojn kaj blekis batalkanton. Antaŭ la laika lernejo, pli laŭta fariĝis la kanto kaj unumove leviĝis la bastonoj kontraŭ la "malbenita" konstruaĵo, ĉe kies muroj estis ankoraŭ videblaj la surskriboj kaj la trianguloj ...

Bone atentu, ke tiuj faktoj okazis en 1906, antaŭ nur kvindekunu jaroj. Estus interese scii, ĉu de tiam la mensoj evoluis ...

(El ORA ULEKSO, N-ro 53, Aprilo 1957) Romo.
havebla ĉe S-ro M.OME, el Brive (Corréze)
5 rue Rabelais, RENNES, Francl ando.

... --- ... --- ... --- ... --- ... --- ... --- ... --- ... --- ... ---

ILUZIO PRI SORĈISTINOJ EN 1957

Progresema homo emas konjekti, ke la kredo al sorĉistinoj apartenas al mezepoko aŭ, ke ili estas materialo nur en fabeloj por infanoj. Tamen, oni devas miri, ke homoj plenkreskaj denove de tempo al tempo revivigas tiun ridindan temon de la stulta tempo pri sorĉistinoj.

Jen unu el multaj, kiu, laŭ taga gazeto, okazis en Oberergoldsbach,antaŭ la pordoj de Munkeno, Germanlando.

Posedanto de valora bieno sin sentis persekutata de sorĉistino. Pro tiu imago li ne faris ian laboron en bieno kaj kampo. Pro superreligiemo la nervoj de tiu bedaŭrinda viktimo malsaniĝis kaj fine li forkuris de la mistera loko.
La najbaroj ankaŭ evitis alproksimiĝi al la koncerna posedaĵo, asertante, ke tie fantomo furiozas. Rezulto de tiu afero estas, ke oni tute detruis kaj bruligis la bienon.

NOTO: Ni ne multe miru pri tio; ĉu kredo al sorĉistino aŭ al dio aŭ al diablo aŭ al anĝeloj k.s., en okuloj de liberpensaj kaj racipensantaj homoj kiu ajn kredo ĝi estas same absurda. Antaŭ centoj da jaroj la kristanaro kredis forte pri ekzisto de sorĉistinoj; hodiaŭ ili ridetas kaj skuas la kapon pri tio kaj.... iam estonte ili ridetos pri ĉiu kredo de homoj al ĉielaj estaĵoj kaj konsideros tion.
ED.ŬO

=== """ === """ === """ === """ === """ === """

REKORDO EN NUNTEMPA GERMANLANDO

Pasintan jaron, je ĉiu tria tago estis finkonstruita eklezia konstruaĵo en la ĉefdiocese Köln (Kolonjo); je ĉiu dua semajno rekonstruita estis malnova aŭ finkonstruita nova preĝejo. Malgraŭ tio, en ĉi tiu Dioceso devos esti novkonstruitaj aŭ plivastigitaj 275 preĝejoj katolikaj.

:=:=:=:=:

GERMANLANDO
Sodatoj de la nova germana federacia armeo, okaze de la relegia festo de Kristokorpo, en Munkeno ĉe procesio akompanis la baldakenon kiu tronis super ĉefepiskopo kardinalo Wendel.

...ooo...

Ĉie, kie brilas generalo certe ankaŭ ombras kardinalo!
Josef Burger




Sub la konstanta kontrolo kaj observado de astronomoj per modernaj teleskopoj staras la - por niaj okuloj - senlima spaco de la Universo.
La jaro 1956, por astronomoj estis tre abunda. Okazis du suneklipsoj kaj du luneklipsoj, kaj oni malkovris ok kometojn. Sed la plej granda sensacio astronomia estis la irado de la planedo de Marso en la proksimo de nia tero, kiu en Septembro atingis distancon de nur 56,5 milionoj da kilometroj. La plej granda distanco inter la tero kaj Marso estas ĉirkaŭ 397 milionoj da kilometroj.
Pro la tre favora cirkonstanco la teleskopoj de astronomoj direktiĝis al tiu planedo. La sciencistoj nepre volas senvualigi la t.n. sekretojn pri Marskanaloj kaj krom tio konstati ĉu vivo estas ebla sur nia najbara planedo.

::++::++::++

EL MIA NOTLIBRO

En niĉo de la Panteono en INTERNACIA ESPERANTO MUZEO WIEN estas eternigita la ESPERANTO -AMIKARO DE LIBERPENSULOJ pro dumviva membreco al I.E.M.W. Krom tio la AMIKARO donacis al I.E.M.W. 12 int. poŝtrespondkuponojn por ZAMENHOF-MONUMENTO, starigota en Wien 1958.

En VAPAA AJATTELIJA, n-ro 3/57, la ĉiumonata revuo de la LIBERPENSULA LIGO en Finnlando, la regularo pri Esperanto - Amikaro de Liberpensuloj estis presata en Esperanto.

Pri la fondiĝo de la Liberpensula Asocio Esperantista en Britlando skribas la "DER FREIDENKER" en konstanta esperanta kolono.
La organo, aperanta ĉiumonate, estas tre rekomendinda al ĉiu liberpensanto, scipovanta la germanan lingvon. Interesuloj skribu en Esperanto al la redaktoro, s-ro Hubert Freistühler, Lichtendorferstr. 51, SCHWERTE/RUHR, Germanlando.

THE BRITISH ESPERANTIST, 4/57, mencias la fondiĝon de BRITA LIBERPENSULA ESPERANTISTA ASOCIO. Sekretario:S-ro G.L. Dickinson, 21, Gribble Road, LIVERPOOL, 10.

En artikolo, "PENSOJ CE FONDIGO DE B.L.E.A.", amiko VALRANDO tre bone priskribas la nepran neceson de Esperanto en la servo de la Humanismo kaj Libera Pensado. La sama artikolo estas reproduktita en: THE SOCIALIST LEADER, 48 Dundas street, GLASGOW, C.I., Britlando.

Pola liberpensa mitologo kaj religiolo serĉas eldoniston germanlingvan por sia scienca verko "ASTRALISTIK DER BIBEL" kaj KATALOG DER ASTRALOGERNATEN, 291 paĝoj po 28 linioj. Artikoloj pri la temo: ASTRALISTIKO EN LA BIBLIO" dufoje aperis en la germanlingva organo "DER FREIDENKER"
Tiu, kiu povas helpi solvi la eldonistan problemon, skribu al: D-ro Antoni Czubrynski, Dziekanow Lesny 33, poczta w Lomiankach kolo WARSZAWA, Pollando.

Kiel Parolilo de ĉiuj Liberpensuloj Esperantistoj aperas LA LIBERPENSULO numero 5. Redakcio: Andreo G a y , Rue Lambert-Dumesnil,(S&O) HERBLAY, Franclando. Abonprezo: 100 Fr.Fr. 10 numeroj.
Andreo Gay, danke mi kvitancas la Parolilojn LA LIBERPENSULO n-ro 5. En NIA LIBERA OPNIO n-ro 12 aperos respondon pri la temo: krei komunan bazon por ĉiuj Liberpensantoj kaj pri la plano: unuigi la bultenojn LA LIBERPENSULO kaj NIA LIBERA OPINIO.

E.W.

Geamikoj Humanistoj atentu!

Jam en printempa eldono de NIA LIBERA OPINIO aperis noto pri Kongreso de la INTERNACIA HUMANISTA ETIKA UNUIGO (I H E U ), okazonta en Londono, 26 an ĝis la 31a de Julio 1957. Fakte, tie ĉeestos liberpensuloj Esperantistoj, celantaj pruvi la utilecon de nia lingvo - Esperanto - en interpopola rilato. Por pli certigi nian propagandan agadon, ni atendas, ke s-anoj en diversaj regionoj sendos salutleterojn aŭ kartojn. Skribu multnombre al la kongresa sekretario:Stanton Coit House, 13 Prince of Wales Terrace, LONDON, W8

MONDUNIO DE LIBERPENSULOJ

Al ni liberpensaj Esperantistoj denove estos favora okazo altiri la atenton de la estraro de la MONDUNIO pri la internacia komprenigilo Esperanto.Cu estonte oni rajtos uzi Esperanton same kiel la lingvojn anglan, francan kaj germanan en kongresoj de la MONDUNIO DE LIBERPENSULOJ. Ĉio absolute depandas nur de nia propra aktiveco. Pri tiu temo aktivaj membroj de ESPERANTO -AMIKARO DE LIBERPENSULOJ estas petataj kontakti senprokraste kun siaj landaj Liberpensaj organizaĵoj. Deziresprimoj tiurilataj estu sendotaj abunde al la sekretarino de la MONDUNIO, S-rino Henriette Pardon, Rue de Parc (Parkstrato) 228, LOUVAIN (Leuven) Belgio.

La internacia Kongreso de la MONDUNIO okazos de 6-10 Septembro en PARIS ( Salle Saulnier Paris IX )

---

Al la Nederlanda Sekcio de la Amikaro, dankon pro la bondeziroj, aperintaj en Cirkulero de Majo, okaze de mia restado en Kliniko pro militvundo. E.W.

---

Deziras korespondi: S-ano F.P.Jansen, Overleek 18, MONNIKKENDAM, Nederlando, kun angla aŭ usona sampensulo pri liberpensaj temoj.

---

Van Dam, Nederlando, ni dankas pro la senditaj maŝin-manuskriptoj, ilin mi uzos en N.L.O. poste.

Interesuloj pri INTERSTENO skribu al: TUTMONDA INTERSTENO-ASOCIO, S-ano C.Daglio, Litta parodi , ALESSANDRIA, Italujo.

SCIENCA KAJ TEKNIKA TERMINARO -STT - nun estas preta kaj havebla ĉe landaj Esperanto-Asocioj.

Bruno Siegert, Marienstrasse 32, FÜRTH /BAY. Germanlando,kolektas materialon pri Kremacio. Danke ni kvitancas la gazeto-eltransaĵojn pri aktualaj temoj.

LANDAJ DELEGITOJ de nia AMIKARO:

Franclando: Paul Ciliga, 17, Rue Duguay-Trouin, P A R I S , VI

Finnlando: Erkki J ä r k ä s, Sotkankatu 15, T A M P E R E

Nederlando: Jan Liedermooj, St. Camer 76, D E B I L T ( U )

Usono: Nova adreso de : Thomas Irwin, 1201 Gough St. San Francisko 9 California

---

Multvaloran travivaĵon ĉe partopreno al kongreso kaj refreŝigan ripozon en ferio, ĉiu samideano trovu en SOMERO 1957.

---

Eldonejo: Eduard Weichmann, Lotenkamp 4, DORTMUND-KIRCHDERNE, Germanlando

Reprodukto estas permesata sen kondiĉo, sed oni bonvolu informi al la sidejo pri farita reprodukto.

# NIA LIBERA OPINIO

PRI RELIGIO SCIENCO-KULTURO

N-ro 12 PRINTEMPO 1958

ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ


## LA GEOFIZIKA JARO

Malgraŭ la multaj diversaj diferencoj kaj malvarma milito inter la nacioj aŭ la du grandaj potencblokoj, pli ol 30 000 sciencistoj el 64 nacioj unuiĝis en scienca entrepreno, kiu staras en servado de la GEOFIZIKA JARO.

Ekde la unua de Julio 1957 ĝis fino de la jaro 1958, per koncentraj klopodoj la sciencistaro provas malkovri la ankoraŭ ekzistantajn sekretojn de nia planedo.

La termino GEOFIZIKO estas relative nova kaj ekzistas nur ĉirkaŭ cent jaroj. Sed la fako mem estas pli malnova, jam antaŭ 2300 jaroj Aristoteles la"METEOLOGIA" **verkis, en kiu li** kolektis la scion de la grekoj pri geofiziko. Unu grava tasko de la geofiziko estas la esploro pri fizikaj procezoj sur nia terglobo kaj en la superaj tavaloj de la tera atmosfero ( JONOSFERO ). Ampleksa estas la observo kaj esploro de la suno kaj la luno, kiuj multflanke influadas nian planedon. Precipe la sunmakuloj, la erupcioj sur la sunsurfarco - kiuj rezultatas gigantaj gazonuboj - allogas la intereson de ĉiuj observatorioj. Estas mirinde, ke jam antaŭ 2000 jaroj ĉinaj astronomoj observis la grandajn makulojn sur la suno. En Eŭropo, laŭ historio, Galilei estis la plej unua, kiu malkovris la makulojn pere de sia ĵust inventita teleskopo. La tiatempaj kontraŭuloj de Galilei kaj la potenca kristana eklezio akre atakis la novproklamitajn tezojn, kiuj ne akordiĝis kun la diraĵo de la ekleziularo.

Nuntempe, ĉiuj iamaj atakitaj kosmologiaj malkovroj estas ĝenerale akceptitaj de ĉiu, kaj danke al la plej modernaj esplorinstrumentoj - pere de tiuj sciencistoj pli kaj pli senvualas la universon,- la homa scio paŝon al paŝo pli kompletiĝas.

Parolante pri SCIO, prave liberpensuloj kaj ateistoj povas akcenti la materialistan filozofion, kiu provas respeguli al ni la plej objektivan bildon pri la materia mondo. Oni povas diri ĝin, ke, se ĉiuj sciencistoj intencus firme serĉi la ekzistadon de la religia ĉielo kaj loĝejo de la granda Dio en la vasta kosmo, neniu de ili trovus kontentigan rezultaton. Ja, oni eĉ povas aserti, jupli modernaj fariĝas la esplorinstrumentoj, despli malmoderna sin prezentas la mezepoka kredo al supernaturaj estaĵoj. Tamen, ni ne priridetu homan kredon al abzurdaĵoj, kiujn homoj elpensis parte pro

b.t.

nescio pri fizikaj, biologiaj, materiaj kaj aliaj normalaj leĝoj. Laŭ historio, ĉiu popolo havis kaj ankoraŭ havas propran kredon kaj imagon al mistiko, mistero kaj mitologio. Studi ĉitiun religihistorian pasintecon estas tre interesa, sed ekkoninte la falson pri la antaŭdiritaj punktoj, klera homo devus havi la kuraĝon konsekvence disrompi internan kontakton kun infaneca kredo kaj agi por la ekkoninta vereco kaj spirita progreso, ankaŭ tiam, se pro tio li estus perdinta tradecian kulton kaj moron.

ED.UO.




Nehavante laboron mi sidis en mia loĝejo sola kaj enuis pro manko de interesa libro. Sed jen, en libroŝranko staris malnova biblio de miaj gepatroj, kiun mi ne tuŝis longtempe. Mi nun denove legis la antikvajn historiojn pri Adamo kaj Eva, Pri Kain kaj Abel, kaj ankaŭ pri Noa, kiam li konstruis sian arkeon. En lernejo mi lernis, ke li enloĝigis en la arkeon ĉiujn bestojn de la mondo po unu paro. Leginte la sepan ĉapitron de la unua libro de Moses mi ekmiris, ke tie estas presite, ke li enloĝigis en la arkeon la malpurajn bestojn nur unu paro, sed la purajn bestojn kaj la birdojn po sep paroj.


Ĉu vi povas diri al mi la diferencon inter puraj kaj malpuraj bestoj? Tion mi ne sciis tiatempe. Mi nur sciis, ke judoj ne manĝas porkaĵon.

La sekvintan tagon mi iris al la sinagogo de nia urbo por peti sciigon. Oni estis tre afabla al mi kaj respondis, ke oni povas paroli kelkajn horojn pri tiu temo. Bedaŭrinde baldaŭ komencis la dioservo kaj neniu havis tempon por mi. Kion mi faru?? Mi ekmarŝis al la biblioteko en la urbdomo. Tie mi serĉis en vortlibroj kaj finfine mi trovis la ĝustan respondon. Ĝi staris ankaŭ en la biblio, en la dekunua ĉapitro de la tria libro de Moses. La puraj bestoj estas tiuj, kiuj estas remaĉantoj kaj havas fenditajn kufojn, ekzemple bovoj kaj ŝafoj. Nur tiujn la homoj manĝu. La listo pri manĝindaj bestoj komencis kun kunikloj kaj leporoj, pri ili estas presite, ke ili estas remaĉantoj. Mi ne volis kredi tion. Mi demandis pri tio miajn amikojn , miajn konatulojn, mi demandis kelkajn viandistojn, mi demandis negociston kiu vendas leporojn kaj anserojn, sed vane ...... neniu povis doni al mi precizan respondon. Vespere mi vizitis kuraciston por bestoj. Sinjorino malfermis la pordon. Bonege mi jam scipovis paroli mian frazon: Ĉu vi povas diri al mi, ĉu leporoj kaj kunikloj estas remaĉantoj? La sinjorino respondis : "Certe, kompreneble, estas ja legeble en la biblio, ke ili apartenas al la remaĉantoj". Sed voko, devena el apuda ĉambro eksonis: "Ne, ili NE estas remaĉantoj"! Estis la doktoro, kiu ankaŭ aŭdis mian demandon. Feliĉe mi nun saĝiĝis. La sekvintan tagon mi tamen iris al la zoologiabestarejo por peti certan informon. Tie mi havis grandan feliĉon, en la ĉambro sidis studento, kiu al mi precize respondis, ke kunikloj kaj leporoj ne estas remaĉantoj, sed ili estas mordetuloj.

Por ke neniu dubu, mi ankaŭ skribis al respondsinjoro de la radiostacio RIAS en Berlin, kiu al mi reskribis: Kara aŭdanto, koran dankon pro via skribaĵo, Jes MOSES e r a r i s , leporoj kaj kunikloj <u>ne estas remaĉantoj</u>!

K.Jakszt, BERLIN

<u>Noto:</u> Erari estas homeca...... aŭ ĉu la ĉioscipova DIO inspiris falsaĵon al biblioskribintoj ? ? ?




Ne estas kulpo de la sciencistoj, ke la vivigo de la artefaritaj lunoj estas pritraktitaj precipe kun militaj, politikaj, naciaj kaj aliaj spekulacioj. Do, ankaŭ ne estas kulpo de la sputnik-kreintoj, ke liberpensuloj, ateistoj kaj similaj ne-diokredantoj sin okupas kun tiu eminenta, scienca fenomeno.

Sendube, la sovetaj sputnikoj kaj usonaj "esploroj" estas la plej diskutitaj inventoj nuntempa. Al la homaro ili donas novajn perspektivojn por konkeri kaj finesplori la universon. Sed krom tio, tiuj satelitoj maltrankviligas la kristanan kredaron, kiu subite devas sperti, ke sputnikoj, raketoj enpenetras en ĉielan spacon, en kiu laŭ infaneca kaj mezepoka kredo, Dio kaj aliaj bibliaj aktoroj devus loĝi. Estas nature, ke pro la revolucia scienca eltrovo denove fariĝas aktuala la demando: Ĉu ekzistas ĉiela paradizo kun postmorta vivebleco por fiduloj ? Certe, diokredantoj, precipe nekleraj, facilanime kaj ne-esplorante la demandon diras JES, kvankam neniu okulo vidis kaj neniu orelo ion ajn aŭdis pri la ekzisto de la ĉiela kaj dia teritorio. Do, konklude, ĉiuj spiritaj imagoj pri postmorta vivo estas fakte senvalora, ja eĉ memtrompo. Jes, la blinda kredo al postmorta vivo kontentigas revantojn, ĝi donas al ili esperon, same kiel mensoga diagnozo de kuracisto al homo, kiu tre baldaŭ ĉesos vivi.

Prilumigante religiajn historiojn, oni povas konfesi, ke ĉiuj mitologioj respegulas la tiatempajn homajn imagojn kaj spiritajn sentojn. La verkistoj kaj kreintoj de la diversaj religioj estis kapablaj psikologiistoj, kiuj parolis en maniero kaj nivelo kiuj estis facile komprenablaj kaj akceptindaj de ĉiuj ankaŭ de la plej simplaj popolanoj. Tio kaŭsas, ke precipe la kristana religio havas trajton, karakteron kaj principon, kiuj staras en treega kontraŭo kun la moderna scienca ekkono.

La evoluo en intelektaj kaj sciencaj disciplinoj ne estas haltigeblaj. Koncernante la konkeron de la kosmo, oni diskutas kaj projektas planojn, laŭ kiuj, homoj baldaŭ sukcesos forlasi nian teron, vizitonte fremdajn planedojn. En tiu momento, vivantaj homoj staras tie, kie laŭ mezepoka kredo estas loko por animoj de la mortintaj piuloj.
Ho, kia komplika situacio por naivaj diofiduloj!

ED.UO.

--- ::: ---

Al la nova vereco, nenio estas pli malutila ol malnova eraro.

J.W.v.GOETHE

=== """ ===

## NE ĈIU EMAS ŜERCI !

En nia vilaĝo mi gaje promenas. Jen pastro el domo rapide alvenas, salutas kaj diras kun granda respekto; "Ni ambaŭ iras en sama direkto? Kun iom da miro mi jesas ĝentile, kaj poste ni ankaŭ babilas trankvile.

Vilaĝ-policisto ĉe la strata angulo
tuj pretas kunmarŝi jam kiel kunulo.
Parolas ni kvazaŭ malnovaj amikoj
pri pluva vetero kaj pri la Sputnikoj.
Sed kiam konato de mi nin renkontas,
li miras kaj diras:" He, ĉu vi ne hontas?
Vi iras enmeze de du fi-sinjoroj!"
Responde mi vokas en bonaj humoroj:
"Jesuo ĉe la kruco sen iaj makuloj
jam pendis enmeze de du ĉef-krimuloj!"
Post tiu mallonga klarigo parola
subite mi staras surstrate tutsola.

KASTELANO EL SAARLANDO

## PRI JAPANUJO

Laŭ lastatempa informo, en Japanujo la nombro de kristanoj iom post iom malgrandiĝis, kvankam ĉirkaŭ cent jaroj jam preterpasis ekde la komenco de la propagando por kristanismo en tiu lando.

... al la budhanismo multaj japanoj ne plu kredas, sed la budhana vivsento ankoraŭ nun troviĝas en nia koro. Ĉi tiun vivsenton, kristanaj eklezianoj ne povas aliigi.

Por la kristana eklezio estas malfavora fakto, unue, ke komence de la kristana agado la japana popolo ne estis sovaĝaj indiĝenoj, due, ke la kristanaj misiistoj en Japanujo trovis jam evoluiĝintan kulturan nivelon, trie, ke la spirit- kaj religilibereco jam estis garantiita laŭ la konstitucio.

En la historio, la kristana eklezio ofte subigis indiĝenojn per militaraj armeoj, kiuj estis fidelaj servistoj de la papo. Sed tia sangeca kristanigo en Japanujo ne estis ebla. Krom tio, ĝi ne sukcesis enpenetri en la politikon kaj ne povis influi la edukadon de la junularo. Pro tio, ni japanoj emas opinii, ke la kristanismo estas deca religio, kiu ne volas devigi nin al ĝi kaj, ke ĝi povas gardi la liberecon kaj pacon. Ĉi tie ĝi estas pritraktita kiel tolereman kaj sendanĝeran religion.

En Japanujo la plimulto de la kristanoj devenas el la intelektularo kaj konsistas precipe el junaj studentoj. Parto de ĉi tiuj inteligentaj kristanoj deziras esplori la verecon pri la vivo. Estante en preĝejo ili studas kaj funde pensas pri tiu problemo. Por tiaj kristanoj estas tre malfacile kredi al Kristo.

Mi konas multe de viglaj kristanoj, kiuj fakte ne povas kredi al Dio, ili estas ofte solecaj, ĉar ili nur volas mediti. Iu kristano al mi diris: " La preĝejo ne necesas por mi, la predikoj de pastro estas komikaj". Kelkaj japanaj kristanoj vizitas la preĝejon por kanti belsonajn himnojn aŭ por tie renkonti beletajn fraŭlinojn, sed.... al Dio ili ne kredas.

Ĉi tiu fakto montras al mi klare, ke la moderna civilizacio staras en kontraŭeco kun la kristanismo.

PROF. J.S. TOKIO

=== ::: ===

## SVEDIO

Kvankam la religio ĉi tie en Svedio - almenaŭ la ŝtata - ne havas grandan influon inter la laboristaro kaj la preĝejoj preskaŭ estas superfluaj - ĉar kutime preskaŭ malplenaj dum la diservoj - tamen la radio eluzas multe da sendtempo por la ĉiutagaj religiaj sendaĵoj, ĉi ja tiel plej efike atingas multnombran publikon por disvastigi la "vorton de dio".

Ankaŭ en la lernejoj ĉiuj gelernantoj estas devigataj partopreni la matenan preĝon ( kun malmultaj specialaj esceptoj, por kiuj oni devas havi gravajn kaŭzojn ).

Dum la lastaj jaroj eĉ la plej danĝera religifirmao, la katolika, klopodadas kaj sukcesis ennestiĝi sin en Svedio; ĉiam sciante adapti siajn metodojn laŭ cirkonstancoj, ĝi antaŭ ĉio serĉas influon inter la intelektuloj, ne trovante intereson ĉe la laboristaro. Ĉi tie en Karlstad ekzemple dum kelkaj jaroj, tre modeste komencinte, la katolika komunumo evoluiĝis al paroĥo kun preĝejo, diservoj, monaĥinoj, ktp. Tre rapide ĝi ankaŭ eltrovas la ŝafojn enmigrintajn de katolikaj landoj kaj antaŭ ĉio ne forgesas admoni ilin al pago de eklezia imposto.

ROSA WIENDL

---

SE SUNLUMON AMAS VI, ESTU MEM VI SUNRADI'
SENDU EL VI LUMON FOR; - VIVO BRILAS KIEL OR'

KASTELANO

---

---

ELDONEJO de " NIA LIBERA OPINIO" :
Eduard Weichamm, Rotenkamp 4, DORTMUND-KIRCHDERNE, Germanlando
Reprodukto estas permesata sen kondiĉo, sed oni bonvole informu la eldonejon pri farita reprodukto.

---

KARA LEGANTO,.... Pro kelkaj gravaj malfacilaĵoj la apero de nia informilo: "N.L.O." bedaŭrinde prokrastiĝis. Pro tio mi petas komprenon.

Refoje estu dirite, ke ĉiu leganto pritraktu la "N.L.O." kiel provizoran informilon, ĝis iu ajn ĝenerala liberspirit-tendenca gazeto naskiĝis.

Ĝis estas formiĝinta INTERNACIA LIGO DE LIBERPENSULOJ ESPERANTISTAJ, la taskoj de "N.L.O." inter alie estu:

a) publikigi kaj vekigi opinion de sendiuloj pri spiritaj, religiaj, kulturaj kaj sciencaj temoj.
b) Trovi kaj retrovi liberpensulajn samideanojn en la tuta mondo.
c) Ĉi efiku kiel interligilo inter ili kaj kunhelpu serĉi la veron kaj akuzu la falson en spiritsciencaj aferoj.

Por obligi tion, ĉiu samcela amiko kontribuu kaj subtenu nian agadon ĉiel ajn.
Dankon al ĉiuj bonvoluloj, kiuj sendis artikolojn aŭ financan helpon, kvankam nenio estis postulita pro la livero de nia informilo.

Via Edûo.

-.-.-.-.-.-.-

BONVOLE NOTU, ke la germanlingva periodaĵo "DER FREIDENKER" regule prezentas ESPERANTAN ANGULON. Sendante gratulojn, laŭdojn kaj ankaŭ informojn en nia nomo al la redaktoro, ĉiu facile povas pli favorigi la Esperantistan situacion sur tiu kampo.

La adreso estas : Redaktoro Hubert Freistühler
Lichtendorferstrasse 51, (21b) SCHWERTE/RUHR, Germanlando.

R E C E N Z O. Per s-ano K.Kvist ĉi tie, al kiu vi de tempo al tempo sendas la "DER FREIDENKER" mi havas okazon legi tiun ĉi tre interesan, klerigan kaj altnivelan publikaĵon. Mi povas certigi vin, ke ekhavante ĝin, mi ne elmaniĝas ĉi tiun instigan legaĵon ol mi legis ĝin de komenco ĝis fino. Vere utila batalilo kontraŭ malklero kaj superstiĉo. Kiel esperantisto oni nature ĝojas pri la esperantlingva angulo, gratulinda iniciato!

R.Wiendl, Deje, Svedio.

LANDAJ CENTROJ DE NIA AMIKARO:

Franclando: Paul Ciliga, 11 Rue Duguay-Trouin, PARIS VI
Finnlando: Erkki Järkäs, Satakunkatu 15 TAMPERE
Nederlando: Jan Liedermooij, St.Camer 76, DE BILT (U)
Usono: C.Thomas Irwin, P.O. Box 5067, HONOLULU 14, T.H.

LIBERPENSULA FRAKCIO EN S.A.T.,
Andreo Gay, Rue Lambert-Dumesnil, HERBLAY (S. et O.)

BRITA LIBERPENSULA ESPERANTISTA ASOCIO:
G.L.Dickinson, 21 Gribble Road, LIVERPOOL 10

---

Por realigi poresperantan kolektaĵon kaj ekspozicion, propagandcele oni bezonas aktualan materialon. Deziritaj estas: almenaŭ unu ekzemplero de kiu ajn nacia liberpensula k.s. periodaĵo kaj ankaŭ belornamitaj kovertoj. Ilin bonvole sendu al la eldonejo de N.L.O.

---

Ĉu plendos vi, kiuj nutras la mondon ? Kiuj vestas la mondon ?
Kiuj enloĝigas la mondon ? Ĉu plendos vi,
Kiuj estas la mondo, pri agoj de la mondo ?
Konzu nun la povon vian - la mondo sekvos vin !

CH! PERKINS GILMAN

706 617


# NIA LIBERA OPINIO

Eldonas

ESPERANTO-AMIKARO
DE LIBERPENSULOJ

N-ro 13

SIDEJO: Eduard Weichmann, DORTMUND-KIRCHDERNE, Lotenkamp 4


## 1959

**GERMANLANDO**

Starante ĉe la sojlo de nova jaro, ni liberpensulaj Esperantistoj kaj Esperantoamikoj povas rigardi en la estonton kun tute novaj kaj esperplenaj perspektivoj.

Rezulte de la unuanima decido de la ĉefestraro de "DEUTSCHER FREIDENKER - VERBAND" (Germana Liberpensula Ligo ) en la Ligo estas fondita ESPERANTO-GRUPO kaj oni vokis ESPERANTO-REFERANTON en la ĉefestraron. Tiu ĉi decido pruvas la indan akcepton de la internacia lingvo E S P E R A N T O kiel praktika komprenigilo kaj ligilo inter liberpensuloj de ĉiuj popoloj kaj rasoj de nia planedo. Sed krome, la ĉefestraro atendas de ĉiuj Esperantisto en nia Ligo efikan plenumon de al ni donitaj taskoj.

Dank' al la subteno flanke de la Liberpensula Ligo, nun ni germanaj liberpensuloj Esperantistaj povas ekkomenci agi tie, kie la esperantista vivo en D F V estis perforte malebligita de Hitler en la jaro 1933. Multaj iamaj aktivuloj jam mortis, maljuniĝis kaj perdis la entuziasmon pri nia ideo. Malgraŭ tio, ni nuntempaj samcelanoj kolektiĝu en komuna aktiveco, ni fosu nian sulkon kaj semu racie, por ke ni bone atingu nian kulturan celon.

Konsidere al la ZAMENHOFA JARO 1959, nia lasttempa sukceso meritas grandegan atenton.

D O R T M U N D O

Okaze de la 32-a SAT-KONGRESO, kiu havos lokon en la Rur-regiona urbo Dortmund, la 1an - 7an de Aŭgusto 1959, la Libepensula Esperantistaro Tutmonda trovos eblon demonstri liberpensan kaj ateistan koncepton en apartaj kunsidoj. La programeroj de tiuj aranĝoj estos fiksitaj poste.
Sampensuloj, kiuj planas veni Dortmundon, nepre ĉeestu la liberpensulajn renkontiĝojn. Ili sufiĉe frue bonvole informu E.Weichmann, menciante siajn proponojn kaj dezirojn.

EDUKU: ...ni bezonas nian tutan inteligenton.
AGITU: ...ni bezonas nian tutan entuziasmon.
ORGANIZU: ni bezonas nian tutan f o r t o n .

NOVAN JARON en feliĉo kaj PACO por ĉiuj amikoj sincere deziras E.W.

L O U R D E S. Inter ĉiuj farsoj luditaj de eklezio mi opinias ke tiuj kiuj pritraktas miraklojn estas la plej zorge prezentataj. Tio frapas la imagonde la naivuloj kaj popoloj ĝenerale.

Kiel naskiĝas tiaj aferoj kaj kial eklezio ekspluatas ilin?. Al tio estas facile respondi. Ni havas milojn da ekzemploj kaj hodiaŭ mi elektas la urbon: LOURDES, ĉar oni tie celebras la cent-dat-revenon de la fondiĝo.

(La afero estas fruktedona, ĉar oni ĵus finkonstruis subteran bazilikon kiu kostis du miliardojn da frankoj.)

Antaŭ cent jaroj en Lourdes (pirenea regiono) vivis mizera familio. La patrino estis malsana. La patro suferis pro alkoholismo kaj la filino Bernadette havis epilepsiajn krizojn. (Ŝi june mortis pro tuberkulozo.)

Iam ŝi forlasis sian domon por viziti la urbon kaj havis viziojn apud groto kaj fontano. Ŝi asertis ke la "sankta virgulino" parolis al ŝi. Rapide la loĝantoj diskonigis tion tra la urbo. Ĉar la loko estas bela, kaj ne staris sanktaj lokoj en la regiono, eklezio rapide ekspluatis tion kaj konstruis sanktejon.

Homoj komencis ĝin viziti. Poste oni konstruis altan preĝejon kun tre riĉaj religiaj monumentoj.

Mi aldonu ke eklezio ekspluatas la akvon de la groto. Estas komike vidi pilgrimantojn kun boteloj. Ili tiel reiras hejmen kun sankta akvo de la civito de la mirakloj!.

Ni do vidas ke la afero prosperas kaj ke homoj el tuta mondo sin interesas pri tiu loko.

Per tio oni vidas ke teknika progreso, sciencoj ne ludas rolon en la cerbo de tiaj pilgrimantoj. En 1958 ekzistas ankoraŭ milionoj da homoj kiuj bezonas mistikon kiuj ne kuraĝas fronti la vivon.Homoj bezonas idealon kaj nia kruda mondo rifuzas ĝin al ili.

Ili sin turnas al sorĉistoj kaj vendas al ili iom da espero kaj konsolo!. Militoj favorigas tiajn kredojn. Homoj kiuj suferas ne plu scias al kiu sin turni por mildigi sian vundon- moralan aŭ fizikan- kaj eklezio promesas eternan feliĉon!.

Nur vera socialismo povus detrui tiajn superstiĉojn sed eklezio restas la apogilo de la posedantoj kaj potenculoj.

En Lourdes, centoj da pastroj kaj episkopoj cirkulas tra la urbo. Ili grase vivas dank' al la kredemuloj kiuj alportas monon al la sankta urbo.

Lastjare, mi havis la okazon vidi kompatindajn malsanulojn kiuj foje veturis milojn da kilometroj por preĝi kaj postuli resaniĝon. Kelkaj dumvojaĝe mortas kaj multaj neniam revidos sian urbon. Per tio, ni vidas ke pieco estas forto ne imagebla de la normaluloj. Miloj da komercistoj vivas en Lourdes dank' al la "religia civito". Ĝi similas al grandega bazaro.

Vidante centojn da pastroj, mi pensis ke ili pli utile povus konstrui domojn aŭ fari utilan laboron. Sed ili rebatos al vi ke ili havas dian mision kaj ke ili kompatas al homaj suferoj!. Ili ne diros ke ili parte kulpas ke homaro ne ĝuas pli klaran panoramon de la vivo. Ili preferas parazite vivi sur la dorso de la kredemuloj. Ĝis kiam?!.

MARSO.

REFOJE L O U R D E S. En Julio 1958, 40 000 soldatoj el la NATO-ŝtatoj kaj Hispanio pilgrimis al Lourdes. Tiun internacian militarisman pilgrimvojaĝon partoprenis 800 soldatoj de la novkonstruita germana armeo. La militar-episkopo, kardinalo Wendel, akompanis ilin. La episkopo de Lourdes, Theas, i.a. deklaris, ke la militaristaro eĉ pli ol civiluloj havas PACAN taskon.

Ĉu vi pensas same kiel s-ro Theas??

**P R O T E S T O** Aperis en "THE FREETHINKER" de 24/Oktobro 1958, la jena grava anonco:

La sekvanta letero estas adresita al la Generala Direktoro de la B B C -

Estimata Sinjoro,

Ni volas protesti plej forte kontraŭ la daŭra kaj senkritika laŭdego de la Papo Pius XII, fare de via Korporacio.

Lia titolo, "Princo de la Paco" ŝajnas esti aparte nemeritita pro lia senkaŝa subteno al la kontraŭleĝa ribelo de Gerneralo Franco kaj ties faŝistaj kaj militistaj apogantoj en Hispanujo. Efektive, Franco kredeble ŝuldas sian sukceson tiom multe al Pius kiel al Hitler kaj Mussolini - certe ne bona amikaro kiun Princo de la paco patronu.

Plue, Papo dotita kun malorareco povis esti donita al la mondo ian konstruan moralan instruon pri la temo de la vivo kaj la morto kiun prezentas la minaco de nuklea milito. Tamen nenia tia instruo elvenis el la Vatikano dum la longa pontifikeco de la mortinta Papo.

Dum la lastaj kelkaj tagoj oni rajtus de tempo al tempo konkludi, ke ĉi tiu estas oficiala Romkatolika lando. Laŭ nia scio, Granda Britujo ankoraŭ estas ligita al la Protestanta kredaro, kiun Sia Reĝina Moŝto solene ĵuris defendi.

Via, k.t.p.,
NATIONAL SEKULAR SOCIETY.
(SUBSKRIBAS) F.A.Ridley, Prezidanto.
Colin Mc Call, Sekretario.

**P O R P A C O** La "DEUTSCHER FREIDENKER VERBAND" decidis jenan eron aldoni al siaj statutoj: La Ligo pledas por la ideo de internacia popolkomprenigo en paca formo kaj turnas sin kontraŭ ĉiu konflikto kun armiloj, sed precipe kontraŭ la apliko de amasmortigiloj - kiel ATOMBOMBOJ.

Laŭ paragrafo 4, 3-a alineo de la Federacia Konstitucio, por siaj membroj, la Ligo pretendas la rajton rifuzi la militservon pro kaŭzoj de konscienco.

**R E Z O L U C I O** En la pasintoktobra jarkunveno, la"DEUTSCHER FREIDENKER VERBAND" unuanime akceptis rezolucion kontraŭ la puno per mortigo en la Germana Federacia Respubliko.

Inter alie oni akcentis, ke la punmortigo estas signo de primitiva koncepto pri puno kiel venĝo kaj ektimfarado. Krom tio oni diris, ke ni devas konstrui nian tutan edukadon sur fundamento de la vera HUMANISMO, respekto kaj estimo al la homa vivo - la plej alta posedaĵo de ĉiu homo -. La saman fundamenton devas havi nia sociordo kaj devas en ĝin enpenetri. Vera socia koncepto kaj etiko estas la plej certa ŝirmo kontraŭ despotoj kaj ties krimoj.

La D F V malakceptas la PUNMORTON, ĉar ĝi estas kruela, malhoma kaj hom-maldigna.

**Tekniko kaj fetiĉismo** Laŭ informoj de la "NEW YORK TIMES", la ĝiroskopa direktilo de la VANGUARD-raketo, kie devis enĉieligi la artan lunon, estas kompletigita per nova helpilo, por petegi la DIAN GVIDON. Tial oni enmetis en la aparaton medalon de Kristoforo sankta.

La sankta Kristoforo estas adorita de la Rom-katolikoj kiel patrono de veturiloj kaj vojaĝoj.

La enmeto de la talismano (kiun helpilon oni opiniis taŭga post du malsukcesoj) okazis post prezento kaj aprobo de iu necesa dokumento por ĉiu ŝanĝo en la originala plano. En ĉi tiu dokumento, en kiu krom la proponita ŝanĝo en la plano, ankaŭ devas esti klarigita la kialo, oni montris en la kolono , Proponita Ŝanĝo, desegnon de Kristoforo-medalo kaj skizon pri la maniero laŭ kiu ĝi estu fiksita en la direktilon.

La kaŭzo de la aliigo estas: "ALDONO DE DIA GVIDO"

Jen, pura fetiĉismo en la atomepoko!

Holanda Liberpensulo

## LA VATIKANO KAJ LA MONOPOLOJ

Profesoro d-ro Alighiero Tondi, kiu dum longaj jaroj okupis gravegan postenon en la Vatikano, posedas profundan scion pri la rolo kiun la eklezîŝtato ludas ĉe la monopoloj.

En speciala broŝuro n-ro 3 de Socialismaj Leteroj, prof.Tondi esploras la kaŝitajn kaŭzojn de la kontraŭsocialisma kaj monopolfavora politiko de la Vatikano. El la havebla materialo estas konstatebla ke la religio mem ne estas korafero de la Vatikano kaj la ĉefklerikaro, sed de la mono, posedo kaj riĉo.

Ce diversaj industriaj entreprenoj, trustoj kaj bankoj, la Vatikano, la Jezuitoj kaj aliaj ekleziaj societoj en multaj ŝtatoj havas grandkvante valorleterojn kaj akciojn, kiuj garantias al la roma klerikaro nepran influon sur la politikaj, ekonomiaj kaj sociaj rilatoj de la homoj. Krom tio ili havas grandegajn terposedaĵojn en ĉiuj kontinentoj.

Por konservi tiujn potencpoziciojn kaj porvatikanajn monofontojn, la klerikaro defendas la kapitalisman sociordon, predikas por klasharmonio kaj akre batalas kontraŭ ĉiu novigado de la malnova sociordo flanke de la komunismo.

NOTO: La leganto de tiu mallonga skizo de la artikolo de prof. A.Tondi mem komentariu pri la temo, ĉar la monopolfavoran politikon de la Vatikano oni povas prilumi de du flankoj. Ĝin tuŝante de la pura religia flanko, tio min instigas opinii ke por la Rom-katolikaj ĉefoj la financoj kaj posedaĵoj ludas pli grandan rolon ol la Dio mem. Evidente per ĉiura kredo al Dio kaj Jusuo oni atingos nenion. Sed MONO,AKCIOJ kaj alia POSEDO.... tio signifas realan POTENCON!!!

Por politikemaj homoj, kiuj ekzemple simpatias kun la komunismo, en la financpolitika agado de la Vatikano respeguliĝas kapitalisma entrepreno kiuj similas al aliaj en la mondo.

edu

## S U P E R S T I C O

Milde punitaj estas du monaĥaj patrinoj katolikaj, kiuj kulpas pri la morto de du novnaskiĝintoj, kiuj kuŝis en la "ST.ANNA KLINIK" en Bad Cannstadt apud Stuttgart en Germanlando.

Estis la 19-a de Aŭgusto 1958, kiam la punitaj du katolikaj patrinoj,pro fulmotondra vetero, sur la fenestrosojlon starigis benitan kandelon por protekti la novnaskiĝintojn kontraŭ fulmoj. Sed la kandeloflamo bruligis la fenestrokurtenon, de kie la fajro transsaltis en la infanlitetojn kiuj staris apud la fenestro.

Malgraŭ la ĉie konata fakto, ke ni vivas en epoko de "sputnikoj", ĉiam denove oni povas legi aŭ aŭdi pri malraciaj kondutoj kaj agoj de kristanaj kredantoj kiuj sin kroĉas laŭ pasintepokaj manieroj al superstiĉaj kultoj, kiuj efektive neniam povas helpi homojn, ĉar objektive, ekster la homaj pensoj, ne ekzistas tiu supertera fantomaro kiun la kredantaro adoras.

Elementoj kaj objektoj ne estas dreseblaj nek per religia ceremonio nek per sennombraj preĝoj, ili subiĝas al la fizikaj leĝoj.

edu

## C I A M  A K T U A L A

La defendantoj de religio asertas ĝis hodiaŭ, ke la homoj malsaniĝas kaj resaniĝas laŭ la volo de Dio. Sed la ĉefo de la katolika eklezio, la roma Papo kaj liaj kardinaloj jam dum multaj jarcentoj vivtenas stabon da kortkuracistoj, kiuj kuracas ekleziajn altrangulojn NE per preĝoj sed helpe de sciencaj metodoj kiujn malkovris la medicina scienco.

El "MATERIALISMO KAJ RELIGIO"
de BASKIN

Dankon al ĉiu liberpensa amiko, kiu sendis monon aŭ per aliaj rimedoj helpe apogis nian kulturan strebadon. Tiuj, kiuj longe devis atendi respondon al sia sendaĵo aŭ miras pri la neregula apero de "NIA LIBERA OPINIO", bonvole sciiĝu, ke mi ofte estas malhelpata pro sufero de militvondo. Krom tio, pro la financa cirkonstanco de nia S.A.L. - ni ja ne postulas kotizon - nur malofte eblas aperigi nian informilon pri religiaj, humanismaj, sciencaj kaj ateismaj temoj.

E.W.

**HUMANISTAJ ESPERANTISTOJ**

La Brita Esperanto-Humanistaro jarkunvenis la 5an de Oktobro, ĉe Conway Hall, Londono, la sidejo de South Place Ethical Society (fondita antaŭ ĉ 150 jaroj).

Oni decidis starigi kiel eble plej baldaŭ ĉe Conway Hall Londonan Grupon de la B.E.H.

Post unu jaro de ekzisto de B.E.-H. havas tridek anojn kaj estas konata en Britaj Humanistaj rondoj, pro kio pluraj informpetoj pri Esperanto estas ricevitaj de la Sekretario. Ano de B.E.-H. regule ĉeestas la kunsidojn de la Konsilantaro de The Ethical Union, al kiu la diversaj humanistaj organizaĵoj en Britujo estas filiiĝintaj.

Post la Jarkunveno la anoj diskutis la temon "MIA KONCEPTO PRI HUMANISMO", surbaze de mallonga tezo, verkita de F-ino Marjorie Boulton.

B.E.-H. Decidis partopreni la Britan Kongreson en Londono je Pentekosto, 1959.

Sekretario: G.Dickinson, 21 Gribble Rd., LIVERPOOL - 10

NOTO: En kelkaj anglaj ne-Esperantistaj humanistaj, k.s., oficialaj gazetoj, oni donis bonan spacon por raporti la jarkunvenon de B.E.-H. Ankaŭ en Britujo B.E.-H. havas siajn delegitojn en la Komitatoj de "THE ETHICAL UNION" kaj Brita Esperantista Asocio.

La Esperanto-Amikaro de Liberpensuloj sendas sincerajn bondezirojn al la B.E.-H. Inter ambaŭ ligoj floras konformeco pri ETIKO kaj HUMANISMO.

**M A I N Z**

En la revekita historio de la liberspirita ideo en Esperantio, kun kontento ni notas, ke en la Mainza Universala Kongreso ankaŭ liberspiritaj Esperantistoj organizis apartan kunvenon.

Samideano Bepperling el Wetzlar, Germanlando, prenis sur sin la iniciaton de la unika afero kaj laŭdinde regis la programon de tiu Liberspirita Solenaĵo.

La 3-an de Aŭgusto, en la Mainza Liberreligia Komunumo ĉeestis 62 personoj el kelkaj landoj kiam s-ano Bepperling, kiu sin tute oferis por tiu aranĝo, prelegis pri "IN MEMORIAM MÜLLER LYER".

Kun bedaŭro ni povas konstati, ke tiu Liberspirita Solenaĵo ne estas indikita en la raporto pri fakaj kaj neŭtralaj organizaĵoj, kiu aperis en ESPERANTO REVUO INTERNACIA.

**V a r s o v i o**

Ĉu en la venonta Universala Kongreso 1959 denove liberspirituloj havos specialan kunvenon, tio dependos de la iniciativo de kongrespartoprenantoj. BonvolulOj, kiuj pretas organizi tian aranĝon sin anoncu ĉe la LKK.

N E K R O L O G O Ni funebras pro morto de nia s-ano Ernesto Gemeinhardt en Nürnberg, kiu ĉesis vivi la 9-an de Julio 1958. Li estis aktiva liberspiritulo. Kune kun s-ano Bepperling li ebenigis la vojon al la sukceso de la liberspirita kunveno en Mainz, sed pro la tro frua morto li ni povis vidi la rikolton kiun li kunsemis.

Li restu en nia daŭra memoro.

---

**P A P O J O H A N O XXII**

En la jaro 1412 papo Johano XXII. proklamis indulgencon por mono; ĉar li intencis fari porkrucan militiron kontraŭ Neapolo. La Praga universitata profesoro de teologio Johano Hus ne nur mallaŭdis la porkrucan militiron de kristanoj kontraŭ kristanoj, sed ankaŭ publike bruligis la papan bulon pri indulgenco ĉe malhonoro kolono. Pro ĉi tiu ofendo la papo ekskomunikis lin kaj venigis lin al la Konstanca eklezia konsiliĝo en la jaro 1414 ... Fidante al imperiestra ŝirmletero Hus vojaĝis al la konsiliĝo. Sed ĉi tiu akuzis lin pri herezo kaj bruligis lin sur ŝtibaro. ( DARVIN, pĝ. 326 )

---

Reproduktо estas permesata sen kondiĉo, sed oni bonvole sendu ĉiaritan reprodukton al la sidejo de N.L.O.

# NIA LIBERA OPINIO

**No 14**

—Aperas neregule—

Eldonas

ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ

SIDEJO:

Eduard Weichmann DORTMUND-KIRCHDERNE Lotenkamp 4 GERMANLANDO


---

La jaron 1959 karakterizas memordatoj pri pioniroj de scienco kaj kulturo, homoj, kiuj kuraĝe kaj ofereme agadis sur siaj specialaj kampoj. Tiuj ĉi elstaraj homoj pliriĉigis la mondon per progresaj ideoj pli-malpli agnoskitaj de la postvivantoj kiel gvidaj principoj.

En la unua vico de la personoj meritantaj niajn respekton, atenton kaj estimon, ni notu:



D-RO LUDOVIKO ZAMENHOF, la kreinto de la lingvo internacia ESPERANTO, naskiĝis antaŭ 100 jaroj.

Antaŭ 80 jaroj naskiĝis E. L A N T I, la fondinto de S E N N A C I E C A Asocio Tutmonda.

CHARLES DARWIN, la granda pensulo kaj naturesploristo naskiĝis antaŭ 150 jaroj kaj publikigis sian ĉefverkon antaŭ 100 jaroj.

ALEXANDER VON HUMBOLDT, la fama esplor-vojaĝanto kaj majstro de Klasike-populara prezentado , mortis antaŭ 100 jaroj.

FREDERIKO S C H I L L E R , mondkonata poeto, naskiĝis antaŭ 200 jaroj.

FRANCISCO F E R R E R GUARDIA, hispana liberpensulo, naskiĝis antaŭ 100 jaroj kaj estis pafmortigata je iniciativo de la klerikalismo antaŭ 5o jaroj.

---

d o k u m e n t o + + + d o k u m e n t o + + + d o k u m e n t o

---

Manskribita letero de D-ro Zamenhof, sendita je Oktobro 1913 al la tiatempa internacia societo de liberpensuloj-esperantistoj havas jenan tekston:

" Kara Sinjoro!

Kun plezuro mi subskribis kaj resendas al vi la folieton pri " La Vojo".

Mi nun ne scias ankoraŭ, ĉu mi povos veni al la P a r i z a kongreso; sed se mi venos, estos al mi tre agrable ĉeesti ĉe la kulturkoncerto, kiun la Libera Penso intencas aranĝi.

Via Zamenhof.

---

d o k u m e n t o + + + D o k u m e n t o + + + d o k u m e n t o

---

KUNVENO DE LIBERPENSULOJ

La tutmonda asocio de la sennaciismaj esperantistoj S. A. T., de 1 ĝis 7 Aŭgusto 1959, havis sian ĉiujaran kongreson en la germana industria urbo D O R T M U N D.

En la kadro de la kongreso, al kiu anoncis sin pli ol 5 o o gesamideanoj el 14 landoj, ofte kunvenis liberpensuloj el Belgio Francio, Nederlando, Britio, Norvegio, Svedio, Jugoslavio kaj Germanio. Ĉe la solena malfermo de la Kongreso, kiu estis enkadrigita per impresaj muzikaĵoj kaj Esperante kantitaj ĥoraĵoj, bonege salutparolis la reprezentantoj el diversaj landoj kaj ligoj,inter kiuj por la liberpensuloj k-do Weichmann, kiu substrekis, ke en la organo de la Germana Liberpensula Ligo, "DER FREIDENKER" estas konstante kolono kun paralelaj tekstoj en Esperanto kaj la germana lingvo; li aldonis, ke la unua prezidanto de la "GLL", sinjoro Freistühler, ĉeestas.

Tiu kiu scias pri la historio kaj koncepto de la tutmonda liberpensismo kaj ties rilato al la laborist-kaj-prolettendencaj organizaĵoj, facile komprenas, ke ne estas hazarde, ke la liberpensulaj esperantistoj en la etoso de la 32a SAT-Kongreso en Dortmund aranĝis siajn prorajn kunvenojn.

En la unua faka kunsido k-do Bepperling (Wetzlar), prelegis pri "RULSKRIBAJOJ DE LA MORTA MARO", temo jam ofte pritraktita en "DER FREIDENKER", "SENNACIULO" kaj aliaj gazetoj. La zorge ellaboritap prelego trovis plenan konsenton ĉe la aŭskultantaro kiu vigle diskutis la problemon. Dum la diskutado k-do Yelland klare esprimis sian dubon pri la vero de la eltrovitaj manuskriptoj. Li entuziasme diris :" N E K R E D U S E D S C I U ! "

Dum la dua kunsido la jam de jardekoj kiel aktiva liberpensulo-esperantisto, la bone konata k-do E.Yelland ne nur parolis pri la vivado de liberpensulaj ligoj esperantistaj antaŭ kelkaj jardekoj, sed ankaŭ transdonis dokumentojn el tiu tempo al samideano Weichmann. Inter la skribaĵoj estas invito, kiun kdo Deshays la iama sekretario de LIBERA PENSO, sendis al la Internacia liberpensula Kongreso, okazinta 1924 en Paris, kie Yelland rajtis paroli pri Esperanto. En tiu invito Deshays notas, ke la societo LIBERA PENSO estis fondita de esperantistoj-liberpensuloj en la jaro 1907, por krei intelektan kaj personan kontakton kun liber - pensuloj en ĉiuj landoj pere de komuna lingvo, nome ESPERANTO; ke Leo Tolstoj, Ferrer, Donà kaj aliaj estis membroj de tiu societo kaj, ke la LIBERA PENSO brile estis reprezentita en la kongresoj de liberpensuloj en Bruselo, Munkeno kaj Lisbono. Ĝi publikigis la lastan verkon de militanta liberpensulo Niemajevski ( Polio ), verko konfiskita per pola cenzuro; ĝi publikigis ankaŭ la memdefendan paroladon de Ferrer, kiun li faris antaŭ la militista tribunalo en Hispanio. Tiu societo LIBERA PENSO devis ĉesigi sian ekziston pro la unua mond-milito.

K-dino Terezo Yelland priskribis en danke akceptita prelego la vivon kaj verkon de la antikvaj moralistoj Konfucio kaj Epikteto.

En la fina kunsido la ĉeestantoj, i.a., esprimis sian esperon pri la kiel eble plej frua reviviĝo de la liberpensula frakcio en SAT, kiu funkcias krom la " ESPERANTO - AMIKARO DE LIBERPENSULOJ". Ili, do, decidis peti la Plenum-Komitaton de S A T instigi la peranton de la frakcio, k-don Gay, al efika agado. Oni aprobis proponon pri provo, reaperigi en la estonteco la frakcian organon, "LA LIBERPENSULO", kaj subteni la informilon "NIA LIBERA OPINIO", kiun redaktas k-do Weichmann.

Riĉigitaj per novaj spertoj kaj impulsoj la liberpensulaj kongrespartoprenantoj reiris en la diversajn landojn ĝis la revido en. . . . . . . . . . .?

NOTU: La urbestro de Dortmund, mem SAT-ano, en la Solena Malfermo bonvenigis senmanuskribte en flua Esperanto la kongresanaron.

## BRITA ESPERANTO - HUMANISTARO

Prezidanto: S-ro H. A. E p t o n
Vic-Prezidanto: S-ro F. Thurgood
Sekretario: S-ro G. Dickinson,
21 Gribble Road, Liverpool 10.

### Raporto pri PENTEKOSTA KUNSIDO

Fakkunsido Humanista okazis Sabaton, 16an Majo 1959, en Royal Hotel, Woburn Place, Londono, la ejo de la Brita Kongreso. Ĉeestis 16 personoj.

La Prezidanto, s-ro Epton, unue salutis la ĉeestantojn. La Sekretario legis salutleteron de s-ro Weichmann, kiu havas sian propran organizaĵon, AMIKARO DE LIBERPENSULOJ. S-ro W. esprimis deziron por sukceso al la faro de la Londona kunsido. La Prezidanto proponis dankleteron al s-ro Weichmann, nome de la ĉeestantoj. S-ro Leslie subtenis, kaj la ĉeestantoj aprobis.

S-ro Thurgood parolis dum kelkaj minutoj pri la ekesto de B.E.H. kaj la signifo de Humanismo. Laŭ lia opinio la termino estas sufiĉe vastsignifa kaj povus enhavi multon, kio troviĝas ĉe religio aŭ Homaranismo.

La Prezidanto legis preparitan foliaron pri sia persona historio kiel raciisto, ateisto kaj Esperantisto. Nia Prezidanto ankaŭ estas veterana Esperantisto.

La Sekretario legis protokolon de jarkunveno kiu okazis 5an Oktobro 1958. S-ro Leslie proponis akcepton, kaj la Sekretario subtenis pro tio,ke neniu alia ĉeestanto ĉeestis la jarkunvenon. Dum la protokolo oni menciis la Londona Grupo. S-ro Garnett proponis la starigon de Grupo de Humanistaj Esperantistoj en Londono. S-ro Leslie subtenis kaj diris plue ke li estas Komitatano ĉe South Place Ethical Society, kaj ke ni povus tre oportune utiligi la ĉambrojn ĉe Conway Hall. S-ro Thurgood menciis la vastecon de Londono kaj la malfacilecon de kuniĝo por tiuj, kiuj loĝas ekster la civito. Post diskuto oni decidis provi la starigon de grupo en Londono.

D-ro Barasi proponis kontakton kun Universitataj Humanistaj grupoj. La ĉeestantoj ĝenerale aprobis la ideon, kaj D-ro Barasi promesis fari la necesajn kontaktojn kaj informi la Sekretarion.

La Sekretario raportis pri la membrostato de la organizaĵo, kiu restas ĉirkaŭ 30. Li proponis la sendon de dankletero al la redaktoro de "Humanist", pro lia helpo presante anoncetojn pri nia organizaĵo. F-ino Boulton subtenis la proponon kaj la ĉeestantoj aprobis.

La Prezidanto parolis pri la bulteno, kiun la sekretario sendis al membroj. Li proponis financan helpon por la bulteno. D-ro Barasi proponis aldonan 5/- por la Bulteno. F-ino Boulton rimarkis, ke ĉi tio signifas altigon al la kotizo. La Prezidanto Proponis amende volontan donacon. Ciuj ĉeestantoj donacis malavare al la kaso.

G. Dickinson

.. -- == -- ..

Konceptoj pri Humanismo:

"Mi dirus, ke la Humanismo estas la amo al la homaro, neniel ekskluzivema, dediĉita al utiligado de racio, scienco kaj ĉiuj kulturaj rimedoj por la libera kaj plena evoluo de ĉiuj homoj"

-George Falgier, St. Louis, Usono.

"Laŭ mia Opinio, la signifo de Humanismo estas vere malfacile klarigebla kaj estas diversence, ofte eĉ malĝuste interpretata. Mi mem iom dubas, ĉu Humanismo iel inkluzivas Ateismon..."

Franz Schwarz, Thun, Svisujo.

IV

## LA CERBO DE MULTAJ HOMOJ ESTAS KIEL TIU DE KOKIDO

( El franca ĵurnalo "Nice-Matin" 16/5/1959 )

Hieraŭ matene tipografo forlasis Palermo (Italio) por iri piede al Lurde (Lourdes Francio). Li portados sep kilograman krucon sur distanco de proksimume tri mil kilometroj.

La 15-an de Septembro 1958, Giovanni Azzara 27 jara, malsana pro neŭrastenio, ĵetis sin de la kvara etaĝo de domo, konstruata ĉe la pereferio de Palermo. Mirakle la morto ne trafis lin. Nur la gamboj estis rompitaj kaj la spino vundita. Li ĵuris iri tuj post resaniĝo kiel pilgrimanto al Lurdo. Forlasante Palermon en lia poŝo estis nur dek mil liroj. Li deklaris: "Mi ne petos almozon. Mi dormos en kampaj domoj, se iu donos al mi monon, mi la saman vesperon donos parton da ĝi al malriĉuloj, kiujn mi renkontos."
Ni montru kia estas tiu viro.

Parazito - Mallaboremulo - Sendankulo - Ĉarlatano

1) Anstataŭ labori li portados sep kilograman pecon da ligno sur distanco de tri mil kilometroj; manĝos panon de diversspecaj laborantoj kaj parazitos sur ĉiuj homoj, kiujn li renkontos sur sia vojo. Ne nur panon li bezonas, sed ĉion, kio estas nepra por la vivmaniero de homo nuntempa.
2) Li ne dankas la kuracistojn, la flegistinojn, la administrantojn de la hospitalo, en kiu li estis kuracita, kaj aliajn, kiuj provizis al li ĉion por la resaniĝo. Li eĉ ne proponas iel fari rekompencon pro la klopodoj kaj elspezoj, kiujn li kaŭzis. NE. Tio estus tro da laboro.
3) Li piede irus tri mil kilometrojn, portante pecon da ligno, por iri al konstruaĵo en fremda lando, kies lingvon li ne komprenas eble, por danki al iu mistika miraklofaranto, kiu savis lin de morto kontraŭ lia volo.
4) Se li volas danki iun, kiu enpuŝis sian nazon en fremdan vazon, kaj kontraŭ lia volo savis lin de morto, ĉu estas necese,ke li iru piede tri mil kilometrojn? Ĉu li ne povus esprimi dankon per preĝo en sia propra loĝejo, se li nun ne volas forpasi.
5) Estus multe pli saĝe uzi la energion, necesa por tiu piedirado, por produkti ion, utila al homoj aŭ al li mem.
6) Se iu donus al li monon, li donos parton de ĝi al malriĉuloj , kiujn eble li renkontos. Kiel li distingos en Franclando malriĉulon? Sur la frunto de homo ne ekzistas signo ke li estas malriĉa. Teorie, ne povas ekzisti en Franclando mizerulo. Li ne proponas sendi monon al tiuj, kiuj elspezis sian monon por kuraci lin. Li estas nedankulo.
7) Kie li trovos ĉiunokte kampdomon en kiu neokupata kuŝejo lin atendas? Ĉu ĉiunokte en diversaj regionoj brilanta stelo sidos sur tegmento de domo, ĝuste sur lia vojo, kvazaŭ por diri, jen lito preta por vi ? Tio povis esti en pasinteco, sed ne okazas en nia epoko.
8) kiu riparos liajn ŝuojn, kiu provizos novajn ?
9) Se li irus po 15 kilometroj ĉiutage tra varmego, ventego,pluvado, neĝado, li bezonus 200 tagojn por iri la distancon. Vintre , eble, li devus fari fajron per la ligna kruco por varmigi sin.
10) Ne nur la krucon li devus portadi ĉiutage, Li bezonus porti iom da manĝo, tranĉilon, forkon, viŝtukon, sapon, kombilon,alumetojn aŭ flamilon k.t.p. aŭ ĉu li preferus vivi kiel sovaĝa besto, nelavita, nekombita kun longaj haroj kaj barbo, senŝua, vagadi nur en ĉifonoj aŭ komplete nuda ? Neniu interesus sin en tia homaĉo.

Tiuj, kiuj libere pensas, rezonadu pri la agoj de tia parazito.

T O R Ĉ O

-.-.-.-.-.-.-.-.

**FANATIKULO:** Pia persono, piediranta al paradizo de Dio, estus konsiderata mense malsana, se ne estus religia.

El Liberpensulo

V

# F E R R E R

La 13-an de Oktobro 1909 Francisco Ferrer, batalanto por libera pensado en Hispanio, iris sian lastan surteran vojon al la fosaĵo de la fortikaĵo Montjuich, kie lin mortigis salvo de ekzekutistoj. La fia mortigo ĉesigis la korfrapon de Ferrer, sed ne lian progresigan ideon. Por sia alta celo: modernigi la lernejan sistemon, liberigi kaj sendependigi ĝin de la katolika eklezio, li oferis ĉion, eĉ sian vivon.

Tiutempe la stato socia, kultura kaj pedagogia estis terura en Hispanio. En komuniko el la jaro 1907 ni legas, ke 24000 lernejoj inter 26000 ekzistantaj ne disponis pri sufiĉe da taglumo kaj freŝa aero; sekve baciloj kaj malsanoj furiozis inter la infanaro. Pro tio mortis ĉiujare proks. 50000 infanoj. Duona miliono da infanoj estis sen iu ajn instruado lerneja. En mizero vivadis 30000 blindaj, 37000 surdmutaj kaj 67000 pli-malpli spirite malsanaj infanoj. Tiu situacio, kiu estis eĉ pli terura dum la juneco de Ferrer, postlasis siajn signojn en lia menso. Li koncentrigis sian agadon al edukaj problemoj, kaj en 1901 li en Barcelona startis la unuan " modernan lernejon" kun 33 infanoj. Post 8-jara laborego senpaŭza, 109 tiaj lernejoj estis fonditaj kun 70000 lernantoj, kaj 308 libertendencaj lernejoj transprenis la planon de la moderna sistemo lerneja.

En Hispanio kaj aliaj landoj tiuj sukcesoj mirindaj vekis grandan atenton. Sed pro tio la ekleziularo ekscitiĝis, kaj tiu, kiu konas la hipokritajn metodojn de la jezuitoj, facile povas imagi, kio okazis. Per intrigoj jezuitaj oni malliberigis Ferrer, kaj kaŭze de falsaj akuzoj dum hontinda proceso antaŭ la milit-tribunalo oni mort-kondamnis lin.

Amiko E.Yelland donis al la Amikaro dokumenton el la jaro 1914 eldonitan de la tiama liberpensula ligo esperantista " La LIBERA PENSO". En ĝi estas dirite, ke Ferrer estis membro de tiu ligo. Tio estu kialo, ke ni liberpensuloj-esperantistoj kun duoble fortaj sentoj solidaraj rememoru tiun antaŭbatalanton por la m o d e r n a lernejo liberigita de religiaj katenoj.

— — — — —

## MONDUNIO DE LIBERPENSULOJ

La 33-a Internacia Kongreso de Liberpensuloj kunvenis en Bruselo, la ĉefurbo de Belgio. ( 4 - 7 Septembro 1959 )

En la Libera Universitato de Bruselo estis aranĝita solena festo publika, per kiu la delegitaro de la mondliberpensismo honoris la memoron al Ferrer, kaj montris sian altestimon al tiu kuraĝa liberpensulo kaj racia pedagogo. Ekspozicio prezentis librojn bildojn kaj broŝurojn kiuj instruas pri vivo, agado kaj ideo de Ferrer.

Multaj prelegoj, havante altnivelajn kvalitojn pri temoj de scienco, kulturo, edukado, liberpensismo, ateismo kaj religioj, altiris la intereson de ĉiuj ĉeestantoj. Komunikoj pri vivo de liberpensulaj organizaĵoj diverslandaj, ekkonigis la kreskadon de la emo al libera pensado en la mondo.

— == .. == —

## Pli facile estas kredi !

Bonaj katolikoj kredas
f i r m e al purgatori'.
Sed inverse protestantoj
ridas de kompat' pri ĝi.

Tamen kredas protestantoj
same firme al i n f e r',
sen posedi etan pruvon
pri la vero de l' mister'.

Vi demandas:" Kial daŭras
ĉi facilkredemo plu ??"
"Estas ja pli oportune
ĉiam naĝi kun la flu' !

Josef Burger

VI

# D A R W I N

Ekveturante per la ŝipo Beagle (1831), en kiu li faris kvin-jaran studvojaĝon tra la mondo, Charles Robert Darwin certe ne imagis la gravan rezulton, per kiu li fariĝis unu el la plej famaj kaj pridiskutitaj natur-esploristoj.

Antaŭ 150 jaroj, la 12-an de Februaro 1809, komenciĝis lia vivo en Shrewsbury (Britlando); post fruktodona kaj laborplena vivo li mortis en sia bieno Down (graflando Kent) la 19-an de Aprilo 1882. Li studis la medicinan fakon de la universitato Edinburg-a kaj la teologian fakon en Cambridge. Sed la plej grandan intereson Darwin havis por natursciencaj temoj, kaj precipe la studado de la libro de J.Herschel "Introduktion to the study of Natural Philosophy" (1831) ( Enkondukon en studadon de la Naturfilosofio) vekis en lia koro la emon kunlaboradi en la natursciencа fako. En sia membiografio li diris pri la mondvojaĝo:" Tio estis mia dua naskiĝo. Ĉion, kion mi faris por la progreso de la scienco,mi ŝuldas al la vojaĝo sur Beagle." Rezulte de la zorga kaj profunda esploro de la naturo, en lia menso kreskis la ekkono pri malveraĵoj kaj fabelaj tendencoj de la biblio, kiu rakontas pri la kreado de la mondo fantaziaĵojn kontraŭantajn unu al la alia. Darwin konkludis, ke ĉiuj specoj plantaj kaj animalaj ne estas konstantaj ke ili evolue aliiĝas, kaj ke la nuntempe vivantaj specoj estiĝis tute nature el aliaj specoj iam ekzistintaj.

Darwin celis anstataŭigi per scienca koncepto la primitivan koncepton religian, laŭ kiu la ĉiopovulo je la komenco kreadis ĉiujn vivantajn estaĵojn en nevariebla formo. Li ellaboradis la principojn de la evoluci-teorio, kiu iĝis la fundamento de la moderna biologio. En Novembro 1859 aperis publike lia verko " La estiĝo de la specoj", per kiu naskiĝis la DARWINISMO. La darwinismo baziĝas sur la faktoj pri organika varieblado,heredo kaj troa produktado de ideoj. La laste nomita kaŭzas batalon por ekzisto inter la vivantaj estaĵoj, kiu kondukas al selekto: pereas la malbone al la cirkonstancoj adapteblaj individuoj, dum la aliaj dank' al favoraj varioj (nun nomataj mutacioj) transdaŭras kaj heredigas siajn kvalitojn al la idoj. Per adicio de la efikantaj kaj venkantaj varioj kaj malapero de interligantaj formoj estiĝas en la paso de jar-centmiloj kaj jar-milionoj novaj specoj, familioj kaj klasoj .

Dum en la komenco de nia jarcento ankoraŭ multaj fakuloj(speciale en la heredo-scienco) malaprobis la teorion pri natura selekto, la biologio de post 1920 montras la tendencon, en ĉiam pli granda amplekso jesi la Darwin-an teorion, kaj - tre interese - ĝuste per apogo sur ekzaktaj eksperimentoj en la kadro de la heredo-leĝoj. Jam en 1929 profesoro d-ro Goldschmidt, direktoro de fama Berlin-a instituto por biologio, konstatis, "ke inter la biologoj estas rimarkebla daŭra reveno al la darwinismo, kompreneble al darwinismo klarigita kaj purigita per senfina kvanto da novaj spertoj".

La evolucion kiel fakton konstatis jam en la naskiĝ-jaro de Darwin la franca zoologo Jean Lamarck. Lian teorion pri descendo, t.e. deveno de la vivantaj estaĵoj el pli kaj pli simplaj formoj organikaj, komprenigis kaj profundigis Darwin per sia selekto-teorio, per kiu li montris la kaŭzojn de la evolucio. Krome li ekkonis, ke la evoluci-principo validas ankaŭ por la homo, kies praulоj estas pli-malpli evoluintaj eroj de la bestaro.

Kiel oni povis supozi, la dio-kredantaj eklezioj akre atakis la Darwin-an teorion, kiu tamen fariĝis populara kaj kiun nun eĉ severaj fakuloj agnoskas. Ni liberpensuloj danku al Darwin, ĉar li donis en nian manon potencan armilon spiritan! Honore alDarwin ĵus aperis en la Kosmos-biblioteko (Stuttgart) la libro Charles Darwin de profesoro Gerhard Heberer el Göttingen. La aŭtoro pritraktas vivon kaj verkon de Darwin laŭ la plej nova stato de la esplorado, kaj li ankaŭ atentigas pri la granda nombro de nuntempaj aŭ projektitaj libroj pri la genia sciencule (ekz. libro de Julian Huxley/ Londono).

VII BYGGNADSTEKNISK ORDLISTA - - - - - - - KONSTRUTEKNIKA TERMINARO

kompilita de inĝ. K J MOBERG. Formato A5 (148 X 210 mm),100 paĝoj. PREZO: broŝurita 7,50 sv. kr.; en plasta specialbindo 8,50 sv. kr.

Eldona Societo Esperanto, Box 7043 M a l m ö 7, S v e d u j o

-.-""++""-.-

Interesuloj pri I N T E R S T E N O BONVOLE kontaktu kun: TUTMONDA INTERSTENO-ASOCIO: C.Daglio , Litta Parodi, (Alessandria) I T A L U J O

## I N T E R  N I

Antaŭ ol finiĝas la jaro 1959, ni kuraĝas aperigi la 14-an numeron de nia informilo "NIA LIBERA OPINIO". pro manko de propra multobligilo la farado de N L O estas ege malhelpata kaj pro tio ne povas okazi regule.

Ĉi-loke mi dankas ĉiujn sampensulojn, kiuj iel celtrafe kunhelpis fortigi kaj antaŭpuŝi la vivadon de la AMIKARO, ligilo de liberpensuloj-esperantistoj. Kotizo ne estas postulita; malgraŭ tio, persendo de mono, nian agadon subtenis jenaj gesamideanoj :
Bepperling, d-ro Bonge, Borngässer, Costatini, Enekjer , Falgier, Garnett, Hendrik de Groot, Jakszt, Kunze, Roth , Moberg, Scharnweber, Swan, Täuber, Ullrich kaj Yelland .
D a n k o n ankaŭ al ĉiuj sendintoj de gazetoj, broŝuroj,libroj informoj, artikoloj, konsiloj, kritikoj, leteroj kaj poŝtkartoj .

Kiel novaj membroj sin enskribis la s-anoj G. K u n z e el Berlino, Ojanen el Finnlando kaj H.Scharnweber, Ergste, Germanio.

Ĉiu sampensulo, kiu posedas malnovajn liberpensaĵojn, ĵurnalojn, flugfoliojn, afiŝojn, statutojn kaj ilustraĵojn pri la ateistaj kaj liberpensulaj esperanto-movadoj, estas petata sendi la materialon al E.Weichmann, kiu planas kompletigi kronikon pri la liberpensismo en Esperantio kaj aranĝi kolektaĵon de samtemaj dokumentoj.

Ne-germanoj, scipovantaj la germanan lingvon, nepre mendu la organon " DER FREIDENKER " kiu havas konstantan esperanto-kolonon. ELDONEJO: Hubert Freistühler, SCHWERTE RUHR, Lichtendorferstr. 51

## LA DUA VIVO

La sata pastro staras.
Ĉielon montras li:
"Pli bona vivo venos
Post tia vivo-ĉi.
Ne evitebla estas
Ĉagreno kaj mizer'
Ĉielo rekompensos
Pro malfeliĉ' sur ter'

Mi estas la agento
De nevidebla Di'
Per preĝoj al la estro
Vin rekomendos mi.
Ĉielon mi malfermos
Por iom da salajr'
La nekredemaj brulos
En la infera fajr'."

Ne kredu, kion diras!
Ne plu subtenu lin !
Ne pagu al la pastro,
Ĉar li friponas vin !
Ne pagu plu impostojn
Al netrovebla Di'
Kaj serĉu la feliĉon
En tiu vivo-ĉi.

A. Rehtz
(el Liberpensulo 1-2/1927)

---

Prosperan novjaron en sano kaj paco al ĉiu progresemulo kaj leganto de NIA LIBERA OPINIO.

NIA LIBERA OPINIO

ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ

N-ro 15 JANUARO 1 9 6 1

Eldonejo: Eduard Weichmann, Lotenkamp 4
DORTMUND - KIRCHDERNE

Poŝtĉeka konto : Dortmund 130414

PROSPERAN JARON 1961 NI DEZIRAS AL LA LIBERPENSULARO ESPERANTISTA !!

## KELKAJ VORTOJ AL LA GELEGANTOJ !

Dum la momento de la jarŝanĝiĝo oni kutime turnas siajn pensojn al la pasintaj tagoj, semajnoj kaj monatoj de la jaro kiun ni adiaŭis, postulanta de si mem respondecon pri sia farado, pri sia sinteno kaj konduto en familia-, panakira-, societa-, kultura-, organiza rilatoj.

Sendube, vi faris same kiel mi. Sed ĉiloke mir nur volas tuŝi la por vi interesan punkton, la vivo kaj estonto de la ESPERANTO - AMIKARO DE LIBERPENSULOJ. Malĝoje ni devas konstati, ke la aperado de nia informilo " NIA LIBERA OPINIO " estis interrompita dum pluraj monatoj. NE konjektu ke tiu silentado estas signo de malaktiveco en nia strebado al LIBERA PENSO kaj al agado kontraŭ superstiĉo. Tio ankaŭ ne estas signo, ke la AMIKARO estas eble mortinta , tute NE ! Ni devas konsideri la malfacilaĵojn KONTRAŬ kiuj la redaktoro devas lukti, kiu sin okupas pri aferoj mondkonceptoj postulantaj plenan sindonon kaj kelkflankan oferon. Spite ĉiujn malhelpaĵojn, ni sukcesas eldoni la 15-an numeron de " N L O ".

Intertempe floris vigla interkorespondado inter sampensuloj en diversaj partoj de la mondo. Jen, volonte mi kaptas la okazon por esprimi dankon al ĉiuj senditoj de skribaĵoj, gazetoj kaj eltranĉaĵoj el gazetoj, informoj kaj artikoloj. Specialan dankon mi diras pro sendo de mono, poŝtmarkoj kaj internaciaj respondkuponoj, en kiuj mi vidas pretecon al kunhelpo por nia ekzisto kaj funkciado.

Rilate al la apero de la bulteno denove estu menciita la servo kaj celo de la nuna eldono, nome:

a) arigi la liberpensularon kaj ateistaron en nian Amikaron ĝis la restariĝo de INTERNACIA LIGO DE LIBERPENSULOJ, kiu modele funkciis antaŭ dekoj da jaroj,

b) konigi la legantojn kun niaj kulturaj spiritaj kaj sciencaj pensoj kaj opinioj, kaj ilin informi pri religiaj kaj ateismaj temoj,

c) funkcii kiel ligilo inter la libere pensanta esperantistaro ĝis la apero de presita organo por la esperantista liberpensularo

Ni opinias, ke en la baldaŭa estonteco ariĝos spertaj aktivuloj kiuj entreprenos kiel sian tujan kaj ĉefan taskon revivigi la supre menciitan ligon " LA INTERNACIA LIGO DE LIBERPENSULOJ " kun presita organo kun trafa titolo.

P R P O N O J  Kelkaj amikoj proponis publikigi artikolojn pri la vivo kaj verkoj de liberpensantaj intelektuloj. Plenumante tiun proponon , ni priskribas du liberspiritajn aktivulojn.

PROFESORO MAG. D-RO LEO POLAK
naskiĝis la 6-an de Januaro 1880. Li lernis en la gimnazio en Zwolle, Nederlando. Poste li studis juron en universitato en Amsterdamo. En 1921 li ricevis la titolon Doktoro de Juro pro disertaĵo " LA SENCO DE LA PUNO ". Li estis privatdocento en la Amsterdama universitato .

En 1925 li estis elektita profesoro de la jura filozofio en la universitato de Lejdeno, Nederlando, kaj en 1928 universitata profesoro de la filozofio en Groningen. Li estis sekvanto de Profesoro Heymans. Okaze de sia inoficigo li faris paroladon kaj diris inter alie: " Nur tio, kio estas konforma kun racio havas rajton ekzisti. Maljusteco ne estas kunforma kun racio kaj pro tio ĝi ne havas rajton ekzisti kaj devas esti ekstermita. Mi scias nedubeble certe ke en la vero ni ne povas voli aŭ elekti ion " POLAK estis universala scienculo. Li lekciis ankaŭ en popolaj universitatoj, kaj multfoje prelegis en liberpensulaj kunvenoj.

LEO POLAK estis internacie konata kaj rekonita aŭtoritato. En la jaro 1937 okazis en Parizo Internacia Filozofia Kongreso, kiam la kongresanoj elektis lin prezidanto por la sekvonta kongreso planita por 1941. Sed tiam la perforto silentigis la racion.

En 1940 li estis eksigita el la organizaĵo de Internaciaj Filozofoj pro tio, ke li estis judo. La 15-an de Februaro li estis arestita kaj la 7-an de Majo 1940 li estis transportita al koncentrejo en Germanio.

La 16-an de Decembro 1941 lia edzino ricevis sciigon, ke ŝia edzo la 9-an de Decembro 1941 mortis"pro pneŭmonio" en Sachsenhausen.

Mi aldonas liajn tezojn defendataj dum publika debato pri la rilato inter religio kaj moralo.

1) Pura etiko estas kiel pura logiko, ĝis estas el intelekto elironta kriterio de valoro nedependa de metafiziko, kredo aŭ nekredo.
2) En tiu senco religia (aŭ teologia) etiko estas same neebla kiel religia ( aŭ teologia ) logiko kaj religia moralo ( honestecô, amo justeco ktp. ); same sensenca kiel religia blueco, rondeco ktp.
3) Religio, do estas principe superflua por pura moralo kaj etiko se favore konsideri nemalutila, kaj fakte, juĝante laŭ regantaj religioj, multrilate erariga. La aŭtonoma moralo kaj etiko estas la suverena purigilo por la religio ... ...

EVERTS

...---"""---...

D-RO LEONO SWIEZAWSKI
diris: Plej perfekta feliĉo por homo estas :
" ESTI BONA - FARI BONON "

Tiu pensado estas karakteriza al la liberpensulo-filozofo SWIEZAWSKI, kiu naskiĝis la 19-an de Februaro 1870 en Pollando. Tro frue li devis fini sian laboroplenan vivon, la 19-an de Januaro 1936 pro tumoro en la pulmoj. Li vivis sen momente ripozi, en efektiva laboro por la homaro kaj finis la vivon, kiel vera liberpensulo, ne akceptinte pastron.

SWIEZAWSKI estis lernanto en gimnazio en Stanislavo kaj sukcese pasis ekzamenon. Przemisl. Post gimnazia ekzameno li volis studi filozofion, sed persvadita de sia familio li enskribis sin en la medicina fakultato en Krakovo, kie li sukcesis en ekzameno por esti kuracisto.

Malgraŭ tio, ke li estis edukita en familio pastra, kaj estis kredanta katoliko, pro kelkjara pensado kaj studadoj de naturscienco kaj sciencaj eltrovoj, li ĉesis esti kredanto.

D-RO SWIEZAWSKI donacis kelkajn mirindajn verkojn al la postvivantoj inter kiuj la plej bona estas " DIO PRUDENTO ". En pola lingvo aperis tiu fundamenta verko traktanta aron da problemoj. Tiuj interesas homojn de libera pensado, homojn kun moderna vidpunkto pri la mondo kaj kaj vivo. Tiu verko estas impona pro vasteco de pensa horizonto kaj pro kuraĝa eldiro.

DIO PRUDENTO estas vere liberpensa enciklopedio kaj necesega trezoro por kleraj kaj pense liberaj homoj. Gi kunigas en unu konsekvence kaj universale pripensita sistemo ĉiujn fundamentajn kaj principajn problemojn, koncernantaj sciencan vidpunkton pri la mondo.

La verko DIO PRUDENTO postulas ne nur reformon de edukado por sekvontaj generacioj en spirito de moderna scienca vidpunkto, sed ankaŭ alian koncepton pri vivo kaj estado. Gi ne nur montras erarojn, sed ankaŭ vojon kaj rimedon por rebonigo.

La verko DIO PRUDENTO, sendube, ludas saman rolon kaj havas saman gravecon por mensoj de niaj estontaj generacioj, kiel en sia tempo por aliaj epokoj la verkoj de multaj kuraĝaj materialismaj filozofoj kaj liberpensaj aŭtoroj.

Ĉiu verko prezentas interesajn ĉapitrojn kaj estas alloga al ĉiu homo kiu strebas al libera pensado, al la plej simpla laboristo ĝis la plej elstaranta scienculo kaj inteligentulo.

Laŭ pola liberpensula gazeto, DIO PRUDENTO estis aperonta en lingvo Esperanto. Cu la verko iam estis presita en Esperanto mi ne scias. Volonte mi akceptus sciigojn pri tiu punkto de iu ajn Esperantisto.

edu

=="==

## [illegible] KAJ INUNDOJ

Se ni vidus individuon preni maŝinon por detruo de [illegible]roj, aŭ hakilegon, kaj freneze komenci detrui sian hejmon, ni nepre [illegible]irus " Li estas freneza." Prudente ni forirus pro danĝero al nia vivo. Ja, li estus estaĵo, kiun neniu respektus. Tamen, la estaĵo, kiu agas tiamaniere, estas nomata Dio.

Car nenio povas okazi sen lia ordono aŭ sen lia konsento, oni povas kuraĝe diri, ke ĉiuj inundoj kaj katastrofoj dum la jaro 1960, kaj ankaŭ de la antaŭaj jaroj, en Belgio, Anglio, Francio, Italio kaj Japanio estas verko lia.

Riveroj pro pluvegoj superbordiĝis, kaj subite amaso de akvo,portanta morton, kun bruego invadis preĝejojn kaj kapelojn, renversis statuojn de sanktuloj, de virgulinoj, tabernaklojn (sanktejo de sanktejoj) , konfesiejojn,; la sanktaj libroj kaj aliaj aĵoj estis kovritaj per ŝlimo aŭ dronis.

En kelkaj lokoj, domoj, sur kies tegmento estis kruco kaj kiuj servis kiel preĝejoj, estis en akvo ĝis tegmento.

Kion oni pensu pri tia Dio, kiu allasas detrui aŭ bruligi siajn domojn? Cu vi ne dirus, ke li estas same freneza kiel tiu individuo, kiu per murrompilo ruinigas la bazon de sia hejmo. Ja, vi estus tute prava .. kaj homoj intelektaj, eĉ romkatolikoj devas tion pensi.

[illegible]n pluraj lokoj oni povis vidi statuojn de sanktuloj floti sub la okuloj de gardanĝeloj, ankaŭ flotante sur la akvo kiel anaso. Kion pensas homoj kun humoro, vidante tion.

"[illegible]azi" germanoj mortpafis pastrojn,- la reprezentantojn de Jeĥova ; [illegible]li perfortadis monaĥinojn,- la edzinoj de Jezuo Kristo; renversadis kaj detruis kalvariojn, - portretoj de la Dio ĉio-potenca; bruligis [illegible]atedralojn kaj preĝejojn, - loĝloko de Sankta Spirito ; detruis bibliotekojn de religia literaturo, - la spirita nutraĵo de pastroj, mo[illegible]oj kaj monaĥinoj; persekutis kaj forpelis pastraron el vilaĝoj en [illegible]andio. Dio, kiu allasas mortigi la Papon Pio X, kiel ankaŭ la ka[illegible]inalojn Rampolla, Ferrata kaj tiel plu. Kaj en ĉio tio la ĉiopot[illegible] Dio tute ne intervenis por malhelpi tiajn malbonajn agojn.

[illegible]pasinteco li marŝis sur akvo, montris sian vizaĝon inter du nuboj, [illegible]is sin post arbustoj aŭ en fendoj de rokoj, kaj sin montris al vo[illegible]antoj nekredantoj, kiel al Sankta Paŭlo; li iris en dezertojn por [illegible]roli al cenobitoj, haltigis la manon de krimulo, kiel al Abrahamo.

Sed en nuna tempo, li neniam kaj nenie montras sian potencon. Kial? Ja, ĉar scienco, tio estas scio, faligis lin de lia fabela trono kaj mortigis lin per siaj eltrovoj. Kaj ... ne plu estas la Dio, kiu faras la tajdojn, subagvigantaj la teron, responda pri katastrofoj, superakvegoj, erupcioj de vulkanoj, ciklonoj, uraganoj, epidemioj, militoj, fajregoj kaj ĉiu speco de katastrofo. Ĉu demono faras tion ?- Ne pli ol Dio. La scienco ankaŭ tiun fabelan monstron mortigis ...

Ĉiuj tiuj fenomenoj kiuj rompas la harmonion de la naturo, estas simple nur konvulsioj de la materio, kiu obeas al la leĝoj de la materia mondo; - leĝoj blindaj, kiel destino ĉe Grekoj aŭ fatalo ĉe Romanoj ....

Jam estas tempo, ke oni ne plu instruu al infanoj kaj al simpluloj la grandan sensencaĵon kaj frivolan fiktivan aferon kiu ĝis nun pastroj rakontadas dum kunvenoj al siaj fidelaj kredantoj.

Spirito de vero devas esti la bazo de ĉiu instruo, kaj la metafiziko devas ne trovi lokon en niaj agoj intelektaj aŭ moralaj.

Tia estas mia penso, diktita al mi per teruraj katastrofoj inundoj en ĉiuj landoj.

H.STRIVAJ
en "LA PENSEE" organo de francaj liberpensuloj, tradukis Teresa Yelland

## D I A B L A Ĵ O J

Kredantoj al la kristana dio, samblinde kredas al la ekzisto de diablo biblia.

La iama ĉefanĝelo, kreita de dio, nun ne plu respektas kaj obeas sian SINJORON. Ekzistas kristanoj, kiuj kredas ke dio estas resumaĵo de la bono, de la amo. Kontraŭe la diablo estas personigita demono de ĉia malbono, la iniciatanto de ĉia peko, kaj kiu okazigis, okazigas kaj okazigos katastrofojn kaj malardon sur la tero.

Do, resume, oni povas opinii, ke la diablo, - fidemono kreita de dio mem kaj eterne indulgata de dio - estas kulpa pri ĉiu fenomeno, kiu turmentas la homaron.

Jen, mi citas parteton el okazintaj terurajoj, kiuj amase okazis en la mondo, kaj kiuj rilatas al la fako de naturaj misteraĵoj , tio estas al la eklezio:

C I L I O : En 10 el 20 diocezoj en Cilio, kiuj estis detruitaj aŭ malkonstruitaj ĝis neuzebleco jenaj ekleziaj konstruaĵoj: 6 katedraloj, 185 katolikaj preĝejoj, 4 seminarioj por sacerdotoj, 86 lernejoj 65 domoj de katolikaj pastroj, kaj multnombraj monaĥejoj.

I T A L I O : Per terura malbeno en Italio finiĝis procesio en kiu partoprenis ĉirkaŭ 400 kredantoj. F u l m o batis la procesion. El la partoprenintoj estis mortigitaj: du pastroj, knabino dekjara, kaj studento. Krom tio 30 personoj estis vunditaj.

""=""

La sonoriĝisto de la preĝejo en Grieco , Italio, kiu estis riparinta preĝejajn sidlokojn, akcidente renversis poton da gluaĵo sur siajn manojn. Subite li devis interrompi sian laboron por funkciigi la sonorilojn. Sed...... la gluaĵo tiom firme fiksis liajn manojn al la ŝnurego, ke li estis svingita supren kaj malsupren. Li estis serioze vundita.

=== '=' ===

JUNA itala laboristo sin mem mortigis per ŝnuro pro timo al la mondpereo kiun profetis kuracisto por infanoj en Malina.

-.-.-.-

GERMANLANDO : En Decembro 1960 usona militaviadilo ege forte frapis turon de preĝejo en Munkeno. La aviadilo, flamanta, falis sur tramveturilon kaj en unu sekundo 52 homoj, kredantoj, estis bruligitaj ĝis morto. Neniu povis savi nek la turon de preĝejo nek la senpekajn veturantojn en la tramvagono.

**G E R M A N L A N D O** La pasinta ĉefkunveno de la Germana Liberpensula Ligo ( D F V ) okazis (17-18.6.1960) en Dortmund. Ĉeestis 40 delegitoj krom la vastigita estraro. Laŭ la raportoj de landaj delegitoj estas konstateble, ke la DFV-anaro konstante kreskas. Tio estas ĝojige, sed ankaŭ mirinda fakto, se oni konsideras la propagandon kaj agitadon de la potencaj kristanaj eklezioj en la okcidenta parto de Germanlando. La eklezioj ĝuas ĉian helpon de partioj kaj registaraj institucioj.

K-do H. Freistuehler estis reelektita prezidanto. Li klare kaj ripete sublizis la fundamentajn principojn de la organizaĵo kaj diris i.a., ke la DFV estas nenur kontraŭeklezia sed ĝi estas ankaŭ prosocialisma , jesanta la filozofan kaj sciencan mondkoncepton de la ateisma, dialektita materialismo.

Por la esperanto-liberpensularo estas notinde, ke k-do Edu. Weichmann unuanime estas elektita kiel fakreferanto por ESPERANTO. Tiu elekto estas nur unu inter la kelkaj faktoroj pri la pozitiva opinio de la Ligo rilate al la lingvo Esperanto. Ankaŭ estas menciinde, ke la ĉimonata presorgano "DER FREIDENKER" ( LA LIBERPENSULO), jam dum kelkaj jaroj regule presigas artikolon en Esperanto kun paralela teksto en germana lingvo.

Al geamikoj kiuj scias la germanan lingvon , mi varme rekomendas al ili aboni tiun gazeton, kiu havas bonan reputacion ĉe la tutmonda liberpensularo. Ciu skribaĵo sendata al la redaktoro de la "DER FREIDENKER" plifortigus la pozicion de Esperanto en tiu organizo. Skribu en Esperanto al : k-do Hubert Freistuehler, Lichtendorferstrasse 51 S c h w e r t e / Ruhr, Germanlando.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

## I N T E R   N I

En la pasinta jaro al la ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ aliĝis : k-dino Elfriede Schumacher en ESSEN, k-doj H.Pieper LONDONO, Caballer Eugéne , Caubel André el Francio.

Danke mi kvitancas la ricevon de mondonacoj de : Bepperling, Deubler Swan, Klingenberg, Schumacher, Ullrich, Pieper, Täuber, Scharnweber , van Dam, Hendrik de Groot, D-ro Bonge, Mittenzwei, M.Weichmann, . . . Ullrich, Caballero.

TIUJ DONACOJ FINANCE GARANTIAS ANKAŬ LA ELDONON DE LA SEKVONTA N.L.O.

K-do Josefo Burger, en la pasinta jaro atingis la respektindan aĝon de 85 jaroj. En Esperantio li estas famkonata kiel karbminista poeto kaj aktiva liberpensulo depost kelkaj jardekoj. NI KORE GRATULAS ! !

Jen, unu poeto el la centoj, kiuj aperis kun signoj de 40 pseŭdonimoj!

### NENIO SANGIĜIS !

Mi foje legis en Biblio
Ke jam en paradiz-ĝardeno
Dekretis tiranece Dio
Unuajn homojn en Edeno:
"NE MANGU DE L'ARBO DE L'SCIO"

De tiu tempo ne plu ekzistis
Eĉ iu ajn despot', tirano
Surtere kiu ne persististis
Postuli de la civitano:
"NE MANGU DE L'ARBO DE L'SCIO"

Foriĝis aŭtokratoj, dioj !
Nun oni estas Demokrato
Sed restis samaj reakcioj,
Tutsame ankaŭ la diktatado:
" NE MANGU DE L'ARBO DE L'SCIO "

---

P R O F U N D A   S C I O   L I B E R I G A S   P E N S O N ! ! !

---

Koncepto de ateismo, - koncepto de scio - super ĉio koncepto pri kredindeco, unu fojon por ĉiam detruis ekstazan bildon de " persona dio " D-RO SWIEZAWSKI

---

S C I E N C O

"Ni devas bruligi ŝtipfajrojn, ni devas mortigi, incendii, ni devas ekstermi precipe la scienculojn, ni devas detrui la presarton". PAPO KLEMENTO LA 7-a

Tiuj vortoj, presitaj en "DOKUMENTOJ" n-ro 12/60. ne plu estas realigeblaj dank al la antaŭen iranta evoluo de la homaro sur la plej gravaj vivdemandoj. Male, la grandskala liberiĝo de la scienco el la eklezia diktaturo garantias al ĝi majstri malfacilaĵojn, kiujn iam venkis supernaturaj estaĵoj laŭ bibliaj rakontoj.

Kiel ĉiu ajn alia scienca disciplino ankaŭ la medicino estas kronita per mirindaj sukcesoj. Ekzemple la soveta profesoro d-ro W.P. Demiĥov publikigis al la ĉeestantaro de la 18-a Kongreso de la Internacia Ĥirurgio-socio en Munkeno, la sensacion, ke oni baldaŭ sukcesos revivigi homojn jam mortintajn. Laŭ li estos eble anstataŭigi malsanan koron per koro normale funkcianta. Prof. D. parolis pri siaj multe pridiskutitaj eksperimentoj ĉe vivantaj bestoj, al kiuj li greftis korojn aŭ aliajn organojn kaj membrojn.

Kara leganto, la etikan punkton de tiaj eksperimentoj ĉe vivantaj kaj senhelpaj bestoj ĉiloke mi ne tuŝas, tio estas temo por si mem. Hodiaŭ ĉefe estas prilumigita la scienca flanko, kiu vere staras en la servo de la homa sanfarto.

Tiu soveta ĥirurgo planas transplanti koron de hundo ĉe kormalsanulo tuj post kiam li estos mortinta. La paciento, nun 77-jara, havas koron kiu estas operaciita jam kvinfoje.

Ĉu tiu medicina eksperimento estos sukcesa devos pruvi la estonto , sed antaŭ kelkaj semajnoj mi legis pri sensacia raporto tuŝante la saman aŭ similan temon.

"ANNEMARIO REVENIS EL LA REGNO DE MORTINTOJ" estas la komencantaj vortoj de la sekvonta skizo.

Dekunujara knabino en Parizo enkorpigis tro la medikamento, kiun ŝi ricevis de kuracisto kontraŭ sufero de tenio. Sekve ŝi perdis sian konscion. La alvokita kuracisto konstatis ..... m o r t i g a n v e n e n o n.

Alveninta en hospitalon la junulino laŭ medicina vidpunkto estis sen viva. Malgraŭ tio la kuracisto kredis al la vivo kaj senhezite tranĉis pugnograndan kanalon ĝis la koro de la infano. Li fake komencis masaĝi la koron per siaj manoj. Kia feliĉo .... la koro, la korpa motoro komencis frapi, sed .... post mallonga tempo denove la korfrapo ĉesis. La medicinisto tamen ne perdis esperon kaj denove li prenis la gravan organon en siajn manojn por masaĝi ĝin. Samtempe oni anstataŭis la venenigitan sangon per 4 litroj da freŝa sango.

Rezulte.... la vivo revenis, kaj la medicina scienco triumfis super la m o r t o .

Ni bone komprenu, ke tiaj sciencaj sukcesoj povas esti danĝeraj por la nesciencaj doktrinoj de la kristanaj eklezioj. Ili ankaŭ donas al la kredantaro la pridiskutindan demandon, kiam la homo estas morta. Ĉu la korpo havas animon kiu povas forlasi la korpon kaj denove enflui ĝin kiam senreligia scienca arto sukcesas revivigi jam mortintan korpon

Evidente, la fabelaj rakontoj en biblio pri revivigo de mortintoj nun treege estas superombrigita pere de la pruveblaj sciencaj faktoj, kiuj dokumentas la veron pri materialismaj principoj, kiuj ĉikoncerne faras superflua la dian proklamon: "Mi estas la sinjoro via kuracisto" ( 2.MOZEO 15:26 )

-.-.-.-

F I A S K O J

Telegramstile estas skizitaj tri fiaskoj pri religiaj profetaĵoj novtempaj.

F A T I M A : Kun intereso estis atendita la jaro 1960, ĉar en ĝi oni volis publikigi la trian - ankoraŭ sekretan - parton de la FATIMA APOKALIPSO. Sed ... NENIO okazis. Simple oni diris, ke la horo por senvualigi la sekreton, ankoraŭ NE estas alveninta.

Laŭ dirajo, en la jaro 1917, kiam la monaĥino LUCIA DOS SANTOS estis eta paŝtistino, aperis ĉe ŝi la legenda figuro de la "di-patrino" kiu komunikis al ŝi pri punoj el la ĉielo kontraŭ la pekema homaro. En tiu surpaperigita mirakla komuniko Ruslando estas menciita kvarfoje, ekzemple: "Mi venos por postuli la benon de Ruslando al mia senmakula koro", "Ruslando konvertiĝos " (dufoje) "Ruslando diskonigos siajn erarojn en la mondon kaj kaŭzos militojn kaj persekutojn."

La nunepoka strukturo en la mondo kaj ties evoluado pruvas la fiaskon de tiu religipolitika spekulacio, kiu eble en estonto restos falsa.

+ - + - +

GERMANLANDO La 6-an de Julio 1960, senbrue mortis la ĉefapostolo de la NOVAPOSTOLA KOMUNUMO.

Tiu estro, s-ro BISCHOFF, asertis, ke li neniam mortos, ke dum lia vivtempo surtera, la SINJORO revenos sur la teron por amasigi siajn ŝafojn (la novapostolojn) por la ĉielregno.

Spite ĉiujn persistajn prognozojn de liaj adeptoj, la ĉefapostolo devis forlasi sian vivon ...... la surteraj netrompeblaj leĝoj biologiaj estis pli fortaj ol ĉiuj religiaj argumentoj, per kiuj oni substrekis la " veron " de iliaj asertoj.

Fakte, ĝis nun NENIO okazis, la novapostola kredantaro vane atendadas la plenumon de la ĉefapostola profetaĵo, kaj al la supreniro en la superteran paradizon

Tio estas dokumento pri primitiva blufo en la Atomepoko.

MILANO El la buŝo de sia fratino, D-RO GIUSEPPE BIANCO kredas esti informita pri pereo de la tero inter la 12-a ĝis 14-a de Julio 1960.

Laŭ lia profetaĵo nur 12000 homoj el la tuta homaro havos la feliĉon postvivi tian katastrofon. La mortanta ino asertis vidi gigantan viron, kiu povus esti la ĉefanĝelo Gabrielo, kiu al ŝi inspiris la scion.
Laŭ la komisiita koncilio BIANCO iris sur la monton MONT-BLANC kie li aranĝis "DOMON DE LA SAVO" kie estus la loko por savi 7000 homojn, kiuj estas konvertitaj al lia profeta diro.

NENIO okazis laŭ antaŭdiro ..... restis nur la ekkono pri tiu BLUFO.

+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+-+

VIKTIMO DE RELIGIO En la regiono de KRASNODAR, sekreta sekto praktikis sangan oferadon al iu dio, buĉante trijaran knabon.

Dum preĝado, iu virino subite sentis sin prenita de la SANKTA SPIRITO kiu postulis - kiel ordono de dio - sangan oferon pro faritaj pekoj. Sekve oni kapteprenis el la brakoj de la patrino la elektitan bubon, kaj mortigis lin en la ĉeesto de la patrino. Dum la sekvanta tago la patrino mortis pro apopleksio.

La patro de la buĉito, aŭ edzo de la patrino, jam mortis pro malsato. Li ne postvivis 40-tagan fastadon, kiun ordonis la sekta pastro.

(El "F.N. 11.11.60 )

LIBERPENSULA FRAKCIO DE SAT

Dum la Arhuza kongreso multaj liberpensuloj kunvenis. Oni multe diskutis kaj pritraktis nian aferon. Ĉiuj konsentis, ke vigla agado estas nepre necesa, precipe en Okcidenta Eŭropo, kie la lukto fariĝis speciale akra. Oni decidis revigligi la frakcion. Respondecas pri ĝi k-dino Delagneau, Avroles par ST FLORENTIN (Yonne), Francio; poŝtĉekkonto Dijon 468.03 .
Liberpensuloj, kiuj deziras kontraŭstari la potencon de la eklezio, tuj aliĝu al nia grupo! Sendu al k-dino Delagneau vian kotizon: 2 respond-kuponoj, aŭ 3 steloj, aŭ 1 nova franca franko.

# NIA LIBERA OPINIO n-ro 16

Julio 1962

ESPERANTO-AMIKARO DE LIBERPENSULOJ

ELDONEJO: Eduard Weichmann, Lotenkamp 4, 46 DORTMUND - KIRCHDERNE

poŝtĉekkonto : Dortmund 130414

Karaj geamikoj !

Kelkaj tagoj antaŭ ol la Esperanto-kongresoj kaj postkongresaj renkontiĝoj manifestos tiajn elstarajn eventojn de la tutmonda esperantistaro, vi tenas en viaj manoj la 16-an numeron de nia periodaĵo : NIA LIBERA OPINIO .

Pasis pli ol unu jaro inter la apero de la 15-a kaj nuna eldono. Malgraŭ la longa paŭzo ni prave povas diri,ke la liberpensula vivado en Esperantio nek endormiĝis, nek perdis la vojon al la destinitaj celoj.

Dum la Universala Kongreso okazonta en la ĉefurbo de Danlando , verŝajne sufiĉe da liberpensuloj -- ĉu vole, ĉu hazarde -- renkontiĝos por priparoli la ankoraŭ ne solvitan problemon de liberpensismo en tiu , kaj en aliaj asocioj. Dum la 35-a S A T - Kongreso en Vieno, la Liberpensula Frakcio en SAT certe aranĝos siajn tradeciajn kunvenojn , same kiel dum la antaŭaj kongresoj ekzemple kiel lastjare en Bruselo, al kiuj partoprenis ĉirkaŭ 50 personoj. -- Pri tiaj fakkunsidoj mi petas je raportoj --

La Esperanto-liberpensularo bone notu mian jam kelkfoje aperintan ripeton, ke nek la nunstata Amikaro De Liberpensuloj , nek nia informilo: NIA LIBERA OPINIO estu alrigardataj kiel idealan plenumadon de niaj taskoj. Fakte, la Amikaro estis vivigita kun la espero per tio arigi liberpensulojn, ateistojn kaj aliajn sendiulojn, ĝis kolektiĝos komitato por refondi Internacian Ligon De Liberpensuloj. Estas menciinda fakto, ke la agado de la esperantistoj - organizitaj en naciaj liberpensulaj ligoj - por la oficiala akcepto de ESPERANTO kiel neŭtralan lingvon por internaciaj rilatoj, ĉiam estis forta. Dokumentoj el pasintaj jardekoj pruvas, ke la tiapempaj pioniroj ne hezitis malŝpari energion por realigi iliajn devizojn. Jam dum la Internacia Liberpensula Kongreso en Buenos-Aires en 1906 oni akceptis rezolucion por Esperanto. Jam antaŭ la 1-a Mondmilito ekzistis INTERNACIA SOCIETO DE LIBERPENSULOJ kun presita gazeto: LIBERA PENSO. Venis la 1-a Mondmilito, kaj, bedaŭrinde, la nomita societo finiĝis vivadi. Malgraŭ obstaklaj malfacilaĵoj, ree fondiĝis Internacia Ligo de Liberpensuloj, kiu eldonis oficialan gazeton: LIBERPENSULO . Havanta tian agadplenan pasinton, ni liberpensuloj staras antaŭ la decido: koncentrigi niajn fortojn, kaj reorganizi nian pozicion tutmondan, revante al nova epoko.

Eduo

## D I O respondo al amiko

Timo estis en la origino de Dio. Homo vidis fulmon super sia kapo, aûdis tondron ĉirkaûe, vidis stelojn movi sur la volbo ĉiela, sentis la teron ondumi sub siaj piedoj kaj spertis aliajn fenomenojn. Li pensis, ke devas ekzisti iu supera forto en la naturo, kiu faras ĉion tion. Li donis al tiu nekonata forto nomon - Dio.Por igi tiun Dion trankvila, li klinis sin ĝis la tero kaj adoris lin.Tia estas la origino de Dio kaj de la kulto.

Kiam malaperis timo, kiu kreis Dion, ankaû malaperis Dio.

Estis epoko kiam oni kredis, ke Neptuno faris la ondojn sur la maro, ke Marso gvidis militojn, ke Minerva tenis la scion, ke la Muzoj inspiradis la poezion. Eĉ hodiaû estas homoj, kiuj kredas ke pestoj, malsatoj pro manko de nutraĵoj, subitaj mortoj, estas kaûzataj de Dio en kolero. Ĝis antaû nelonge oni kredis, ke eklipsoj, aûroroj boreaj kaj aliaj fenomenoj estis aûguroj de grandaj katastrofoj. Sed la scienco pruvis, ke en la naturo nenio supernatura okazas. Konstruaĵo ne falas ĉar Dio ordonis tion, tio okazus ĉar la muroj estas difekte konstruitaj kaj ne taûgas subteni la konstruaĵon

Estas homoj, kiuj kredas, ke la maroj restas en siaj limoj, ĉar Dio diris al ili:"Ĉi ne pli iros antaûen." Francoj konstruis kanalon inter la Morta Maro kaj la Meztermaro kaj de ambaû flankoj la akvoj sin ĵetis antaûen kiam la marniveloj iĝis egalaj. Vidu, kiel la maroj obeas al la supozita ordono de Dio.

Se la Atlantika kaj la Pacifika oceanoj ne komunikas inter si,tio ne estas ĉar Dio estas kontraû tio, sed nur ĉar mankas monrimedoj. Kiel la matena lumo malaperigas la noktajn fantomojn, tiel la Scienco forigas la erarojn, kiuj kreis Diojn.

Katoliko pensas, ke ne estas alia Dio ol tiu de katolikoj,instruata de katolika pastro. " Dio estas la nekonato " diras iuj filozofoj. Sed, laû mi, Timo estas Dio. Timon ĉiuj sentas, sed en rerealo ĝi ne ekzistas,ĝi estas nur en nia imago. La samo estas pri Dio. Ekzisto de tia speco de Dio, kiun katolika pastro instruas, estas neebla. Legu lian pruvon: "Ĉiuj popoloj kredis en Dio, do, li ekzistas". Al tio oni povas respondi: "Ĉiuj timas, do,timo ekzistas," Sed tio estas nur en imago. Same estas pri Dio. Kredo, eĉ universala, ne faras realon. Dum multaj jarcentoj,ĉiuj kredis, ke la tero estas plata kaj, ke ĝi estas en la centro de la universo. Malgraû tio la tero daûras esti globforma, kaj turnadas sin ĉirkaû la suno.

Dua pruvo de pastroj: "Ĉar oni vidas, ke neniu estaĵo estas kreata per si mem, do, la mondo devas esti kreita per estaĵo nekreita, tio estas de Dio." La sofismo de tio estas tuj videbla. se Dio povas esti nekreita, kial same la Universo estas nekreita.

Laû kronologio eklezia, la mondo estas kreita antaû proksimume 6 000 jaroj. Kion faris Dio antaû tiu tempo ???

Oni diras, ke li estas ĉiopova, kaj li ne povis fari la mondon en unu fojo. Li devis dividi la taskon por ses tagoj kaj pro laciĝo la sepan tagon li dediĉis al ripozo. Kaj ŝajne, li daûrus ripozi, ĉar de post tiam li ne plu okupas sin pri sia verko.

Antaû la kreo li restadis tute inerta -- nebona ekzemplo por ni - montrante al ni, ke li ne ŝatas labori, kaj ĉar li ne povis doni pli grandan punon al Adamo kaj lia posteularo ol kondamni ilin labori por akiri sian ĉiutagan panon.

Krom lian senliman povon oni celebras ankaŭ lian superan bonkorecon,sed, se oni bone observas, oni vidas, ke en la mondo regas nur malbono. Ĉu vi memoras, kiel suferis, antaŭ ol morti via filino, la unua naskito ? Estas tiu ĉiopova kaj suverena bona Dio , kiu, kiel oni diras, vidas ĉion, scias ĉion kaj, kiu, tamen, faris nenion, absolute nenion, por forigi la dolorojn al tiu senkulpa estaĵo, kiu neniam ion faris malbona.

Ĉu estas trovebla en la mondo homo tiom malbona, kapabla mildigi la dolorojn de via filineto, sed kiu lasus ŝin suferadi. Ĉiuj bonkoraj homoj alkuris kun ia speco de rimedo por helpi al ŝi. Se vi povus redoni sanon al malsanuloj, konsoli homojn kiuj suferadas, igi homojn feliĉaj, ĉu vi ne farus tion ? Do, farante tion vi estus kaj restadus pli bona ol tiu Dio, kiun oni nomas la Suprema Boneco.

A.T. (sen plena nomo )
en la organo "LA PENSEE
Tradukis Teresa Yelland

- = - = - = - = - = - = - = - = - = - = - = - = - = - = - = - = - = - = - = -

MALLONGAJ INFORMOJ
==================

La tria kongreso de la INTERNACIA HUMANISTA KAJ ETIKA UNIO okazos la 2-an ĝis 7-a de Aŭgusto 1962 en la Universitato de O S L O, Norvegio. La I.H.E.U. estas tegmenta organizaĵo al kiu filiiĝis ĉiuj humanistaj ligoj tutmondaj. Ĝi estas fondita okaze de la 1-a kongreso en Amsterdam en 1952. Al la 2-a kongreso, aranĝita en London en 1957, i.a. ĉeestis 16 geesperantistoj devenaj el kelkaj landoj. Ankaŭ ekzistas BRITA ESPERANTO-HUMANISTARO kun sekretario s-ro G.L.Dickinson, 21 Gribble Road, LIVERPOOL 10.

P R I K R E M A C I O
======================

En Oldenburg, Germanlando, estas finkonstruita nova krematorio. Ĝi estas la 63-a krematorio kiu nuntempe funkcias kiel encindrigejo en la okcidenta parto de Germanlando kaj Berlin. Kompare al Britio , la nombro estas malalta, tie ekzistas 131 krematorioj. En la Federacia Respubliko Germana, en 1959 estis encindrigitaj 61 616 mortintoj; en Britio la nombro atingis 190 819. Tio signifas,ke en la G.F.R. ne pli ol 10,18 elcentoj de la mortintoj estas encindrigitaj en 1959, sed en Britio 32,3 elcentoj.

S T A T I S T I K O
==================

La urbo Berlin povas prezenti la plej altan nombron de homoj ne-enskribitaj al iu ajn religio. La plej malaltan elcenton de tia homo-kategorio havas la germana lando Bavario kun nur 1,3 elcentoj.

D Ü S S E L D O R F
==================

La frakcio de la Kristana Demokrata Unio en landa Parlamento de Nord-Rejno-Vestfalio proponis plialtigi ŝtatajn subvenciojn por ekleziaj konstruaĵoj. Temas pri la alta sumo de 7 milionoj da gmk. Por plenumadi tian kromelspezon, oni planas malaltigi la sumon por novkonstruado de Inĝenero-lernejoj en tiu provinco.

LA PEREIĜI DE LA TERGLOBO
========================

profetita de la itala D-ro G. Bianco, antaŭ du jaroj , nek efektiviĝis en la la koncerna jaro 1960 nek en la sekvinta jaro, nek en la nuna jaro, kaj certe ne okazos en la estontaj jaroj.

Dum ĉiuj epokoj kaj de ĉiuj popoloj kompatindaj spiritmalsanuloj, aŭ ruzaj krimemuloj profetis kun timiganta maniero la detruiĝon de nia mondo kaj la ekstermon de la homaro -- kompreneble kun escepto de kelkaj homoj favoritaj de iliaj dioj.
Inter la aro de profetoj ankaŭ iu apotekisto G.Zarbano el Italio profetis nuligon de la mondo jam dum ĉiaŭtuno. Li apogas sin sur diraĵoj en la kristana ĉeflibro, la biblio, kiu rakontas multe pri tiaj terurаĵoj.

**H O N O R E** al nia ĉiam bonhumora kaj kapabla poeto J. Burger, aktiva liberpensulo kiu esperantiĝis antaŭ la 1-a Mondmilito.

## M I A  A M I K O

Trafas min de temp`al tempo
dika aù maldika sendo
el la Ruhr-a regiono,
de la "herezul-fripono".

Josef estas lia nomo,
homo, kiel ĉiu homo,
ĉar li laû la korpa formo
respektivas al la normo.

Tamen, absolutkontraste
de la homamaso vasta
perfektiĝis la spirito
ĉe Josefo ĝis zenito !

Li, iama katoliko,
skuas kvazaù el maniko
rimojn en perfektkvalito
kaj plenplenajn de kritiko !

Religion kaj snobismon,
patriotan naciismon,
Josef vipas plenpasie
kaj ne malpli ironie !

"Risku pensi !" Ĉi-slogano
de l' konata "Kastelano"
nepre estu la principo
ĉies ajna Lanti-ido !

A. de l' Erikejo.

## DI-KREDO ESTAS NESCIO !

Iam "Sanktaj Dioj" regis
en la Roma Imperi'.
Tiam ĉiuj tion kredis,
poste sed neniu pledis,
ke ĉeestis "Vera" Di' !

Grekojn kreis gajajn Diojn,
kun homeca ĝoj-inklin',
bone gardis Olimpion,
bone nutris Di-gvardion,
ĉar ne ŝirmas Dioj sin !

Ankaù nun kelkiu kredas
al persona propra Di' :
al Jehova, Buddha, Allah,
aù al Wodan en Walhalla,
- fremdan Dion neas li !

Se asertas teologoj,
ke sufiĉas "iu" kred'
por la pruv' pri Di-ekzisto,
- Ni kontraùas kun insisto:
"Tio estas blufo-bred' !

Gardu vin de "religioj",
kie brilas multa or' !
Senescepte ĉiuj dioj
venis nur el iluzioj,
- sen negoco estus for !

Josef Burger ( 8.2.61 )

## I N T E R  N I

El Svisio ni ricevis la doloran sciigon pri la forpaso de nia amiko kaj kunbatalanto OSKAR ZIMMERMANN. Li mortis 83-jara post longa malsaneco. Ek de 1934 li loĝis en Zürich, veninte el Vieno. Jam 1906 li esperantiĝis. En la svisa liberpensula ligo li estis longjara afergvidisto, kasisto kaj verkanto de ĉefaj artikoloj en DER FREIDENKER, (La Liberpensulo ). Ni perdis en Oskar Zimmermann unu inter niaj plej ŝatataj agantoj por la libera penso. Ni tre sincere kondolencas al s-rino Zimmermann.

Kiel novajn membrojn en la Amikaro ni povas bonvenigi jenajn amikojn: Franco Denkowski el Katowice, Pollando

Albert Bracke, el Gent, Belgio,

Voojslav Pytloun, Liberec, Ĉeĥoslovakio

**D A N K O N** al ĉiuj sendintoj de leteroj, bildkartoj, informoj, sugestoj, gazeteroj kaj literaturaĵoj. Dankon al ĉiu kiu subtenis laboron per donaco de mono, de poŝtmarkoj, kaj int.respondkuponoj malgraù ne estas fiksita kaj postulata kotizon.

Por eviti interrompon de niaj interrilatoj, la legantaro estas petata senprokraste konigi al la eldonejo ŝanĝojn de adresoj kaj pri aliaj gravaj okazontaĵoj en la vivo.

Propagandcele mi planas krei kolektaĵon de diversnaciaj gazetoj, informiloj k.s. de liberpensulaj kaj samcelaj organizaĵoj. La sendintoj de tiuj petataj dokumentoj bonvole aldonu klarigojn pri nomoj kaj signifoj de la materialoj. Ĉiun ĉikoncernan sendaĵon mi kvitancos per sendo de bildkarto .

La ESPERANTO - INFORMEJO en Fürth /bay. Marienstasse 32, sub gvido de la Esperanto-pioniro Bruno Siegert, regule sendadas al ni sciigojn pri aktualaj okazaĵoj. DANKON !, Bruno.

La geamikoj scipovantaj la germanan lingvon petu de s-ro Hubert Freistühler, 584 SCHWERTE/ Ruhr, poŝtfako 124, specimenon de la liberpensula organo "DER FREIDENKER", kiu depost 1954 prezentas esperantan rubrikon kun paralela teksto en germana. Al Freistühler kiu funkcias kiel redaktoro kaj 1-a prezidanto de la Germana Liberpensula Ligo, vi afable sendu esperante verkitajn artikoletojn taŭgajn por tiu esperanta kolono. Per tio vi donus ventegon en la velojn de la Esperanto-ideo en tiu ligo. Tio ankaŭ dokumentus al ne-esperantistoj la internaciecon kaj utilecon de Esperanto.

Esperanto-artikoletoj aperintaj en la "D.F.", jam kelkfoje estas represitaj en :THE SOCIALIST LEADER, 197 King's Cross Rd. London W.C.1, gazeto kiu havas konstantan bonege redaktitan esperantan angulon,

en: Dokumentoj, 55, Rue de Foljuif, NEMOURS (S.-et-M.) Francio.
en: ORA ULEKSO, 33, rue Duhamel, RENNES (I.&V.)Francio
en: NIA PAROLILO, presita en Lidköping, Svedio.
en: NIA ESPERO, komunikilo por Gentaj Laboristaj Esperantistoj.

+++===++++====++++====+++

## INFANO-TRAGEDIO

Antaŭ 750 jaroj, en 1212 en Cloies Francio, komenciĝis unu inter la plej grandaj tragedioj en la historio de la infanaro. Tie aperis paŝtisteto Stephan kiu sentis sin alvokita de kristana Dio,,, forpeli la paganojn el Jeruzalemo. En tiu senco li vagadis kant - ante kaj preĝante de loko al loko kaj kolektis proksimume 30 000 infanojn, kiuj estis pretaj lin sekvi al "Dio, trans la maro" tio estis -- irado en la katastrofon. Eĉ papo Innozenz III. estis tre emociita pro tiu planita infana krucmilitiro kaj emigis la plenkreskulojn al nova kruca militiro-ideo kaj predikis al ili: "Tiuj infanoj hontigas nin, dume ni dormadas, ili gaje foriras por konkeri la "sanktan landon".

La plejmulto de tiuj misuzitaj geinfanoj estis kaptitaj de sklavo negocistoj, multaj aliaj sufokiĝis en la maro.
Tiu religia frenezo de la francaj infanoj trovis imitaĵon en Germanio. Knabo kun nomo Nikolaŭs, sorĉita de la kruco-ideo, tramigradis la landon kaj organizis sekvantaron kun kiu li pilgrimis Italion trans la alpoj. Pro mizero, malsano kaj krimemuloj pereis miloj da infanoj survoje. Nur eta parto de tiu kompatinda junularo korpe rompita, etike kaj morale malbonigita revidis sian gepatran landon. Tiu ĉi infano-krucmilitiro eble donis impulson al elpenso de fabelo pri rato-kaptisto en Hameln, Germanio, rakontita en la sama jarcento.
Epigrafo melankolie esprimas: ke la plej feliĉaj inter la partoprenintoj de la infano-krucmilitiro estis tiuj, kiuj dronis en la Mediteranea-Maro.

Eduo